

Alfonso Daudet



Leteroj de mia Muelejo.

Verko el la publika fako.

<https://fr.wikisource.org/Lettres de mon moulin>

Antaŭparolo.

En ĉeesto de moŝto Honorato Grapazi, notario ĉe la rezidentejo de Pamperigusto^[1],

"Aperis

"La sinjoro Gasparo Mitifio, edzo de Viviana Kurnilo, mastrumisto en la domareto de la cikadejoj kaj tie loĝanta :

"Tiu per ĉi tiuj leteroj vendis kaj transdonis sub garantio de leĝo kaj de fakto, kaj liberigita de ĉiuj ŝuldoj, privilegioj kaj hipotekoj,

"Al sinjoro Alfonso Daudet, poeto, loĝanta en Parizo, al tio ĉeestanta kaj tion akceptanta,

"Ventomuelejon por faruno, lokita en la Valo de Rodano, ĉe la koro mem de Provenco, en marbordo arbokovrita de pinoj kaj de ilekskverkoj: la jam nomita muelilo estanta forlasita de pli ol dudek jaroj kaj nekapabla mueli, kiel rezultas pro sovaĝaj vitoj, muskoj, rosmarenoj kaj aliaj parazitaj verdaĵoj kiuj grimpis ĝis la fino de la alojn;

"Malgraŭ tio, tiel kiel ĉi estas kaj funkcias, kun sia granda rompita rado, sia platformo kie herbo kreskas inter la brikoj, sinjoro Daudet deklaras trovi la jam nomitan muelilon laŭ sia plaĉo kaj povanta utili por siaj poeziaj verkoj, akceptas ĝin plenresponde kaj sen iu ajn apelacio kontraŭ la vendisto kaŭze de riparoj kiuj povus esti faritaj al ĝi.

"Ĉi tiu vendo ope okazas kontraŭ la konsentita prezo kiun sinjoro Daudet, poeto, metis kaj forlasis sur la skribotablo laŭ uzata valuto, kiu prezo estis tuj enspezita kaj elprenita de sinjoro Mitifio, ĉio ĉi ĉe la vido de notarioj kaj subskribitaj atestantoj, kies kvitanco sub rezervo.

"Akto farita en Pamperigusto, ĉe la notariejo Honorato, kun la ĉeesto de Franseto Mamajo, ludanto de fifro, kaj de Luizeto dirata la Henĉjo, krucportanto de la blankaj pentofarantoj:

"Kiu subskribis kun la partioj kaj la notario post legado..."

[1] Pamperigusto estas imaga loko citita en la verko de Alfonso Daudet, kiu enhavas plurajn menciojn de ĉi tiu mita urbo situanta en Provenco.

Enhava tabelo.

I n s t a l a d o.....	4
La diliĝenco de bokero.....	8
La sekreto de majstro Kurnilo.....	12
La Kaprino de S ^{no} Segino.....	18
La Steloj.....	25
La Arlezanino.....	31
La Mulino de la Papo.....	36
La Lumturo de la Sangaj Insulo.....	47
La Agonio de la Vivoplena.....	53
La Doganistoj.....	60
La Preposto de Kukunjano.....	65
La Gemaljunuloj.....	72
Prozaj Baladoj.....	80
La Monpaperujo de Biksiu.....	87
La Legendo de la Viro kun Cerbo el Oro.....	93
La Poeto Mistralo.....	97
La Tri Mallaŭtaj Mesoj.....	105
La Orangôj.....	115
La du Gastejoj.....	119
En Miliana.....	124
La Lokustoj.....	136
La Eliksiro de la Pastra Moŝto.....	141
En Kamargo.....	152
Nostalgio de la Kazernoj.....	163

Instalado.

Estas la kunikloj kiuj estis mirigitaj !... Ekde tiom longe ke ili vidis la muelilopordon fermita, la murojn kaj la platformon invaditaj de herboj, ili fine kredis ke la gento de muelistoj finiĝis, kaj trovante la lokon bona, ili faris de ĝi ion kiel loĝkvartalon, strategian centron de operacioj : la muelejo de **Ĵemapo**^[1] de la kunikloj... La nokto de mia alveno, estis ja, sen mensogi, dudeko da ili ronde sidantaj sur la platformo, varmigante al si la piedojn ĉe iu lunradio... La tempo de la duonmalfermado de iu lukto, frert ! jen la bivako fuĝanta kaj ĉi tiuj ĉiuj malgrandaj blankaj postaĵoj kiuj forkuras, kun vosto alten, en la densejon. Mi vere esperas ke ili revenos.

Ankaŭ iu tre surprizita, vidante min, estas la luanto de la unua, iu malĝoja maljuna orelstrigo, kun kapo de pensulo, kiu loĝas en la muelilo ekde pli ol dudek jaroj. Mi trovis ĝin en la supra ĉambro, senmova kaj rekta sur la ĉefŝafto, meze de la gipsoruboj, de la falintaj tegoloj. Ĝi rigardis min dum momento per sia ronda okulo, poste tute konsternegita ne rekoni min, ĝi komencis eligi "Hu hu !" kaj pene skui siajn flugilojn grizajn pro polvo - tiuj diabloj de pensuloj ! ili neniam brosas sin... Ne gravas ! Tia kia ĝi estas, kun siaj palpebrumantaj okuloj kaj grumblema mieno, ĉi tiu silenta luanto plaĉas al mi eĉ pli bone ol alia, kaj mi hastis renovigi al ĝi ĝian lukontrakton. Ĝi konservas kiel en la pasinteco la tutan supron de la muelilo kun enirejo tra la tegmento; Mi ja rezervas al mi la malsupran ĉambron, malgranda ĉambro blankigita per kalko, malalta kaj volba kiel refektorio de monaĥejo.

1 Komunumo apud Monso en Belgio kie interbatalis Aŭstrio kaj Francio je la 6a de Novembro 1792

Estas de tie ke mi skribas al vi, mia pordo larĝe malfermita al la bona suno.

Beleta arbaro de pinoj tute lumbrilega disvolviĝas antaŭ mi ĝis la malalto de la marbordo. Ĉe la horizonto, la Alpiloj^[2] reliefigas siajn fajnajn krestojn... Neniu bruo... apenaŭ, de tempo al tempo, iu sono de fifro, iu kurlo en la lavendejo, iu tintilo de mulinoj sur la vojo... Tiu ĉi tuta bela provenca pejzaĝo vivas nur per la lumo. Kaj nun, kiel vi volas ke mi ĝin bedaŭras, vian Parizon bruon kaj malhelan ? Mi estas tiel bona en mia muelejo ! Ĝi estas tiel vere la loko kiun mi serĉis, iu loketo aromplena kaj varma, je mil leŭgoj for de ĵurnaloj, fiakroj, nebulo !... Kaj kiom da belaĵoj ĉirkaŭ mi ! Estas apenaŭ ok tagoj ke mi estas instalinta, mi jam havas la kapon plenplenan de impresoj kaj memoroj... Jen ! Ne pli poste ol hieraŭ vespere, mi spektis la revenon de brutaro en farmdomo kiu troviĝas malsupre de la deklivo, kaj mi ĵuras al vi ke mi ne donus tiun spektaklon kontraŭ ĉiuj premieroj kiujn vin havis en Parizo dum ĉi tiu semajno. Juĝu per vi mem.

Necesas diri al vi ke en Provenco, estas la agmaniero, kiam la varmego alvenas, sendi la brutaron en la Alpoj. Bestoj kaj homoj travivas dum kvin aŭ ses monatoj tie supre, subĉiele loĝintaj en la herbo ĝis la ventro; poste, ĉe la unua frostotremo de aŭtuno, oni malsupreniras al la farmdomo kaj oni revenas burĝece paŝtiĝi sur la malaltaj grizaj montetoj kiujn parfumas la rosmareno... Do hieraŭ vespere, la brutaroj revenis. Ekde la mateno, la portalo atendis duklape malfermita; la ŝafejoj estis plenaj de freŝa pajlo. Horon post horo oni diris al si : "Nun, ili estas en Eĵgiero, nun en Parado^[3]". Poste, subite, ĉirkaŭ la vespero, kriego : "Jen ili"

2 Mi ne trovis bonan tradukon. Alpiloj estas propra nomo de malaltaj montaroj en la sudoriento de Francio rande de Mediteraneo.

3 Eĵgiero kaj Parado estas francaj komunumoj lokitaj sude de la Alpiloj.

kaj tie, malproksime, ni vidas la brutaron antaŭenpaŝi en ia gloro de polvo. La tuta vojo ŝajnas paŝi kun ĝi... La maljunaj virŝafoj venis unue, kun la kornoj antaŭe kaj sovaĝa mieno; malantaŭ ili, la ĉefa parto el la ŝafoj, la patrinoj iom lacaj, iliaj suĉinfanoj en la kruroj; - la mulinoj, kun ruĝaj kvastoj, portantaj en korboj la ŝafidojn de unu tago kiujn ili paŝante lulis; poste la hundoj tute ŝvitantaj, kun langoj ĝis grundo, kaj du grandaj friponoj de paŝtistoj volvintaj en manteloj el rufa kadiso kiuj falis sur iliaj kalkanoj kiel ĥormanteloj.

Tiu tuto ĝoje translokiĝas antaŭ ni kaj enŝoviĝas sub la portalon, piedpremante kun bruo de pluvego... Necesas vidi kian agitadon en la domo. De supre ilia birdsidejo, la dikaj pavoj verdaj kaj oraj kun tula kresto, rekonis la alvenantojn kaj akceptas ilin per kolosa tondro de trumpeto. La kokejo kiu endormiĝis, abrupte ekvekiĝas. Ĉiuj staras sur siaj piedoj : kolomboj, anasoj, meleagroj, numidoj. La kortobirdaro estas kiel freneza; la kokidoj projektas tranokti !... Ŝajnas ke ĉiu ŝafo alportis en sia lano, kun parfumo de sovaĝa alpo, iom da tiu vigla aero de la montoj kiu ebrietigas kaj kiu dancigas.

Estas meze de tiu tuta tohuvo bohuo ke la brutaro atingas sian domon. Nenio ĉarma kiel tiu enloĝigo. La maljunaj virŝafoj teneriĝas revidante sian fojnorakon. La ŝafidoj, la tute junaj, tiuj kiuj naskiĝis dum la vojaĝo kaj neniam vidis la farmdomon, miroplene ĉirkaŭrigardas.

Sed la ankoraŭ pli kortuŝa, estas la hundoj, tiuj bravaj ŝafhundoj tute aferemaj por siaj bestoj kaj vidantaj nur ilin en la farmdomo. La kortohundo vane alvokas ilin de la fundo de sia hundujo; la sitelo de la puto, tute plena da freŝa akvo, vane faras signon al ili; ili volis nenion vidi, nenion aŭdi, antaŭ ol la brutaro estu enigita, la dika klinko ŝovita ĉe la malgranda pordo kun krado, kaj la paŝtistoj altabliĝintaj en la malalta ĉambro. Nur tiam ili konsentas iri al la hundejo,

kaj tie, lektrinkante sian plenpelveton da supo, ili rakontas al siaj kamaradoj de la farmdomo tion kion ili faris tie supre en la monto, ia nigra lando kie estas lupoj kaj grandaj purpuraj digitaloj ĝisrande plenaj de roso.

La diligenco de bokero.

Estis la tago de mia alveno ĉi tie. Mi veturis per la diligenco de Bokero^[4], bona malnova veturilaĉo kiu ne havas longan vojon por iri antaŭ ol esti alveninta hejmen, sed kiu vagadas laŭ la tuta vojo, por ŝajni alveni vespere de malproksime. Ni estis kvin sur la imperialo sen kalkuli kun la veturigisto.

Unue iu gardisto de Kamargo, dikmalalta vireto, vila, odoranta la sovaĝbeston, kun dikaj sangoplenaj okuloj kaj arĝentaj ringoj ĉe la oreloj. Poste du Bokeranoj, iu bakisto kaj lia knedisto, ambaŭ tre ruĝaj, tre spirmankaj, sed belegaj profiloj, du romiaj medaloj kun la figuro de Vitelio. Fine, ĉe la antaŭo, apud la veturigisto, iu viro... ne ! ia grandega kaskedo el kunikla haŭto, kiu ne diris multon kaj rigardis la vojon kun malgaja mieno.

Ĉiuj tiuj homoj konis unu la alian kaj laŭte parolis pri siaj aferoj, tre libere. La kamargano rakontis ke li venis de Nimo, alvokita de la enketjuĝisto pri forkofrapo donita al iu paŝtisto. Oni facile koleriĝas. en Kamargo... Kaj en Bokero^[4] do ! Ĉu niaj du Bokeranoj ne volis tranĉi la gorgon unu la alian rilate al la Sankta Virgulino ? Ŝajnas ke la bakisto estis el paroko dediĉita ekde longe al la Madono, tiu kiun la Provencanoj nomas la Bonan Patrino kaj kiu portas la etan Jesuon en siaj brakoj; la knedisto male, kantis en la ĥorejo de iu tutnova preĝejo kiu estis dediĉita al la Senpeka Koncipiteco, tiu bela ridetanta bildo kiun oni pentras kun la brakoj pendantaj, la manoj plenaj de radioj. La kverelo devenis de tio. Necesis vidi kiel tiuj du bonaj katolikoj traktis sin reciproke, sin kaj iliajn Madonojn :

4 Mi ne trovis kaj do inventis tiun tradukon. France, ĝi estas "Beaucaire".

- Ŝi estas bela, via Senpeka !
- Foriru do kun via Bona Patrino !
- Si travivis dolorajn momentojn, la via, en Palestino !
- Kaj la via, hu ! la malbela ! Kiu scias tion kion ŝi ne faris... Prefere demandu al Sankta Jozefo.

Por kredi sin en la haveno de Napolo, mankis nur vidi brili la tranĉiloj, kaj vere, mi ja kredas ke tiu bela teologia turniro finiĝus tiel se la veturigisto ne intervenus.

- Lasu do nin trankvilajn kun viaj Madonoj, li diris ridante al la Bokeranoj : ĉiuj tiuj estas rakontoj de virinoj, la viroj ne devas entrudiĝi.

Tuj post, li klakigis sian vipon kun skeptika mieneto kiu arigis ĉiujn ĉirkaŭ sia opinio.

La diskuto estis finita; sed la bakisto, viglita, bezonis konsumi la reston de sia vervo, kaj turnante sin al la malfeliĉa kaskedo, silenta kaj malgaja en lia angulo, li mokeme diris :

- Kaj via edzino, al vi, akriĝisto ?... Kiun parokon ŝi subtenas ?

Necesas kredi ke estis en ĉi tiu frazo tre amuza intenco, ĉar la entuta imperiale eksplodis per ekridego... La akriĝisto li ne ridis. Li ŝajnis ne aŭdi. Vidante tion, la bakisto turnis sin miaflanken :

- Ĉu vi ne konas ŝin, lian edzinon, sinjoro ? Nu, iu stranga parokanino ! Ne estas du kiel ŝi en Bokero^[4].

La ridadoj intensiĝis. La akriĝisto ne moviĝis, li kontentiĝis mallaŭte diri, sen relevi la kapon :

- Silentu, bakisto.

Sed tiu diabla bakisto ne deziris silenti, kaj li ankoraŭ pli laŭte daŭrigis :

- Stultuletino ! La kamarado ne estas kompatinda havi tian edzinon... Ne eblas enui dum momento kun ŝi... Pensu do ! Iu belulino kiu estas forrabita ĉiujn ses monatojn, ŝi

Ĉiam havas ion por rakonti al vi kiam ŝi revenas... Ne gravas, ili estas strangaj ĉarmaj geedzoj... Imagu, sinjoro, ke ili ne estis geedziĝintaj de unu jaro, paf ! jen la edzino kiu foriras en Hispanio" kun iu vendisto de ĉokolado.

La edzo hejme restas sola ploradante kaj drinkadante... Li estis kiel frenezulo. Post kelka tempo, la belulino revenis en la landon, vestinta kiel hispanino, kun eta tamburo kun tintiloj. Ni ĉiuj diris al ŝi : "Kaŝu vin; li tuj mortigos vin". Ha ! jes ja, mortigi ŝin... Ili revivis kune tre kviete, kaj ŝi instruis lin ludi tamburinon.

Okazis nova eksplodo de ridoj. En sia angulo, sen relevi la kapon, la akriĝisto denove murmuris :

- Silentu, bakisto.

La bakisto preteratentis tion kaj daŭrigis :

- Vi eble kredas, sinjoro, ke post ŝia reveno el Hispanio, la belulino tenis sin trankvile... Ha, tute ne... Ŝia edzo tiel bone akceptis la aferon ! Tio instigis ŝin rekomenci... Post la Hispano, estis oficiro, poste Rodana ŝipisto, poste muzikisto, poste... ĉu-mi-scias ?... Tio kio estas bone, estas ke ĉiufoje estas la sama komedio. La edzino foriras, la edzo ploras; ŝi revenas, li konsoliĝas. Kaj ĉiam oni forprenas ŝin de li, kaj li ĉiam reprenas ŝin... Kredu ke li havas paciencon, tiu edzo ! Necesas ankaŭ diri ke ŝi estas multe beleta, la eta akriĝistino... iu ververa peco ja; vigla, ĉarma, belkorpa. Kun tio, blankan haŭton kaj avelkolorajn okulojn kiuj ĉiam rigardas virojn ridante... Certe ja ! Parizano mia, se vi iam traveturos tra Bokero^[4].

- Ho ! Silentu, bakisto, mi petegas vin... eligis ankoraŭfoje la kompatinda akriĝisto kun korŝiranta voĉesprimo.

Tiam, la diliĝenco haltis. Ni estis ĉe la bieno de Angloroj^[5]. Estas tie kie la du Bokeranoj elveturiĝis, kaj mi

5 Mi ne trovis kaj do inventis tiun tradukon. France, ĝi estas "Anglores", origina vorto

asertas al vi ke mi ne retenis ilin... petolema bakisto ! Li estis en la korto de la farmdomo ke ni ankoraŭ aŭdis lin ridi.

Tiuj homoj forlasitaj, la imperialo ŝajnis malplena. Ni delasis la Kamarganon en Arlezo; la veturigisto paŝis sur la vojo apud siaj ĉevaloj... Ni estis solaj tie supre, la akriĝisto kaj mi, ĉiu en sia angulo, sen paroli. Varmis, la ledo de la ŝirmilo brulis. De tempo al tempo, mi sentis miajn okulojn fermiĝi kaj mia kapo iĝi peza; sed neebulis dormi. Mi ankoraŭ havis en la oreloj tiun "Silentu, mi petegas vin", tiel afliktegan kaj tiel dolĉan... nek li ankaŭ, la kompatindulo ! li ne dormis. De malantaŭe, mi vidis liajn dikajn ŝultrojn tremeti kaj lia mano -longa mano palega kaj ridinda - tremi sur la dorso de la benko, kiel mano de maljunulo. Li ploris...

- Jen vi estas hejme, Parizano ! subite ekkriis al mi la veturigisto; kaj per la pinto de sia vipo, li montris al mi mian verdan monteton kun la supre kadukiĝinta muelilo kiel dika papilio.

Mi rapidis elveturiĝi... Pasante apud la akriĝisto, mi provis rigardi sub lia kaskedo; mi volintus vidi lin antaŭ ol foriri. Kvazaŭ li komprenis mian penson, la malfeliĉulo abrupte levis la kapon kaj, turnis siajn okulojn en la mian :

- Rigardu min bone, amiko, li diris al mi per obtuza voĉo, kaj se iam vi ekaŭdas ke okazis malagrablaĵo en Bokero^[4], vi povos diri ke vi konas tiun kiu plenumis la faron.

Estis senesprima kaj malgaja vizaĝo, kun etaj senlumaj okuloj. Estis larmoj en tiuj okuloj, sed en tiu voĉo estis la abomeno. La malamo, estas la kolero de la malfortuloj !... Se mi estus la akriĝistino, mi malfidus.

Ŝajne devenanta de okcitana traduko signifanta "tereno ĉe la angulo de du vojoj" aŭ "grizaj lacertoj".

La sekreto de majstro Kurnilo.

Franseto Mamajo, maljuna ludisto de fifro kiu venas hejmen de tempo al tempo por vespere kunsidi trinkante kuiritan vinon, rakontis al mi je la alia vespero, malgravan vilaĝan dramon kies mia muelejo estis spektanto antaŭ kelkdudek jaroj. La rakonto de la bonulo kortuŝis min, kaj mi tuj provos rediri ĝin al vi same kiel mi aŭdis ĝin.

Imagu dum momento, karaj legantoj, ke vi estas sidinta antaŭ iu tute parfumita vinpoto, kaj ke estas maljuna ludisto de fifro kiu parolas al vi.

Nia lando, mia bona sinjoro, ne ĉiam estis iu loko senviva kaj senfama, kiel ĝi estas hodiaŭ. Alitempe, okazis grava komerco de farunejo, kaj ĝis dek leŭgoj ĉirkaŭe, la homoj de la farmdomoj alportis al ni sian tritikon por mueli... Tute ĉirkaŭ la vilaĝo, la montetoj estis kovritaj de ventomueliloj. Dekstre kaj maldekstre, oni vidis nur alojn kiuj turniĝis en la mistralo super la pinoj; svarmojn da azenetoj ŝarĝitaj per sakoj, suprenirantaj kaj malsuprenkurantaj laŭ la vojoj; kaj dum la tuta semajno, estis plezuro aŭdi sur la altaĵo, la bruon de vipoj, la krakadon de la tolo kaj la Dia Hot^[6]! de la muelhelpantoj... Dimanĉe, ni po grupo iris al la muelejoj. Tie supre, la muelistoj regalis per la moskatelo. La muelistinoj estis belaj kiel reĝinoj, kun siaj ŝultrotukoj el punktoj kaj siaj kruco el oro. Mi ja alportis mian fifron, kaj ĝis la nigra nokto, ni dancis farandolojn. Tiuj muelejoj, vi komprenas, igis la ĝojecon kaj la riĉecon de nia lando.

Bedaŭrinde, Francoj el Parizo havis la ideon starigi vapormuelilon, sur la vojo al Taraskono. Tute bela, tute nova! La homoj kutimiĝis sendi siajn tritikojn al tiuj

6 Ekkrio de ĉaristo destinata por turnigi la tirbestojn "Dia" maldekstren, "Hot" dekstren.
NB : La unua Hot antaŭeninigas la tirbestojn

muelistoj, kaj la kompatindaj ventmueliloj restis sen laboro. Dum kelka tempo, ili provis batali, sed la vaporo estis la plej forta, kaj unu post la alia, kompatinde ! ili ĉiuj estis devigitaj fermi... Ni ne plu vidis veni la etajn azenojn... La belaj muelistinoj vendis siajn orajn krucojn... Ne plu da moskatelo ! ne plu da farandolo !... La mistralo vane blovis, la aloj restis senmovaj... Poste, iun belan tagon, la komunumo detruigis tiujn ĉiujn konstruaĵojn, kaj oni semis sur ilia loko vinberujojn kaj olivujojn.

Tamen, meze de la ruinego, muelejo eltenis kaj daŭris kuraĝe turniĝi sur sia monteto, antaŭ la nazo de la farunistoj. Estis la muelejo de majstro Kurnilo, tiu mem kie ni estas vespere kunsidanta en la momento.

Majstro Kurnilo estis maljuna muelisto, vivanta de sesdek jaroj en la faruno kaj fervora por sia profesio. La instalado de la vapormueliloj igis lin kiel freneza. Dum ok tagoj, oni vidis lin kuri tra la vilaĝo, kunigante homojn ĉirkaŭ li kaj kriante per siaj tutaj fortoj ke oni volis toksa Provencon per la faruno de la fabrikistoj. "Ne iru tien, li diris: tiuj rabistoj, por fari panon, uzas vaporon kiu estas diabla invento, dum mi laboras per la mistralo kaj la tramontano kiuj estas la spirado de la bona Dio..." Kaj li tiel trovis multege da belaj vortoj por la laŭdo de la ventmueliloj, sed neniu aŭskultis ilin.

Tiam, malbonhumore, la maljunulo enfermis sin en sia muelejo kaj tutsole vivis kiel sovaĝa besto. Li eĉ ne volis gardi apud li sian nepinon Vivianaⁿ, dekkvinjaran knabinon, kiu de post la morto de siaj gepatroj, havis nur sian avon en la mondo. La kompatinda etulino estis devigita vivteni sin kaj iom dungigi sin ĉien en la farmoj por la rikoltado, la bombiksoj aŭ la olivplukadoj. Kaj tamen ŝia avo ŝajnis bone ami ŝin, tiun infanon. Ofte okazis al li piediri siajn kvar leŭgojn sub arda suno por iri vidi ŝin ĉe la farmdomo kie ŝi

laboris, kaj kiam li estis apud ŝi, li pasigis plenajn horojn rigardi ŝin plorante...

En la lando oni opiniis ke la maljuna muelisto, forpelante Vivianaⁿ avarece agis; kaj tio ne honoris lin, lasi lian nepinon tiel vagadi de iu bieno al alia, submetita al la sovaĝeco de la superuloj kaj al ĉiuj mizeroj de la junularoj sub kontrakto. Oni ankaŭ trovis tre malbona ke iu fama viro kiel majstro Kurnilo, kaj kiu, ĝis tiam, respektis sin, nun paŝas tra la stratoj kiel vera bohemo, nudpiede, kun truita ĉapo kaj disŝirita lanzono... Fakte dimanĉon, kiam ni vidis lin eniri al la meso, ni hontis pri li, ni la maljunuloj; kaj Kurnilo tiel bone sentis tion ke li ne plu kuraĝis veni sidiĝi sur la ĥoreja benko. Ĉiam li restis funde de la preĝejo, apud la sanktakvujo, kun la malriĉuloj.

En la vivo de majstro Kurnilo, estis io kiu ne estis klara. De longe neniu en la vilaĝo, ne plu alportis al li tritikon, kaj tamen, la aloj de lia muelilo senĉese turniĝis kiel antaŭe... Vespere, oni renkontis sur la vojoj, la maljunan mueliston pelante antaŭ si sian azenon ŝarĝita per dikaj sakoj da faruno.

- Bonan vesperon, majstro Kurnilo! kriis al li la kamparanoj; ĉu do ĝi ankoraŭ glatas, la muelado.

- Ĉiam, miaj infanoj, respondis la maljunulo per vigla mieno. Dank'al Dio, ne estas la laboro kiu mankas al ni.

Tiam se oni demandis al li de kie diable povis veni tiom da laboro, li metis al si fingron sur la lipojn kaj serioze respondis: "ŝit! Mi laboras por la eksportado..." Neniam oni sukcesis pli eltiri de li.

Pri ŝovi la nazon en lian muelejon, necesis tute ne kalkuli kun tio. Eĉ la eta Viviana ne eniris tien...

Kiam oni pasis antaŭe, oni vidis la pordon ĉiam fermita, la dikajn alojn ĉiam moviĝantaj, la maljunan azenon paŝtiĝanta la gazonon de la platformo, kaj grandan malgrasan

katon kiu sunbanis sin sur la fenestrobreto kaj rigardis vin kun malafabla mieno.

Tio ĉio odoris la misteron kaj multe babiladigi ĉiujn. Ĉiu klarigis siamaniere la sekreton de majstro Kurnilo, sed la ĝenerala klaĉo estis ke troviĝis en tiu muelejo ankoraŭ pli da sakoj da eskudoj ol da sakoj da faruno.

Kun la tempo tamen ĉio malkovriĝis, jen kiel :

Dancigante la junularon per mia fifro, mi iam rimarkis ke la plejaĝa el miaj knaboj kaj la eta Viviana enamiĝi unu la alian. Vere mi ne bedaŭris tion, ĉar finfine la nomo de Kurnilo estis honorinda ĉe ni, kaj plie tiu beleta pasereto de Viviana estus plezuriganta min por vidi troti en mia domo. Sed ĉar niaj geamantoj ofte havis la okazon esti kune, mi volis pro timo de akcidentoj, tuj aranĝi la aferon, kaj mi supreniris ĝis la muelejo por iomete paroli pri tio kun la avo... Ha ! la maljuna sorĉisto ! Necesas vidi per kiu maniero li akceptis min ! Neeble malfermigi al li lian pordon. Mi klarigis al li miajn kialojn pli-malpli penige, tra la serurtruo; kaj la tutan tempon kiam mi parolis, estis tiu fripono de magrasa kato kiu spiregis kiel diablo super mia kapo.

La maljunulo ne donis al mi tempon por fini, kaj kriis al mi tre malhoneste reiri al mia fluto; ke se urĝis al mi edzigi mian knabon, mi ja povis iri serĉi knabinojn al la farunfabriko... Sciu ke la sango aperis al mia vizaĝo pro aŭdi tiujn ĉi malbonajn parolojn; sed mi tamen havis sufiĉe da saĝeco por retenigi min, kaj lasante tiun maljunan stultulon al lia muelŝtono, mi revenis sciigi mian seniluziigon al geinfanoj... Ĉi tiuj kompatindaj ŝafidoj ne kapablis kredi tion; ili petis al mi kiel favoro kune ambau supreniri al muelejo por paroli al la avo... Mi ne kuraĝis rifuzi, kaj ek ! jen miaj geamantoj foririntaj.

Ĝuste kiam ili alvenis tie supre, majstro Kurnilo ĵus eliris. La pordo estis duturne ŝlosita; sed la maljuna bonulo,

forirante, lasis sian ŝtupetaron ekstere, kaj tuj la ideo eniri tra la fenestro venis al la geinfanoj, por iom vidi tion kio estis en tiu damnita muelejo...

Stranga afero ! La ĉambro de la muelŝtono estis malplena... Nenia sako, neniu grajno de tritiko; ne la plej malmulta faruno sur la muroj aŭ sur la araneaĵoj... Oni eĉ ne flaris tiun bonan varman odoron de dispremita tritiko kiu bonodorigas en la muelejoj... La ĉefŝafto estis kovrita de polvo, kaj la granda malgrasa kato dormis sur ĝi.

La malsupra ĉambro havis la saman aspekton de mizero kaj de forlaso - malbonan liton, kelkajn ĉifonaĵojn, pecon de pano sur iu ŝtupo de la ŝtuparo, kaj poste en angulo tri aŭ kvar krevitaj sakoj el kie fluis ruboj kaj blanka tero.

Tie estis la sekreto de majstro Kurnilo ! Estis tiu gipsorubo kiun li vespere promenis tra la vojoj, por savi la honoron de la muelejo kaj kredigi ke oni faris tie farunon... Kompatinda muelejo ! Kompatinda Kurnilo ! De longe, la farunistoj deprenis al ili ilian lastan klientaro. La aloj ankoraŭ turniĝis, sed la muelŝtono senefike funkciis.

La geinfanoj revenis larmoplenaj rakonti al mi tion kion ili vidis. Mi havis la koron ŝirita pro aŭdi ilin... Sen perdi minuton, mi kuris al la najbaroj, duvorte diris la aferon al ili, kaj ni konsentis ke necesis tuj alporti al la muelejo Kurnilo la tutan tritikon kiu estis en la domoj... Dirite, farite. La tuta vilaĝo ekvoĵiras, kaj ni alvenas tien supren kun sinsekvo da azenoj ŝarĝitaj de tritiko - vera tritiko, tiu !

La muelejo estis larĝe malfermita... antaŭ la pordo, majstro Kurnilo sidinta sur sako da gipso, ploris, la kapon en siaj manoj. Li ĵus rimarkis, reveninte, ke dum lia foresto, oni eniris en lia hejmo kaj malkovris lian malĝojan sekreton.

- Mi indas kompaton ! li diris. Nun restas al mi nur morti... La muelejo estas malhonorita.

Kaj li plorsingultis ĝis fendi la animon, nomante sian

muelejon per ĉiaj nomoj, parolante al ĝi kiel al reala persono.

Tiumomente, la azenoj alvenas sur la platformon, kaj ni ĉiuj ekkrias tre laŭte kiel dum la bona tempo de la muelistoj :

- Hoj ! de la muelejo !... Hoj ! majstro Kurnilo !

Kaj jen la sakoj kiuj amasiĝas antaŭ la pordo kaj la bela rufa grajno kiu disŝutiĝas surgrunde, ĉien...

Majstro Kurnilo rigardis rondokule. Li prenis tritikon en la kavon de sia maljuna mano kaj diris, samtempe ridanta kaj ploranta :

- Ĝi estas tritiko !... Sinjoro Dio !... Bona tritiko !...

Lasu min ke mi rigardu ĝin.

Poste, turnante sin al ni :

- Ha ! Mi bone sciis ke vi revenus al mi... ĉiuj tiuj farunistoj estas ŝtelistoj.

Ni volis triumfe kunporti lin al la vilaĝo :

- Ne, ne, miaj infanoj; necesas unue ke mi iru por nutri mian muelilon... Sci do ! Estas tiom longe ke ĝi havis nenian mangâĝon !

Kaj ni ĉiuj havis larmojn en la okulojn pro vidi la kompatindan maljunulon barakti dekstren maldekstren, entranĉanta la sakojn, prizorganta la muelŝtonon, dum la grajno dispremiĝis kaj la maldikega polvo de tritiko flugis al la plafono.

Oni devas rekoni niajn meritojn : ekde tiu tago, neniam ni lasis la maljunan mueliston manki da laboro. Poste, iun matenon, majstro Kurnilo mortis, kaj la aloj de nia lasta muelejo ĉesis turniĝi, por ĉiam ĉifoje... Kurnilo morta, neniu anstataŭis lin. Kion vi volas, sinjoro !... Ĉio havas finon en tiu ĉi mondo, kaj necesas kredi ke la tempo de la ventomueliloj estis pasinta kiel tiu de la vojaĝboatoj sur la Rodano, de la parlamentoj kaj de la ĵaketoj kun grandaj floroj.

La Kaprino de S^{ro} Segino.

Al Petro Gringorio, lirika poeto en Parizo.

Vi certe ĉiam estos la sama, mia kompatinda Gringorio !

Kiel ! Oni proponis al vi postenon de kronikisto ĉe bona ĵurnalo de Parizo, kaj vi aŭdacis rifuzi... Sed rigardu vin, plendinda knabo ! Rigardu tiun brustoveston truita, tiujn kalsonŝtrumpojn ruiniĝintaj, tiun vizaĝon malgrasa kiu vidigas malsategon. Jen tamen kie kondukis vin la pasio de belaj rimoj ! Jen tio kiun kostis al vi dek jarojn de lojalaj servoj en la paĝoj de siro Apolo... Ĉu vi finfine ne hontas ?

Faru do vin kronikiston, malsaĝulo ! Faru vin kronikiston ! Vi perlaboros belajn eskudojn sigelitajn de la rozo, vi kutime manĝos ĉe Brebanto, kaj vi povos montri vin okaze de la tagoj de premiero kun nova plumo sur via kapvesto...

Ne ? Ĉu vi ne volas ?... Vi pretendas resti libera laŭ via plaĉo ĝis la fino... Nu, aŭskultu do la rakonton pri la kaprino de S^{ro} Segino. Vi vidos tion kion oni gajnas volante vivi libere.

S^{ro} Segino neniam havis bonŝancon kun siaj kaprinoj.

Li perdis ilin ĉiujn sammaniere : matene ili rompis sian ŝnuron, foriris en la montojn, kaj tie supre la lupo manĝis ilin. Nek la karesoj de ilia mastro, nek la timo de la lupo, nenio por retenigi ilin. Estis, ŝajne, sendependaj kaprinoj ĉiariske volontaj la freŝan aeron kaj liberecon.

La bona S^{ro} Segino, kiu nenion komprenis pri la karaktero de siaj bestoj, estis konsternita. Li diris :

- Estas finita; la kaprinoj enuas ĉe mi, mi gardos ne unu.

Tamen, li ne senkuraĝiĝis, kaj post esti sammaniere perdinta ses kaprinojn, li aĉetis iun sepan; sed tiun fojon, li zorgis preni ĝin tute junan, por ke ĝi pli bone kutimiĝu restadi ĉe li.

Ha ! Gringorio, kiel ĝi estis beleta, la malgranda kaprino de S^{ro} Segino ! Kiel ĝi estis beleta kun sia mildaj okuloj, sia kaprobarbo de suboficiro, siaj nigraj kaj brilaj hufoj, siaj striitaj kornoj kaj siaj longaj blankaj haroj kiu faris al ĝi peltomantelon ! Estis preskaŭ tiel ĉarma kiel la kaprino de Smeralda, ĉu vi rememoras, Gringorio ? - kaj plie, obeema, karesema, lasanta sin melki sen movi, sen meti sian piedon en la pelveton. Ia amo de kaprineto...

S^{ro} Segino havis malantaŭ sia domo gregejon ĉirkaŭitan de kratagoj. Estas tie kie li lokis sian novan pensionaninon. Li alligis ĝin al iu paliso, ĉe la plej bela loko de la herbejo, zorginte lasi al ĝi multe da ŝnuro, kaj de tempo al tempo, li venis vidi ĉu ĝi fartis bone. La kaprino sentis sin tre feliĉa kaj paŝtiĝis la herbon kun tiom da plezuro ke S^{ro} Segino ĝojis.

- Finfine, opiniis la kompatindulo, jen iu kiu ne enuos ĉe mi !

S^{ro} Segino eraris, lia kaprino enuadis.

Iam, ĝi diris al si, rigardante la montaron :

- Kiel oni devas senti sin bone tie supre ! Kiu plezuro kaprioli en la erikejo, sen tiu ĉi malbenita longô kiu skrapvundas al vi la kolon !... Estas bone por la azeno aŭ la bovo paŝtiĝadi en gregejo !... Por kaprinoj, necesas al ili spaco.

Ekde tiu momento, la herbo de la gregejo ŝajnis al ĝi sengusta. La enuo trafis ĝin. Ĝi maldikiĝis, ĝia lakto malabundis. Estis kompatinde vidi ĝin tiri dum la tuta tago sur sia longô, kun la kapo turnita al la montaro, kun la

naztruo malfermita, malgaje blekante beee !...

S^{ro} Segino bone ekrimarkis ke lia kaprino ne bonfartis, sed li ne sciis tion kio tio estis... Iun matenon, dum li finis melki ĝin, la kaprino turnis sin kaj diris al li en sia dialekto :

- Aŭskultu, sinjoro Segino, mi velkiĝis ĉe vi, lasu min iri en la montaron.

- Ha ! Dio mia !... Ankaŭ ĝi ! kriis S^{ro} Segino mireginta, kaj sekve de tio, li lasis fali sian pelveton; poste sidiĝante en la herbo apud sia kaprino :

- Kiel Blanketo, vi volas forlasi min !

Kaj Blanketo respondis :

- Jes, sinjoro Segino.

- Ĉu la herbo mankas al vi ĉi tie ?

- Ho ! Ne ! S^{ro} Segino.

- Eble vi estas alligita tro mallonge; ĉu vi volas ke mi plilongigos la ŝnuron !

- Tio ne estas vana peno, sinjoro Segino.

- Do, kion vi bezonas ! Kion vi volas ?

- Mi volas iri en la montaron, sinjoro Segino.

- Sed, malsaĝulino, vi ne scias ke estas lupoj en la monto... Kion vi faros kiam ĝi alvenos ?...

- Mi donos al li kornbatojn, sinjoro Segino.

- La lupoj fajfas pri viaj kornoj. Ĝi manĝis al mi kaprinojn alie kornitajn ol vi... Vi bone scias, la kompatinda maljuna Rejnaldo kiu estis ĉi tie pasintjare, ĉu ne ? Iu belstatura kaprino, forta kaj malica kiel virkapro. Ĝi batalis kontraŭ la lupoj dum la tuta nokto... poste la lupoj matene manĝis ĝin.

- Nu ja ! Kompatinda Rejnaldo !... Ne gravas, sinjoro Segino, lasu min iri en la montaron.

- Dia boneco..., diris S^{ro} Segino, sed kion do oni faras al miaj kaprinoj ? Ankoraŭ iun kiun la lupoj tuĝ manĝos al mi... Nu, ne... mi savos vin malgraŭ vi, friponetino ! Kaj pro timo

ke vi rompus vian ŝnuron, mi tuj enfermos vin en la stalon, kaj vi ĉiam restados tie.

Post tio, S^{ro} Segino kunprenis la kaprion en stalon tute malluma, kies li duturne ŝlōsis la pordon. Bedaŭrinde, li forgesis la fenestron, kaj apenaŭ li turnis la dorson, ke la etulino foriris...

Ĉu vi ridas, Gringorio ? Evidente ! Mi bone certas; vi ja partianiĝas kun la kaprinoj, kontraŭ ĉi tiu bona S^{ro} Segino... Ni vidos ĉu vi baldaŭ ridos.

Kiam la blanka kaprino alvenis en la monton, estis ĝenerala entuziasmo. Neniam la maljunaj abioj vidis ion tiel belan. Oni akceptis ĝin kiel reĝineton. La kaŝtanoj kliniĝis ĝis tero por karesi ĝin per siaj branĉopintoj. La oraj genistoj flankiĝis antaŭ ĝia irado, kaj bonodoris tiom kiom ili povis. La tuta monto festis ĝin.

Pensu, Gringorio, kiel nia kaprino estis feliĉa ! Ne plu da ŝnuro, ne plu da paliso... nenio kiu malhelpis ĝin kaprioli, laŭplaĉe paŝtiĝi... Estas tie kie la herbo troviĝis ! Ĝis super la kornoj, mia kara !... Kaj kia herbo ! Suka, delikata, dentumita, farita el mil plantoj... Estis tute alia afero ol la gazono de la gregejo. Kaj la floroj do !... Grandaj bluaj kampanuloj, purpuraj digitaloj kun longaj kalikoj, tuta multego da sovaĝaj floroj plenplenaj de ebriigaj sukoj !...

La blanka kaprino, duonebria, lacertumis en ili kun la kruroj supren kaj ruliĝis laŭlonge de la deklivaĵoj, pelmele kun la falintaj folioj kaj la kaŝtanoj... Poste, per unu salto, ĝi subite restariĝis sur siaj kruroj. Hop ! Jen ĝi foriranta, kapantaŭe, tra la makisoj kaj la buksejoj, jen ĉe la kresto, jen funde de ravino, tie supre, tie malsupre, ĉie ... Oni estus diranta ke estis dek kaprinoj de S^{ro} Segino en la montaro.

Estas ĉar ĝi timis nenion, la Blanketo.

Ĝi transsaltis dikajn torentojn kiuj dum-ire surŝprucis ĝin per malseka polvo kaj ŝaŭmo. Tiam, tute fluetanta, ĝi iris

kuŝiĝi sur kelka plata roko kaj sekigis sin per la suno...
Iufoje, irante al rando de altebenaĵo, kun floro de citizo
inter la dentoj, ĝi ekvidis malsupren, tute malsupren en la
ebenaĵo, hejmon de S^{ro} Segino kun la gregejo malantaŭe. Tio
ridigis ĝin ĝis larmoj.

- Kiel tio estas malgranda ! ĝi diris, kiel mi sukcesis ene
elteni ?

Malsaĝulineto ! Pro vidi sin tiel alte lokinta, ĝi kredis
sin almenaŭ tiel granda kiel la mondo...

Entute, estis bona tago por kaprino de S^{ro} Segino.
Ĉirkaŭ la mezo de la tago, kurante desktren kaj maldesktren,
ĝi renkontis aron da ĉamoj krakmaĝantaj lambruskon kun
bona apetito. Nia eta vagulino kun blanka felo sensaciis. Oni
donis al ĝi la plej bonan lokon ĉe la lambrusko, kaj ĉiuj tiuj
sinjoroj estis tre galantaj... Ŝajnas eĉ - tio devas resti inter
ni, Gringorio - ke juna ĉamo kun nigra felo, havis bonan
fortunon plaĉi al Blanketo. Ambaŭ geamantoj flankeniĝis
inter la arbaro dum unu aŭ du horoj, kaj se vi volas scii tion
kion ili diris inter si, iru demandi tion al la babilemaj fontoj
kiuj nevideble diskuras en la musko.

Subite la vento malvarmetiĝis. La monto iĝis viola; estis
la vespero...

- Jam ! diris la kaprineto; kaj ĝi haltis tre
konsterniĝinta.

Sube, la kampoj dronis en la brumo. La gregejo de S^{ro}
Segino malaperis en la nebulo, kaj pri la dometoj, oni ankoraŭ
vidis nur la tegmenton kun iom da fumo. Ĝi aŭskultis la
tintiloj de iu brutaro kiun oni revenigis, kaj ĝia animo sentis
sin tute malĝoja... Iu ĉasfalko kiu revenis, preterpasante
flugtuŝis ĝin per siaj flugiloj. Ĝi ekstremis... poste estis
blekado en la montaro :

- Hu ! Hu !

Ĝi pensis pri la lupo; dum la tuta tago, la frenezulino ne

pensis pri ĝi... Samtempe korno sonoris tre for en la valo.
Estis tiu bona S^{ro} Segino kiu provis lastan klopodon.

- Hu ! Hu !... faris la lupu.

- Revenu ! Revenu !... kriegis la korno.

Blanketo deziris reveni; sed memorante la palison, la ŝnuron, la heĝon de la gregejo, ĝi opiniis ke nun ĝi ne plu povis kontentiĝi per tiu vivo kaj ke pli bone taŭgas resti.

La korno ne plu sonoris...

La kaprino aŭdis malantaŭ si, bruon de folioj. Ĝi turnis sin kaj ekvidis en la ombro du mallongajn orelojn, tute rektajn, kun du okuloj kiuj brilis... Estis la lupu.

Enorma, senmova, sidanta sur sia postaĵo, ĝi estis tie rigardante la blankan kaprineton kaj anticipe gustumante ĝin. Ĉar li bone sciis ke li manĝos ĝin, la lupu ne rapidis; nur kiam ĝi turnis sin, ĝi malafable ekridis.

- Ha ! Ha ! la kaprineto de S^{ro} Segino ! kaj li pasigis sian dikan ruĝan langon sur siaj spongecaj lipegoj.

Blanketo sentis sin perdinta... Dum momento, rememorante la historion de la maljuna Rejnalda kiu batalis la tutan nokton por esti manĝita matene, ĝi diris al si ke eble valorus pli bone lasi sin tuj manĝi; poste ŝanĝinte sian opinion, ĝi ekgardis sin kun la kapo malsupren kaj la korno antaŭen kiel kuraĝa kaprino de S^{ro} Segino kiun ĝi estis... Ne ĉar ĝi havis la esperon mortigi la lupon - la kaprinoj ne mortigas la lupon - sed nur por vidi ĉu ĝi povus elteni tiom longe kiom la Rejnalda...

Tiam la monstro antaŭenpaŝis, kaj la malgrandaj kornoj komencis regali per batoj.

Ha ! la kuraĝa kaprineto, kiel ĝi tutkore batalis ! Pli ol dek fojojn, mi ne mensogas, Gringorio, ĝi devigis la lupon retropaŝi por reakiri la spiron. Dum ĉi tiuj paŭzoj je unu minuto, la frandemulino haste plukis ankoraŭ iun tigon el sia kara herbo; poste ĝi reiris al la lukto, kun la buŝo plena... Tio

daŭris la tutan nokton. De tempo al tempo, la kaprino de S^{ro} Segino rigardis danci la stelojn en la hela ĉielo, kaj ĝi diris al si :

- Ho ! nur ke mi eltenu ĝis la tagiĝo...

Unu post la alia, la steloj estingiĝis. Blanketo duobligis la kornobatojn, la lupo la dentobatojn... Pala lumeto aperis ĉe la horizonto... La kanto de iu raŭka koko leviĝis el iu farmbieno.

- Fine ! diris la kompatinda besto, kiu nur atendis la tagon por morti; kaj ĝi kuŝiĝis sur la tero en sia bela blanka felo tute makulita de sango...

Tiam la lupo ĵetis sin sur la kaprineto kaj manĝis ĝin.

Adiaŭ, Gringorio !

La rakonto kiun vi aŭdis ne estas fabelo el mia invento. Se iam vi venos en Provencon, niaj kampokulturistoj ofte parolos al vi de kaprino de S^{ro} Segino kiu batalis dum la tuta nokto kun la lupo, kaj poste en la mateno, la lupo manĝis ĝin.

Vi bone aŭdas min, Gringorio : Kaj poste en la mateno, la lupo manĝis ĝin.

La Steloj.

rakonto de Provenca paŝtisto.

El la tempo kiam mi gardis la bestojn sur **Luberono**, mi restadis dum plenaj semajnoj sen vidi eĉ unu animo, sola en la paŝtejo kun mia hundo Labri kaj mia ŝafaro. De tempo al tempo la ermito de la Monteto-de-Uro trapasis tie por serĉi kuracherbojn, aŭ mi videtis la nigran vizaĝon de kelka Piemonta karbisto; sed ili estis naivaj homoj, silentemaj pro multe da soleco, estantaj perdintaj la inklinon paroli kaj sciantaj nenion pri tio kio estis dirita malsupre en la vilaĝoj kaj la urboj. Tial, ĉiujn dek kvin tagojn, kiam mi aŭdis sur la irejo kiu supreniris, la tintadojn de la mulo de nia farmejo alportanta al mi la dusemajnajn proviantojn, kaj ke mi vidis iom post iom aperi super la deklivo, la viglan kapon de la juna bienservisto aŭ la rufan kufon de la maljuna onklino Norada, mi vere estis tre feliĉa. Mi rakontigis al mi la novaĵojn de la lando de malsupre, la baptojn, la geedziĝojn; sed tio kio ĉefe interesis min, estis scii tion kio iĝis la filino de miaj mastroj, nia fraŭlino Stefanieta, la plej beleta kiu troviĝis en dek leŭgoj ĉirkaŭe. Sen ŝajni tro interesiĝi pri ŝi, mi informiĝis ĉu ŝi ofte iris al festoj, al vesperkunvenoj, ĉu ankoraŭ venis al ŝi novajn galantulojn; kaj al tiuj kiuj demandos al mi tion kion tiuj aferoj povis fari al mi ja, malriĉa ŝafisto de la monto, mi respondos ke mi estis dudekjara kaj ke tiu Stefanieta estis la plej belulino kiun mi vidis en mia vivo.

Nu, iun dimanĉon dum mi atendis la dusemajnajn proviantojn, okazis ke ili alvenis nur tre malfrue. Matene, mi diris al mi : "estas la kulpo de la kantmeso"; poste ĉirkaŭ tagmezo, venis grava fulmotondro, kaj mi opiniis ke la mulo

ne povis ekvojiri pro la malbonstato de la vojoj. Fine, ĉirkaŭ la tria, la ĉielo estanta senkolora, la monto brilanta pro akvo kaj suno, mi aŭdis inter la elgutado de la folioj kaj la superbordiĝo de la ŝvelintaj rojoj, la tintadojn de la mulo, tiel gajajn, tiel viglajn kiel grandan sonoradon de sonoriloj ĉe iu Paska tago. Sed ne estis la juna bienservisto nek la maljuna Norada kiu kondukis ĝin. Estis... divenu kiu !... nia fraŭlino, miaj infanoj ! nia fraŭlino mem, rekte sidanta inter la sakoj el vimeno, tute roza pro la montara aero kaj pro la ŝtorma malvarmetiĝo.

La servisto estis malsana, onklino Norada ferias ĉe siaj infanoj. La bela Stefanieta sciigis tion ĉion al mi, desaltante de sia mulo, kaj ankaŭ ke ŝi malfrue alvenis ĉar ŝi perdiĝis sur la vojo; sed vidi ŝin tiel bele festovestita, kun ŝia rubando kun floroj, ŝia brila jupo kaj ŝiaj puntaĵoj, ŝi aspektis plivole esti malrapidema ĉe kelka danco, ol esti serĉanta sian vojon en la veprejoj. Ho la ĉarma estulino ! Miaj okuloj ne povis laciĝi rigardi ŝin. Estas vere ke mi neniam vidis ŝin tiel proksime. Kelkfoje vintre, kiam la brutaroj estis alkondukitaj en la ebenaĵon, kaj kiam mi vespere revenis al la bienodomo por vespermanĝi, ŝi vigle trairis la ĉambron, sen multe paroli kun la servantoj, ĉiam tualetinta kaj iom fieraa... Kaj nun, mi havis ŝin tie antaŭ mi, nur por mi; ĉu ne estis por perdi la saĝon ?

Kiam ŝi estis eltirinta la proviantojn el la korbo, Stefanieta komencis scivoleme rigardi ĉirkaŭ si. Iom levante sian belan jupon de festo kiu povintus difektiĝi, ŝi eniris en la parcelon, volis vidi la lokon kie mi kuŝiĝis, la pajlan kuŝejon kun la ŝaffelo, mian grandan mantelon alkroĉita sur la muro, mian ŝafbastonon, mian silican muskedon. Ĉiu tiu amuzis ŝin.

- Do estas ĉi tie kie vi loĝas, mia kompatinda ŝafisto ! Kiel vi devas enuegi ĉiam esti sola ! Kion vi faras ? Pri kio vi pensas ?...

Mi emis respondi : "Pri vi, mastrino", kaj mi ne mensogintus; sed mia konfuzo estis tiel intensa, ke mi ne sukcesis trovi nur iun vorton. Mi vere kredas ke ŝi ekrimarkis tion, kaj ke la friponino plezuris duobligi mian embarason per siaj malicaĵoj :

- Kaj via koramikino, ŝafisto, ĉu ŝi kelkfoje suprenvenas viziti vin ?... Tutcerte ŝi devas esti la **ora kaprino** aŭ tiu feino **Esterela** kiu kuras nur sur la pinto de la montaroj...

Kaj ŝi mem, parolante al mi, vere ŝajnis tiu feino Esterela, kun beleta rido de sia vizaĝo malantaŭen klinita kaj sia hasto por foriri kiu faris pri ŝia vizito ian vizion.

- Adiaŭ, ŝafisto.

- Saluton, mastrino.

Kaj jen ŝi foririnta, kunportanta ŝiajn malplenajn korbojn.

Kiam ŝi malaperis sur la dekliva vojeto, ŝajnis al mi ke la ŝtonetoj ruliĝantaj sub la hufoj de la mulo, falis unu post alia sur mian koron. Mi longtempe, longtempe aŭdis ilin; kaj ĝis la fino de la tago, mi restis kiel dormema, ne riskante moviĝi, pro timo svenigi mian revadon. Ĉirkaŭ la vespero, dum la fundo de la valoj komencis bluiĝi kaj dum la bestoj beante kunpremiĝis unu kontraŭ la alia por reiri al la parcelo, mi aŭdis ke oni vokis min de la deklivo, kaj mi vidis aperi nian fraŭlinon, ne plu rideman kiel antaŭ nelonge, sed tremantan pro malvarmo, pro timo, pro malsekiĝo. Ŝajnis ke malsupre de la deklivo, ŝi trovis la **Sorgeon**^[7] ŝvelita pro la pluvego, kaj ke volante plenforte transpasi ĝi preskaŭ dronis. Tio kio estis terura, estas ke je tiu nokta horo, necesis ne plu kalkuli reiri al la farmodomo; ĉar tra la kromvojo, nia fraŭlino neniam kapablis sin orienti tutsole, kaj mi ne povis forlasi la brutaron. Tiu ideo de tranokti sur la monto multe turmentis ŝin, ĉefe pro la maltrankvilo de siaj. Mi ja trankviligis ŝin

7 Mi ne trovis bonan tradukon. France "Sorgue", ĝi estas Provenca rivero.

kiel eble plej bone :

- Dum julio, la noktoj estas mallongaj, mastrino... Estas nur malbona momento.

Kaj mi rapide ekbruligis grandan fajron por sekigi ŝiajn piedojn kaj ŝian robon tute trempita de akvo de Sorgeo^[7].

Poste, mi alportis antaŭ ŝi, lakton, fromaĝojn; sed la kompatinda etulino zorgis nek varmiĝi nek manĝi, kaj vidante la larmegojn kiu invadis ŝiajn okulojn, ankaŭ mi ja emis plori.

Tamen la plena nokto kreskis. Restis sur la kresto de la montaroj nur eroj da suno, vaporo de lumo direkte al la okcidento. Mi volis ke nia fraŭlino eniris ripozi en la parcelo. Estante sterninta sur freŝa pajlo belan tutnovan felon, mi deziris al ŝi bonan nokton, kaj iris sidiĝis eksteren antaŭ la pordo... Dio estas mia atestanto ke malgraŭ la amfajro kiu bruligis al mi la sangon, nenia malbona penso venis al mi; nur granda fiereco scii ke en iu angulo de la parcelo, tute proksime de la scivolema ŝafaro kiu rigardis ŝin dormi, la filino de miaj mastroj - kiel ŝafino pli karega kaj pli blanka ol ĉiuj aliaj - ripozis, konfidita al mia protektado. Neniam la ĉielo ŝajnis al mi tiel profunda, la steloj tiel brilaj... Subite la barilo de la parcelo malfermiĝis kaj la bela Stefanieta aperis. Ŝi ne sukcesis dormi. La bestoj moviĝante bruetigis la pajlon, aŭ ŝafblekis pro siaj songoj. Ŝi pli bone ŝatis veni apud la fajron. Vidinte tion, mi ĵetis al ŝi mian ŝafofelon sur la ŝultrojn, mi plivigliĝis la flamon, kaj ni restis sidantaj unu apud la alia sen paroli. Se vi iam tranoktis sub libera ĉielo, vi scias ke ĉe la horo kiam ni dormas, mistera mondo vekigigas en la soleco kaj la silento. Tiam la fontoj kantas multe pli klare, la lagetoj vivigas flametojn. ĉiuj montspiritoj libere iras kaj reiras; kaj estas en la aero flugtuŝoj, nepercepteblaj bruoj kvazaŭ oni aŭdis la branĉojn kreski, la herbon multiĝi. Dum tago, estas la vivo de la estaĵoj; sed dum nokto, estas la vivo de la aĵoj. Kiam oni ne kutimiĝas al tio, tio timigas... Tial nia

fraŭlino estis tute tremetanta kaj algluiĝi ŝin kontraŭ mi ĉe la plej eta bruo. Iufoje, longa melankolia krio, deirinta el la lageto kiu brilis pli malsupre, grimpis al ni ondadante. Sammomente bela falstelo preterglitis super niaj kapoj al la sama direkto, kvazaŭ tiu plendo kiun ni ĵus aŭdis kunportis lumon kun si.

- Kio tio estas ? Stefanieta mallaŭte demandis al mi.

- Animo kiu eniras en la paradizon, mastrino, kaj mi faris la krucosignon.

Ŝi ankaŭ krucosignis sin, kaj staris dum momento kun la kapon supren, tre meditanta. Poste ŝi diris al mi :

- Ĉu do estas vere, paŝtisto, ke vi ja estas sorĉistoj ?

- Tute ne, nia fraŭlino. Sed ĉi tie ni vivas pli proksime de la steloj, kaj ni scias tion kio okazas tie pli bone ol homoj de la ebenaĵo.

Ŝi denove rigardis supren, kun kapo apogita en la mano, ĉirkaŭita de la ŝafofelo kiel negrava ĉiela paŝtisto :

- Kiel ili estas nombraj ! Kiel estas bele ! Mi neniam vidis tiom da ili... Ĉu vi scias iliajn nomojn, ŝafisto ?

- Sed jes, mastrino... Nu ! Ĝuste super ni, jen la Vojo de Sankta Jakobo (la Lakta Vojo). Ĝi iras de Francio rekte al Hispanio. Estis Sankta Jakobo de Galegio kiu traceis ĝin por montri sian vojon al la brava Karolo la Granda, kiam li militis kontraŭ la saracenoj. Pli for, vi havas la Ĉaron de la Animoj (la Grandan Ursinon) kun ĝiaj kvar splendaj radaksoj. La tri steloj kiuj troviĝas antaŭe, estas la Tri Bestoj, kaj tiu eteta kontraŭ la tria estas la ĉaristo. Ĉu vi vidas ĉie ĉirkaŭe tiun pluvon da steloj kiu falas ? Ili estas la animoj kiujn la bona Dio ne volas ĉe li... Iom pli suben, jen la Rastilo aŭ la Tri Reĝoj (Oriono). Estas tiu kiu utilas al ni kiel horloĝo, al ni ja. Nur rigardante ilin, mi nun scias ke estas iom post noktomezo. Iom pli suben, ĉiam pli suden, brilas Johano de Milano, la lumilo de la astroj (Siriuso). Pri tiu stelo, jen tio

kion la paŝtistoj rakontas. Ŝajnas ke iu nokto Johano de Milano, kun la Tri Reĝoj kaj la Kokidetejo (la Plejadoj), estis invititaj al la geedziĝofesto de iu stelo el siaj amikinoj. La Kokidetejo, pli urĝema, foriris laŭdire la unua kaj sekvis la altan vojon. Rigardu ĝin tien supren, tute funde de la ĉielo. La Tri Reĝoj trairi pli suben kaj reatingis ĝin; sed tiu pigrulo de Johano de Milano, kiu dormis tro malfrue, restis tute malantaŭe, kaj por haltigi ilin, furioze ĵetis al ili sian bastonon. Tial la Tri Reĝoj ankaŭ nomiĝas la Bastono de Johano de Milano... Sed la plej bela el ĉiuj steloj, mastrino, estas la nia, estas la Matenstelo^[8], kiu lumigas nin ĉe la mateniĝo, kiam ni elirigas la ŝafaron, kaj ankaŭ vespere, kiam ni enirigas ĝin. Ni ankaŭ nomas ĝin **Magalona**, la bela Magalona kiu postkuras Petron de Provenco (Saturno) kaj edziniĝas kun ĝi ĉiujn sep jarojn.

- Kiel ! paŝtisto, ĉu do ekzistas stelaj geedziĝoj ?

- Sed jes, mastrino.

Kaj dum mi provis klarigi al ŝi tion kio estis ĉi tiuj geedziĝoj, mi sentis ion freŝa kaj delikata malpeze surpremi mian ŝultron. Estis ŝia kapo peziĝinta pro dormemo kiu sin apogis kontraŭ mi kun beleta susurado de rubandoj, punktoj kaj ondumitaj haroj. Ŝi tiel restadis sen moviĝi ĝis la momento kiam la astroj de la ĉielo paliĝis, forviŝitaj de la tago kiu kreskis. Mi ja rigardis ŝin dormi, iom konfuza funde de mia estado, sed sankte protektita de tiu ĉi hela nokto kiu ĉiam donis al mi nur belajn pensojn. Ĉirkaŭ ni, la steloj daŭrigis sian silentan iradon, obeemaj kiel granda grego; kaj de tempo al tempo mi imagis ke unu el tiuj steloj, la plej fajna, la plej brila, perdiĝinte sian vojon, venis surflugi sur mian ŝultron por dormi...

8 Tradukita laŭvorte el franca, estas la Paŝtistostelo, vulgara nomo de Venuso.

La Arlezanino.

Por iri al la vilaĝo, malsuprenirante de mia muelejo, oni pasas antaŭ kampodomo konstruita apud la vojo funde de granda korto plantita de celtidoj. Tiu estas la vera hejmo de la kampkulturisto de Provenco, kun siaj ruĝaj tegoloj, sia larĝa bruna fasado neregule tratruita, poste tute supre la ventmontrilo de la subtegmento, la pulio por hisi la pajlamasojn, kaj kelkaj tufoj da bruna fojno kiu transpasas...

Kial tiu ĉi domo impresis min ? Kial tiu ĉi fermita portalo premis al mi la koron ? Mi ne kapablas diri tion, kaj tamen tiu ĉi loĝejo frostotremigis min. Estis ĉirkaŭe tro da silento... Kiam oni preterpasis, la hundoj ne bojis, la numidoj fuĝis sen bleki... Interne, nenia voĉo ! Nenio, ne eĉ tintilo de mulo... Sen la blankaj kurtenoj de la fenestroj kaj la fumo kiu altiĝis de la tegmentoj, oni kredintus lokon neloĝata.

Hieraŭ, ĉe la horbato de tagmezo, mi revenis de la vilaĝo, kaj por eviti la sunon, mi laŭiris laŭ la muroj de la bieno, en la ombro de la celtidoj... Sur la vojo, antaŭ la kampodomo, silentaj bienservistoj elfinis ŝarĝi ĉareton da fojno... La portalo estis lasita malferma. Mi ekrigardis preterpasante kaj mi vidis funde de la korto, kubutapogante sin - kun kapo en la manoj - sur larĝa tablo el ŝtono, grandan tute blankan maljunulon, kun tro mallonga jako kaj dispecigita kuloto... Mi ekhaltis. Unu el la viroj tute mallaŭte diris al mi :

- Ŝŝ ! estas la mastro... Li tiel estas ekde la sortobato de sia filo.

Tiumomente virino kaj knabeto, nigre vestintaj, preterpasis apud ni kun dikaj oritaj parohanoj kaj eniris en

la farmodomon.

La viro aldonis :

- ...La mastrino kaj Kadeto kiuj revenas de la diservo.

Ili iras tien ĉiutage, ekde kiam la infano mortiĝis... Ha !
Sinjoro, kia senkonsolaco... La patro ankoraŭ surmetas la
vestaĵojn de la mortinto; oni ne povas forlasigi ilin de li... Dia
Hot^[9] la besto !

La ĉareto ekmoviĝi por foriri. Mi, kiu volis scii pli, mi
petis al la ĉaristo por surgrimpi apud li, kaj estas tie supre,
en la fojno, ke mi ekaŭdis tiun tutan korpreman rakonton...

Li nomiĝis Johano. Estis admirinda dudekjara
kamparano, saĝa kiel knabino, solida, kun afabla vizaĝo. Ĉar
li estis tre bela, la virinoj rigardis lin; sed li havis nur unu en
kapo - iu eta Arlezanino, tute el veluro kaj el punktoj, kiun li
unufoje renkontis sur la korso de Arlezo. En la kampodomo,
oni unue ne vidis tiun amaferon kun plezuro. La knabino esti
rigardata kiel koketulino, kaj ŝiaj gepatroj ne estis de la
lando. Sed Johano insiste volis sian Arlezaninon. Li diris :

- Mi mortos se oni ne donas ŝin al mi.

Necesis travivi tion. Oni decidis geedzigi ilin post la
rikolto.

Do iun vesperan dimanĉon, en la korto de la kampodomo,
la familio finis vespermanĝi. Preskaŭ estis geedziĝa manĝo.
La fianĉino ne ĉeestis, sed oni senĉese trinkis je ŝia honoro...
Iu viro prezentis sin ĉe la pordo kaj per voĉo kiu tremis,
petis paroli al mastro Stefano, al li sole. Stefano ekstariĝis
kaj eliris sur la vojon.

- Mastro, diris al li la viro, vi estas edzigonta vian
infanon al ia friponino kiu estis mia amatino dum du jaroj.
Tio kion mi antaŭenmetas, mi pruvas ĝin : jen leteroj... La
gepatroj scias ĉion kaj fianĉinigi ŝin al mi; sed ekde kiam via

9 Ekkrio de ĉaristo destinita por turnigi la tirbestojn "Dia" maldekstren, "Hot" dekstren.
NB : La unua Hot antaŭenigas la tirbestojn.

filo deziregas ŝin, nek ili nek la belulino plu volas min... Mi tamen estus kredanta ke post tio, ŝi ne povus esti la edzino de iu alia.

- Estas bone ! diris mastro Stefano kiam li estis rigardinta la leterojn; eniru trinki glason da moskatelo.

La viro respondis :

- Dankon ! Mi havas pli da ĉagreno ol da soifo.

Kaj li foriris.

La patro senemocie eniris; li reakiris sian lokon ĉe la tablo; kaj la manĝo gaje finiĝis...

Tiuvespere, mastro Stefano kaj lia filo foriris kune en la kampojn. Ili restis longtempe ekstere; kiam ili revenis, la patrino ankoraŭ atendis ilin.

- Edzino, diris la kampkulturisto, alportante al ŝi ŝian filon, brakumu lin ! li estas malfeliĉa...

Johano ne plu parolis pri la Arlezanino. Li tamen ankoraŭ amis ŝin, kaj eĉ pli ol antaŭe, de kiam oni montris ŝin al li en la brakoj de la alia. Sed li estis tro fiera por diri ion; estas tio kio mortigis lin, kompatinda infano !... Kelkfoje li pasigis tutajn tagojn sola en iu angulo, sen moviĝi. Aliajn tagojn, li furioze eklaboris en la kampoj, kaj sole plenumis la laboron de dek taglaboristoj... Ĉe la vesperiĝo, li ekvojiris al Arlezo kaj paŝis antaŭ si ĝis li vidis kreski en la krepusko la akrapintajn spajrojn de la urbo. Tiam li revenis. Neniam li iris pli for.

Pro tiel vidi lin, ĉiam malĝoja kaj sola, la homo de la kampodomo ne plu sciis kion fari. Oni antaŭtimis malfeliĉon... Iufoje, ĉe la tablo, lia patrino rigardante lin per plenlarmaj okuloj, diris al li :

- Nu ja ! Aŭskultu, Johano, se vi tamen volas ŝin, ni donos ŝin al vi...

La patro, ruĝa pro honto, mallevis la kapon...

Johano kapneis kaj eliris...

Ekde tiu tago, li ŝanĝis sian vivmanieron, ŝajnigante esti ĉiam gaja, por trankviligi siajn gepatrojn. Oni revidis lin ĉe la balo, en la drinkejo, en la brulstampadaj festoj. Dum la balotado de Fonviej, estis li kiu kondukis la farandolon.

La patro diris : "Li estas resaniĝinta". La patrino ja ankoraŭ timis kaj pli ol iam priatentis sian infanon... Johano kuŝiĝis kun Kadeto, apud la bombiksejo; la kompatinda maljunulino starigigis al si liton apud ilian dormoĉambron... La bombiksoj povis bezoni ŝin dum la nokto.

Okazis la festo de Sankta Eloĝo, patrono de kampokulturistoj.

Granda ĝojo en la kampodomo... Estis Novkastelo^[10] por ĉiuj kaj kuirita vino kvazaŭ ĝi verŝiĝus. Poste petardoj, fajroj sur la kampo, koloraj lanternoj plena je la celtidoj... Vivu Sankta Eloĝo ! Ni dancis farandolojn ĝis laciĝo. Kadeto bruligis sian novan kitelon... Johano mem ŝajnis kontenta; li volis dancigi sian patrinon; la kompatinda virino ploris pro feliĉo.

Noktomeze, ni enlitiĝis. Ĉiuj bezonis dormi... Johano, li ne dormis. Kadeto rakontis poste, ke dum la tuta nokto, li plorsingultis... Ha ! Mi asertas al vi ke li estis tre enamiĝinta, tiu...

La morgaŭon ĉe la tagiĝo, la patrino aŭdis iun transiri ŝian ĉambron kurante. Ŝi ricevis kiel antaŭsenton :

- Johano, ĉu estas vi ?

Johano ne respondis; li jam estis en la ŝtuparo.

Rapide, rapide, la patrino ellitiĝis :

- Johano, kien vi iras ?

Li supreniris al la subtegmento; ŝi grimpis malantaŭ li :

- Mia filo, pro la ĉielo !

Li fermis la pordon kaj enŝovis la riglilon.

10 Franca Rodana vino originale nomita "Château-Neuf".

- Johano, mia Joĉjo, respondu al mi. Kion vi estas faronta ?

Blindopalpe, per siaj maljunaj manoj kiuj tremis, ŝi serĉis la klinkon... Iu fenestro kiu malfermiĝis, la bruo de korpo sur la pavimon de la korto, kaj estis ĉio...

Li diris al si, la kompatinda infano, "mi tro amas ŝin... Mi foriras..." Ha ! Mizeraj koroj kiujn ni estas ! Tamen estis iom tro ke la malestimo ne kapablis mortigi la amon...

Tiun matenon, la homoj de la vilaĝo demandis sin, kiu povis tiel kriegi, tie direkte al la kampodomo de Stefano...

Estis en la korto antaŭ la tablo el ŝtono, kovrita de roso kaj sango, la patrino tute nuda kiu lamentis kun sia infano mortinta en siaj brakoj.

La Mulino de la Papo.

El ĉiuj beletaj popoldiroj, proverboj aŭ sentencoj kies niaj kamparanoj de Provenco pasamentas siajn paroladojn, mi ne scias iun pli pitoreskan aŭ pli strangan ol tiun ĉi. Ĝis dek kvin leŭgoj ĉirkaŭ mia muelejo, kiam oni parolas pri homo venĝema, malpacema, oni diras : "Tiu homo ! Priatentu !... Li estas kiel la papa mulino kiu gardas dum sep jaroj sian piedbaton".

Mi longege serĉis de kie ĉi tiu proverbo povis deveni, tion kio estis tiu papa mulino, kaj tiu piedbato ŝparita dum sep jaroj. Neniu ĉi tie povis informi min pri tio, ne eĉ Franseto Mamajo, mia ludanto de fifro, kiu tamen parkere konas sian legendan Provencon. Franseto opinias kiel mi ke estas sub tio ia antikva kroniko de la lando de Avinjono; sed li neniam aŭdis alimaniere paroli pri tio ol per la proverbo...

- Vi trovos tion nur en la biblioteko de la Cikadoj, diris al mi ridante la maljuna fifristo.

La ideo ŝajnis al mi bona, kaj ĉar la biblioteko de la Cikadoj estas tute proksime, mi iris enfermi min tien dum ok tagoj.

Estas mirinda biblioteko, mirige aranĝita, tage kaj nokte disponigita al poetoj, kaj administrita de malgrandaj bibliotekistoj kun cimbaloj^[11] kiuj senĉese muzikas por vi. Mi tie pasigis kelkajn ĝuoplenajn tagojn, kaj post iu semajno de esplorado - taskita al mi - mi fine eltrovis tion kion mi volis, tio estas la rakonto pri mia mulino kaj pri tiu fama piedbato detenita dum sep jaroj. La fabelo estas beleta kvankam iom naiva, kaj mi tuj provos diri ĝin al vi tiel kiel mi hieraŭ matene legis ĝin en manuskripto je tempokoloro kiu

11 Mi ne komprenas kion iu cimbalo faras en biblioteko ??? ĉu estas provenca esprimo ???

bonodoris la sekan lavendon kaj havis grandajn filandrojn kiel paĝosignojn.

Tiu kiu ne vidis Avinjonon dum la tempo de la papoj, nenion vidis. Pri gajeco, vikleco, entuziasmo, sinsekvo da festoj, nenie simila urbo. Estis, de mateno ĝis vespero, procesioj, pilgrimadoj, stratoj surŝutitaj de floroj, tapiŝitaj de altvarpaj teksaĵoj; alvenadoj de kardinaloj per la Rodano, flagrubandoj en la vento, galeroj flagitaj; la soldatoj de la Papo kiuj latine kantis sur la placoj; la knariloj de la almozpetaj fratoj; poste desupre malsupren, domoj kiuj zumante amasiĝis ĉirkaŭ la granda papa palaco kiel abeloj ĉirkaŭ sia abelujo. Estis ankoraŭ la tiktakadoj de la puntmaŝinoj, la iroreiro de la navedoj teksantaj la oron de la kazubloj, la malgrandaj marteloj de la cizelistoj de buretoj, la sontabuloj kiujn oni alĝustigis ĉe la liutfaristoj, la kantikoj de la varpistinoj. Super tio, la bruo de la sonoriloj kaj ĉiam kelkaj tamburinoj kiujn ni aŭdis zumi tie direkte al la ponto. Ĉar ĉe ni, kiam la popolo estas feliĉa, necesas ke ĝi dancas, necesas ke ĝi dancas; kaj ĉar en tiu tempo la urbostratoj estis tro mallarĝaj por la farandolo, fifroj kaj tamburinoj lokis sin sur la ponto de Avinjono, sub la freŝa vento de la Rodano, kaj tago kaj nokto oni dancis tie, oni dancis tie... Ha! la feliĉa tempo! la feliĉa urbo! Halebardoj kiuj ne tranĉis, ŝtataj malliberejoj kie oni metis la vinon por malvarmetiĝi. Neniam malsatego, neniam milito... Jen kiel la Papoj de la Grafejo kapablis regi sian popolon; jen kial ilia popolo tiom bedaŭris ilin!...

Ĉefe estis iu, iu bona maljunulo, kiun oni nomis Bonifacoⁿ... Ho! tiu, kiom da larmoj oni verŝis en Avinjono kiam li mortis! Li estis tiom kompleza, tiom afabla princo! Li tiel bone ridis al vi de supre sia mulino! Kaj kiam vi preterpasis apud li - ĉu vi estas malriĉa simpla elradikigisto de rubioj, ĉu la alta ŝtatoficisto de la urbo - li tiom ĝentile

donis al vi sian benon ! Iu vera Papo de Iveto, sed Iveto de Provenco, kun subtilaĵo en la rido, branĉeto de majorano ĉe sia bireto, kaj sen la plej eta fiamo... La sola pasio kiun oni iam konis al li, tiu bona patro, estis lia vinberejo - malgranda vinberejo kiun li mem plantis je tri leŭgoj de Avinjono, en la mirtejo de Novkastelo.

Ĉiujn dimanĉojn, elirante de la Vesproj, la dignulo iris flirti ĝin; kaj kiam li estis tie supre, sidinte sub la bona suno, kun lia mulino apud li, liaj kardinaloj tute ĉirkaŭe kuŝintaj piede de la stumpoj, tiam li malkorkigis boteleton da vino de la vit-rikolto - tiu bela vino, rubenruĝa, kiu estas nomita ekde tiam Novkastelo de la Papoj^[12] - kaj li gustumis ĝin per glutetoj rigardante sian vinberejon kun kortuŝita mieno. Poste, la boteleton malplenigitan, ĉe noktiĝo, li gaje revenis al la urbo, sekvita de lia tuta kapitulo; kaj kiam li transiris la ponton de Avinjono, meze de tamburoj kaj farandoloj, lia mulino vigligita de la muziko, komencis malgrandan saltetan amblon, dum li mem kadencis la dancopaŝon per sia bireto, tio kio tre skandalis liajn kardinalojn, sed dirigis al la tuta popolo : "Ha ! la bona princo ! Ha ! la bona Papo !"

Post lia vinberejo de Novkastelo, tio kion la papo plej ŝatis en la mondo estis sia mulino. La bonulo ŝategis ĉi tiun beston. Ĉiujn vesperojn, antaŭ enlitiĝi, li iris vidi ĉu ĝia stalo estis bone ŝlosita, ĉu nenio mankis en ĝia rako, kaj neniam li eltabliĝintus sen preparigi antaŭ siaj okuloj, grandan bovlon da vino laŭ la franca maniero, kun multe da sukero kaj da aromaĵoj, kiun li iris mem alporti al ĝi, malgraŭ la admonoj de siaj kardinaloj... Necesas ankaŭ diri ke la besto valoris tion. Estis bela nigra flavruĝe punktita mulino, kun firma piedo, brilaj haroj, larĝa kaj plena gropo, fiere montranta sian senkarnan kapeton tute ornamita de kvastoj, de bantoj, de arĝentaj tintiloj, de pufbantoj; plie, dolĉa kiel anĝelo, la

12 Franca Rodana vino originale nomita "Château-Neuf du Pape".

okulo naiva, kaj du longaj oreloj, ĉiam svingantaj, kiuj aspektigis ĝin kiel bonan infanon... La tuta Avinjono respektis ĝin, kaj kiam ĝi iris sur la stratoj, ne estis bonaj manieroj kiujn oni ne faris al ĝi; ĉar ĉiu sciis ke estas la plej bona rimedo por esti bone favorata, kaj per sia senkulpa mieno, la mulino de la Papo gvidis pli ol unu al fortuna, pruve Tisteto Venedo kaj lia fenomena aventuro.

Tiu Tisteto Venedo principe estis trosengena bubaĉo kiun lia patro, Gido Venedo, la skulptisto de oro, estis devigita forpeli el sia hejmo, ĉar li ne volis fari ion kaj sendisciplinigis la metilernantojn. Dum ses monatoj, oni vidis lin treni sian vivon en ĉiuj stratdefluejoj de Avinjono, sed ĉefe flanke de la papa domo; ĉar la fripono ekde longe havis sian ideon pri la papa mulino kaj vi tuju vidus ke tio estis malicaĵo... Iam kiam Lia Papa Moŝto tutsole promenis sub la remparoj kun sia besto, jen mia Tisteto kiu alproksimiĝis lin kaj diras al li, kunigante la manojn kun mieno de admiro :

- Ho Dio mia ! Tre Sankta Patro, kian bravan mulinon vi havas tie !... Lasu iom ke mi rigardu ĝin... Ha ! Mia Papo, la bela mulino !... La imperiestro de Germanio ne havas iun tian.

Kaj li karesis ĝin, kaj mallaŭte parolis al ĝi kiel al fraŭlino :

- Venu, mia juvelo, mia trezoro, mia fajna perlo...

Kaj la bona Papo, tute kortuŝita, diris al si en si mem :

- Kia bona knabeto ... Kiel li estas afabla kun mia mulino !

Kaj poste, la morgaŭon, ĉu vi scias tion kio okazis ? Tisteto Venedo interŝanĝis sian malnovan flavan ĵaketon kontraŭ bela albo el punktoj, kapuĉpelerino el violkolora silko, bukŝuoj, kaj li eniris en la kantlernejo de la Papo kie ĉiam antaŭ li, oni akceptis nur filojn de nobeloj kaj nevojn de kardinaloj... Jen tio kio estas la intrigo !... Sed Tisteto ne haltis tie.

Anigita ĉe la servo de la Papo, la fripono daŭrigis la ludon kiu tiel bone sukcesis al li. Spitema kontraŭ ĉiuj, li metis nek atenton nek komplezon krom al la mulino, kaj ĉiam oni renkontis lin tra la kortoj de la palaco kun manpleno da aveno aŭ fasketo da onobrikoj kies rozajn grapolojn li afable skuetis rigardante la balkonon de la Sankta Patro, ŝajnante diri : "He !... por kiu tio ?..."

Tiom kaj tiom ke fine la bona Papo, kiu sentis sin maljuniĝi, decidiĝis lasi al li la taskon vigli super la stalo kaj alporti al la mulino ĝian bovlon da vino laŭ la franca maniero; tio kio ne ridigis la kardinalojn.

Nek ankaŭ la mulinon, tio ne ridigis ĝin... Nun, je la horo de ĝia vino, ĝi ĉiam vidis alveni siahejmen kvin aŭ ses malgrandajn klerikojn de la kantlernejo kiu rapide enŝoviĝis en la pajlon kun sia kapuĉpelerino kaj siaj punktoj. Poste post momento, bona varmaodoro de karamelo kaj aromaĵoj plenigis la stalon, kaj Tisteto Venedo aperis singarde kunportanta la bovlon da francmaniera vino. Tiam la turmentiĝo de la kompatinda besto komenciĝis.

Tiu ĉi bonodora vino kiun ĝi tiom ŝatis, kiu tenis ĝin varme, kiu metis flugilojn al ĝi, oni havis la kruelecon alporti tion al ĝi, tie, en ĝia stal-trogo, spirigi tion al ĝi; poste, kiam ĝi havis la naztruojn plenplenajn de tio, foren, mi vidis vin ! La bela rozflama likvoro tute verŝiĝis en la glutejon de tiuj bubaĉoj... Kaj eĉ se ili nur ŝtelis al ĝi ĝian vinon; sed ili estis kiel diabloj, tiuj ĉiuj malestimaj klerikoj, kiam ili estis drinkintaj... Unu tiris al ĝi la orelojn, alia la voston; Kiketo grimpis sur ĝian dorson, Belugeto provis sur ĝi sian bireton, kaj ne unu el tiuj ĉi bubaĉoj zorgis ke per movo de lumboj aŭ hufobato, la brava besto povintus sendi ilin ĉiujn en la polusan stelon, kaj eĉ preteren... Sed ne ! Oni ne estas por nenio la mulino de la Papo, la mulino de la benoj kaj de la indulgoj... La infanoj vane faris, ĝi ne koleriĝis; kaj estis nur

kontraŭ Tisteto Vedeno kiun ĝi rankoris... Ĉi tiu, ekzemple, kiam ĝi sentis lin malantaŭ si, ĝia hufo jukis ĝin, kaj vere tio ja meritis tion. Tiu sentaŭgula Tisteto ludis al ĝi tiom malbonajn petolaĵojn! Li havis tiom kruelajn inventaĵojn post esti drinkinta!...

Ĉu iam li ne aŭdacis suprenirigi ĝin kun si en la sonoriltureton de la kantlernejo, tien supren, tute supren, en la pinton de la palaco!... Kaj tio kion mi ĵus diris al vi ne estas fabelo, ducent mil provencanoj vidis tion. Ĉu vi mem imagas la teruron de tiu kompatinda mulino kiam, post esti blinde turninta dum horo en helikforma ŝtuparo kaj grimpinta mi ne-scias-kiom da ŝtupoj, ĝi subite troviĝis sur platformo kun blindiga lumo, kaj ke mil futoj malsupre si, ĝi videtis tutan nekredeblan Avinjonoⁿ, la barakojn de la bazaro ne pli dikaj ol aveloj, la soldatojn de la Papo antaŭ sia kazerno kiel ruĝaj formikoj, kaj tien, sur arĝenta drato, mikroskopan ponteton kie oni dancis, kie oni dancadis... Ha! Kompatinda besto! kia paniko! Pro la krio kiun ĝi eligis, ĉiuj vitroj de la palaco tremis.

- Kio okazas? Kion oni faras al ĝi? ekkriis la bona Papo kuregante al sian balkonon.

Tisteto Vedeno jam estis en la korto, ŝajnigante plori kaj ŝiri al si la harojn:

- Ha! Granda Sankta Patro, tio kio okazis! Estas ke via mulino... Dio mia! Kion ni fariĝos? Estas ke via mulino supreniris en la sonoriltureto...

- Tute sola ???

- Jes, granda Sankta Patro, tute sola... Nu! Rigardu ĝin, supren... ĉu vi vidas la pinton de ĝiaj oreloj kiuj superas?... Oni dirus du hirundojn...

- Mizerikordo! eligis la kompatinda Papo suprenrigardante... Sed ĝi do freneziĝis! Sed ĝi estas mortigonta sin... Ĉu vi bonvolas malsupreniri,

kompatindulino !...

Diabla ! Ĝi ja ne petis pli bone ol malsupreniri... Sed tra kie ? La ŝtuparo, necesis ne pensi tion : tio fakte estas suprenirebla, ĉi tiuj aferoj; sed dum la malsuprenirado, estus sufiĉe por centfoje rompi al si la krurojn... Kaj la kompatinda mulino afliktiĝis, kaj vagante sur la platformo kun siaj dikaj okulojn plenplenaj de kapturno, ĝi pensis pri Tisteto Vedenno :

- Ha ! Bandito, se mi elsaviĝas... kia hufobato morgaŭ matene !

Ĉi tiu ideo de hufobato redonis al ĝi iom da kuraĝo; sen tio, ĝi ne povintus sin teni... Fine oni sukcesis elŝovi ĝin de tie supre; sed estis malsimpla afero. Necesis malsuprenigi ĝin per kriko, ŝnuroj, blankardo. Kaj vi imagas kian humiliĝon por la mulino de Papo vidi sin pendigita en tiu alteco, naĝanta per la kruroj en la aero kiel majskarabo ĉe la ekstremo de fadeno. Kaj tuta Avinjono kiu spektis ĝin.

La kompatinda besto pro tio tutnokte ne dormis. Ĉiam ŝajnis al ĝi ke ĝi turniĝadis sur tiu malbenita platformo, kun sube la ridadoj de la urbo, poste ĝi pensis pri tiu senhonora Tisteto Vedenno kaj pri la beleta hufobato kiun ĝi estis okazigonta al li la venontan matenon. Ha ! Miaj amikoj, kia hufobato ! De Pamperigusto^[13] ni vidus la fumon de tio... Nu, dum oni pretigis por li, tiun belan akcepton en la stalo, ĉu vi scias tion kion faris Tisteto Vedenno ? Li kantante malsupreniris laŭ la Rodano sur papa galero kaj foriris al la kortego de Napolo, kun la grupo de junaj nobeloj kiujn la urbo ĉiujare sendis apud la reĝino Johana por ekzerciĝi en la diplomateco kaj la bona konduto. Tisteto ne estis nobelo; sed la Papo volis rekompenci lin pro la zorgoj kiujn li donis al lia besto, kaj ĉefe pro la agado kiun li ĵus montris dum la

¹³ Pamperigusto estas imaga loko citita en la verko de Alfonso Daudet, kiu enhavas plurajn menciojn de ĉi tiu mita urbo situanta en Provenco.

tago de savado.

Estas la mulino kiu elreviĝis la morgaŭon !

- Ha ! La bandito ! Li antaŭsentis ion !... ĝi pensis furioze skuante siajn tintilojn... sed ne gravas, iru aĉulo ! Vi retrovos ĝin post la reveno, vian hufobaton..., mi tenas ĝin por vi !

Kaj ĝi tenis ĝin por li.

Post la foriro de Tisteto, la mulino de la Papo retrovis sian trankvilan vivaranĝon kaj siajn antaŭajn agmanierojn. Ne plu da Kiketo, ne plu da Belugeto en la stalo. La belaj tagoj de la vino laŭ la franca maniero revenis, kaj kun ili, la bona humoro, la longaj siestoj, kaj la paŝeto de gavoto kiam ĝi transpasis la ponton de Avinjono. Tamen ekde ĝia aventuro, oni ankoraŭ esprimis al ĝi iom da indiferenteco en la urbo. Estis flustradoj laŭ ĝia vojo; la maljunaj homoj balancis la kapon, la infanoj ridis montrante unu la alian la sonoriltureton. La bona Papo mem ne plu havis tiom da fidon en sia amikino, kaj kiam li allasi sin al dormeto sur ĝia dorso, dimanĉe, revenante de la vinberejo li ĉiam gardis tiun kaŝpenson : "Ĉu mi estis vekigonta tien supren, sur la platformon !" La mulino vidis tion kaj suferis pro tio, dirante nenion; sed kiam oni eldiris la nomon de Tisteto Vedeno antaŭ ĝi, ĝiaj longaj oreloj ekstremitis kaj ĝi akriĝis kun eta rido, siajn hufoferojn sur la pavimo...

Sep jaroj tiel forfluis; tiam post paso de tiuj sep jaroj, Tisteto Vedeno revenis de la kortego de Napolo. Lia tempo ne estis jam finita tie; sed li ekaŭdis ke la unua mustardisto de la Papo ĵus mortis subite en Avinjono, kaj ĉar la posteno ŝajnis al li bona, li hastege alvenis por prezenti sin kiel kandidaton.

Kiam ĉi tiu intrigema Vedeno eniris en la halon de la palaco, la Sankta Papo preskaŭ ne rekonis lin tiom li grandiĝis kaj belstature konstruiĝis. Necesas ankaŭ diri ke la bona

Papo siaflanke maljuniĝis, kaj li ne bone vidi sen nazumo.

Tisteto ne konfuziĝis.

- Kiel ! Granda Sankta Patro, ĉu vi ne plu rekonas min ?

... Estas mi, Tisteto Vedeno !...

- Vedeno ?...

- Sed jes, vi bone scias... tiu kiu alportis la francan vinon al via mulino.

- Ha ! Jes... Jes... Mi rememoras... bona knabeto, tiu Tisteto Vedeno !... Kaj nun, kion li volas de ni ?

- Ho ! Ne multe da afero, granda Sankta Patro... Mi venis peti al vi... Parenteze, ĉu vi ankoraŭ havas ĝin, vian mulinon ? Kaj ĝi bone fartas ?... Ha ! Des pli bone !... Mi venis peti al vi la postenon de la unua mustardisto kiu ĵus mortis.

- Unua mustardisto, vi... Sed vi estas tro juna. Kiomaĝa vi do estas ?

- Dudek jarojn kaj du monatojn, plej alta pontifiko, ĝuste kvin jarojn pli ol via mulino... Ha ! Palmo de Dio, la brava besto !... Se vi scius kiom mi amis ĝin, tiun mulinon... kiel mi sopiris pri ĝi en Italio !... Ĉu vi ne lasos min vidi ĝin ?

- Jes, infano mia, vi vidos ĝin, eligis la bona Papo tute kortuŝita... Kaj ĉar vi tiom amas ĝin, tiun bravan beston, mi ne plu volas ke vi vivu for de ĝi. Ekde tiu ĉi tago, mi alprenas vin en mian servon estiel unuan mustardiston... Miaj kardinaloj krios, sed ne gravas ! Mi kutimas... Venu renkonti nin morgaŭ ĉe la eliro de la vesproj, ni transdonos al vi la insignojn de via rango en la ĉeesto de nia kapitulo, kaj poste... mi kondukos vin vidi la mulinon, kaj vi venos al la vinberejo kun ni du... Hej ! Hej ! Nu ! Iru...

Ĉu Tisteto Vedeno estis kontenta elirante la halon, kun kiu senpacienco li atendis la morgaŭan ceremonion, mi ne bezonas diri tion al vi. Tamen estis en la palaco iu ankoraŭ pli feliĉa kaj pli senpacienca ol li : estis la mulino. Ekde la

reveno de Vedeno ĝis vespro de la sekvanta tago, la terura besto ne ĉesis englutegi avenon kaj bati kontraŭ la muro per siaj malantaŭaj hufoj. ankaŭ ĝi pretiĝis cele al la ceremonio...

Kaj do, la morgaŭon, kiam la vespro estis dirinta, Tisteto Vedeno eniris en la korton de la papa palaco. Tute la episkoparo estis tie, la kardinaloj en ruĝa robo, la advokato de la diablo en nigra veluraĵo, la abatoj de monaĥejo kun siaj malgrandaj mitroj, la presbiteroj de Sankta-Agriko, la violkoloraj kapuĉpelerinoj de kantlernejo, la pastraro ankaŭ, la soldatoj de la Papo en parada uniformo, la tri frataroj de pentofarantoj, la ermitoj de la monto **Ventu** kun siaj homevitaj mienoj kaj la malgranda kleriko kiu malantaŭe sekvas kunportante la sonorileton, la flagelantoj nudaj ĝis la talio, la florumataj sakristianoj en roboj de juĝistoj, ĉiuj, ĉiuj, ĝis la donantoj de benita akvo, kaj tiu kiu lumigas, kaj tiu kiu mallumigas... ne estis unu kiu mankis... Ha! Estis bela ordinado! Sonoriloj, petardoj, suno, muziko, kaj ĉiam tiuj obstinemaj tamburinoj kiuj kondukis la dancon, tie, sur la ponto de Avinjono...

Kiam Vedeno aperis meze de la ĉeestantaro, lia sinteno kaj lia bela mieno aŭdigi en ĝi murmuron de admiro. Estis iu belega Provencano, sed el la blonduloj kun grandaj haroj frizaj ĉe la pinto kaj frenezeta barbeto kiu ŝajnis ornamita de rabotaĵetoj el fajna metalo falintaj de la gravurilo de sia patro, la skulptisto de oro. La famo kuris ke en ĉi tiu blonda barbo, la fingroj de la reĝino Johana kelkfoje ludis; kaj Moŝto Vedeno fakte ja vidigis gloran mienon kaj malatentan rigardon de la homoj kiujn la reĝinoj estis amantaj... Tiu tago, por honori sian nacion, li anstataŭis siajn napolajn vestojn per jaketo borderita de rozkoloro laŭ Provenca maniero, kaj sur lia kapuĉo tremis granda plumo de Kamarga ibiso.

Tuj enirinta, la unua mustardisto salutis kun ĝentila mieno, kaj direktis sin al la alta perono kie la Papo atendis lin por transdoni al li la insignojn de sia rango : la kuleron el flava bukso kaj safranana veston. La mulino estis piede de la ŝtuparo, tute jungita kaj preta por foriri al la vinberejo... Kiam li pasis apud ĝi, Tisteto Vedeno havis bonan rideton kaj haltis por doni al ĝi du aŭ tri amikajn manfrapetojn sur la dorso , strabe subrigardante ĉu la Papo vidis lin. La pozicio estis bona... La mulino streĉis sin :

- Ricevu ! Trafiĝu, bandito ! Jen sep jaroj ke mi gardas ĝin por vi !

Kaj ĝi okazigis al li hufbaton tiel terura, tiel terura, ke de Pamperigusto^[13] mem, oni vidis la fumon, kirlon de blonda fumo kie ŝvebis plumon de ibiso; ĉion kio restis pri la malbonsorta Tisteto Vedeno !...

La piedbatoj de mulino ne estas kutime tiel frakasaj; sed tiu ĉi estis papa mulino; kaj plie, pensu do ! Ĝi gardis tion por li de antaŭ sep jaroj... Ne estas pli bela ekzemplo de eklezia malpardonemo.

La Lumturo de la Sangaj Insulo

Tiunokte mi ne sukcesis dormi. La mistralo koleris, kaj la bruegoj de ĝia grava voĉo tenis min nedormantan ĝis la mateno. Peze svingante siajn kriplajn alojn kiuj siblis en la bizo kiel la rigoj de ŝipo, la tuta muelilo krakadis. Tegoloj forflugis el ĝia ruiniĝa tegmento. Fore, la densaj pinoj kies la monteto estas tegata, turniĝadis kaj bruetis en la ombro. Oni kredus sin marmeze...

Tio tute memorigis al mi miajn senegalajn sendormecojn de antaŭ tri jaroj, kiam mi loĝis en la lumturo de la Sangaj Insuloj^[14], tie sur la Korsika marbordo, ĉe la enirejo de la golfo de Ajaĉo.

Ankoraŭ bela loko kiun mi tie trovis por revii kaj por esti sola.

Imagu ian insulon ruĝetan kaj kun sovaĝa aspekto; la lumturo ĉe iu pinto, ĉe la alia malnova ĝenova turo kie mitempe loĝis aglo. Malsupre, rando de la akvo, ruina lazareto ĉie invadita de la herbaĵoj; poste ravinoj, makisoj, grandaj rokoj, kelkaj sovaĝaj kaprinoj, korsikaj ĉevaloj kapriolantaj kun kolharoj en la vento; fine tie supre, tute supre, en turniĝado de marbirdoj, la domo de la lumturo, kun ĝia platformo el blanka masonaĵo kie la gardistoj paŝas tien kaj reen, la verda ogiva pordo, la malgranda turo el giso, kaj supre la dika faceta lanterno kiu flamas sub la suno kaj lumigas eĉ dumtage... Jen la Sanga Insulo kiel mi tiunokte revidis ĝin, aŭdante ronki miajn pinojn. Estis en tiu ĉarmega insulo ke, antaŭ havi muelejon, mi iris kelkafoje enfermiĝi kiam mi bezonis liberan aeron kaj solecon.

Kion mi faris ?

14 Mi ne trovis bonan tradukon, la rekta traduko estas "sangavida", sed la necerta deveno de la nomo pli temas pri la koloro de la insuloj.

Tion kion mi faras ĉi tie, eĉ malpli. Kiam la mistralo aŭ la tramontano ne tro blovegis, mi venis loki min inter du rokojn samnivele kun akvo, meze de laroj, merloj, hirundoj, kaj mi restis tie preskaŭ tutan tagon en tia sensobtuzo kaj agrablega melankolio kiujn la kontemplado de la maro donacas. Vi konas, ĉu ne, tiun beletan ekzaltiĝon de la animo ? Oni ne pensas, oni ankaŭ ne pli revas. Via tuta animo eskapas el vi, forflugas, disventiĝas. Oni estas la mevo kiu plonĝas, la ŝaŭmero kiu flosas sub la suno inter du marondoj, la blanka fumo de tiu pasaĝerŝipo kiu foriras, tiu koralplukŝipeto kun ruĝa velo, tiu perlo de akvo, tiu floko de nebulo, ĉio krom si mem... Ho ! Kiom mi pasigis en mia insulo da tiuj belaj horoj de duondormado kaj de senpripensado !...

Dum la ventegaj tagoj, la akvorando estanta ne eltenebla, mi enfermis min en la korto de la lazareto, malgranda melankolia korto, tute aromigita de rosmareno kaj de sovaĝa absinto, kaj tie, kaŭranta kontraŭ parto de malnova muro, mi lasis min malrapide invadi de la konfuza etoso de forlaso kaj malĝojo kiu ŝvebis kun la suno en la ŝtonaj kavetoj fositaj tute ĉirkaŭe kiel malnovaj tomboj. Temp'al tempe, pordoklako, malpeza eksalto en la herbo... estis kaprino kiu venis paŝtiĝi ŝirmite de la vento. Vidante min, ĝi haltis konsternita kaj restis ŝtonigita antaŭ mi en akra aspekto kun la korno starigita, rigardante min per infana okulo...

Ĉirkaŭ la kvina, la laŭtparolilo de la gardistoj vokis min por vespermanĝi. Mi tiam uzis malgrandan padon tra la makiso apike supreniranta super la maro, kaj mi malrapide revenis al la lumturo, ĉiupaŝe rigardante returne al tiu grandega horizonto de akvo kaj lumo kiu ŝajnis plivastiĝi laŭmezure kiel mi grimpis.

Tio supre estis ĉarma. Mi ankoraŭ vidas tiun belan manĝoĉambbron kun larĝaj slaboj, murtegaĵoj el kverko, la

fumanta bujabeso meze, la larĝe malfermita pordo rigardanta al la blanka teraso kaj la tuta sunsubiro kiu eniris... La gardistoj estis tie, atendente min por altabliĝi. Ili estis tri, unu Marsejano kaj du korsikanoj, ĉiuj tri, malgrandaj, barbaj, kun la sama vizaĝo tanilkolora, fendetita, la sama marmantelo el kaprina felo, sed kun sinteno kaj humoro tute malsamaj.

Laŭ la vivmaniero de tiuj ĉi homoj, oni tuj sentis la malsamecon de la du rasoj. La Marsejano, laborema kaj vigla, ĉiam klopodema, ĉiam diligenta, trakuris la insulon de mateno ĝis vespero, ĝardenante, fiŝante, plukante la ovojn de marbirdoj, embuskiĝante en la makiso por melki pasantan kaprinon; kaj ĉiam preparanta kelkan **ajlolean saŭcon** aŭ kelkan bujabeson.

La korsikanoj, ili, ekster sia deĵoro, prizorgis absolute nenion; ili konsideris sin kiel oficistojn, kaj pasigis ĉiujn siajn tagojn en la kuirejo por ludi senfinajn partiojn de **Balailo**^[15], ĉesante nur por rebruligi kun serioza mieno siajn pipojn kaj haki per tondilo en sia mankavo, grandajn foliojn de verda tabako...

Cetere, Marsejano kaj Korsikanoj, ĉiuj tri bonaj homoj, simplaj, naivaj kaj plenaj de komplezoj por sia gasto, kvankam fakte, li devis ŝajni al ili tre strangegan viron...

Imagu do ! Veni enfermi sin en la lumturo por sia plezuro !... Ili kiuj opinias la tagojn tiel longaj kaj kiuj estas tiel feliĉaj kiam estas siavice reiri sur teron... Dum la bela sezono, tiu granda feliĉo okazas al ili ĉiumonate. Po dek tagoj sur tero por tridek tagoj en lumturo, jen la regularo; sed dum la vintro kaj la ŝtorma vetero, ne plu estas regularo kiu eltenas. La vento blovas, la ondo leviĝas, la Sangaj Insuloj blankiĝas pro ŝaŭmo, kaj la deĵorantaj gardistoj restas blokataj dum du aŭ tri sinsekvaj monatoj, kelkfoje en

15 Itala kartludo.

teruraj kondiĉoj.

- Jen tio kio al mi okazis, al mi, sinjoro - iam rakontis al mi la maljuna Bartolo dum ni vespermanĝis - Jen tio kio okazis al mi dum vintra vespero kiel nun, antaŭ kvin jaroj, ĉe tiu ĉi sama tablo kie ni estas. Tiun vesperon, ni estis nur du en la lumturo, mi kaj iu kamarado kiun oni nomis Ĉekoⁿ... La aliaj estis surtere, malsanaj feriantaj, mi ne plu scias... Ni estis finantaj vespermanĝi, tre trankvilaj... Subite, jen mia kamarado kiu ekhaltas manĝi, rigardas min dum momento per strangaj okuloj kaj Pum ! ekfalas sur la tablon kun la brakoj antaŭen. Mi kuras al li, skuas lin, vokas lin :

- Ho ! Ĉeĉjo !... Ho ! Ĉeĉjo !...

Nenio ! Li mortis... Vi imagas kian konfuziĝon ! Mi restadis pli ol horon konfuzita kaj tremanta antaŭ tiu kadavro, poste subite ĉi tiu ideo alvenis al mi : "Kaj la lumturo !" Mi havis nur tempon por grimpi ĝis la lanterno kaj lumigi. La nokto jam komenciĝis... Kia nokto, sinjoro ! La maro, la vento, ne plu havis siajn naturajn voĉojn. Ĉiumomente ŝajnis al mi ke iu alvokis min en la ŝtuparo... Krom tio ĉi, febron, soifon ! Sed vi ne sukcesus malsuprenirigi min,... mi tro timis de la mortinto. Tamen, frumatene, la kuraĝo iom refirmigis mi. Mi kunportis mian kamaradon sur lian liton; iu littuko sur li, iu peco de preĝo, kaj poste rapide al alarmsignalo.

Bedaŭrinde, la maro estis tro forta; mi vane alvokis, alvokadis, neniu venis... Jen mi, sola en la lumturo, kun mia kompatinda Ĉeko kaj Dio scias dum kiom da tempo... Mi esperis povi gardi lin apud mi, ĝis la alveno de la ŝipo; sed post tri tagoj tio ne plu eblis... Kiel agi ? Porti lin eksteren ? Entombigi lin ? La roko estis tro malmola, kaj estas tiom da korvoj en la insulo. Estis kompatige delasi tiun ĉi kristanon al ili. Do mi ekpensis malsuprenirigi lin en iun el la kavetoj de la lazareto... Tiu malĝoja taskaĉo postulis al mi tutan

posttagmezon, kaj mi certigas vin ke kuraĝo ja necesis al mi... Nu ! sinjoro, eĉ hodiaŭ, kiam mi malsupreniras laŭ ĉi tiu flanko de la insulo dum ventega posttagmezo, ŝajnas al mi ke mi ankoraŭ havas la mortinton sur la ŝultroj...

Kompatinda maljuna Bartolo ! La ŝvito elfluetis sur lia frunto, nur pensante pri tio.

Niaj manĝotempoj tiel fluis interbabilante longe : la lumturo, la maro, rakontoj de ŝiprompado, historioj de korsikaj banditoj... Poste ĉe la vesperiĝo, la gardisto de la unua vaĉo ekbruligis sian lampeton, prenis sian pipon, sian ladbotelon, dikan **Plutarkon** kun ruĝa randumo, la kompleta biblioteko de la Sangaj Insuloj kaj malaperis en la fono. Post momento, estis ĉie en la lumturo bruego de ĉenoj, de pulioj, de dikaj pezaĵoj de horloĝoj kiujn oni realtigas.

Dume mi ja iris sidiĝi eksteren sur la terason. La suno, jam tre malalta, pli kaj pli rapide malleviĝis al la akvo, kuntirante kun si la tutan horizonton. La vento malvarmetiĝis, la insulo fariĝis violkolora. En la ĉielo apud mi, dika birdo peze superflugis min : estis la aglo de la ĝenova turo kiu reveni... Iom post iom la mara nebulo leviĝis. Baldaŭ oni vidis nur la blankan orlon el marŝaŭmo ĉirkaŭ la insulo... Subite, super mia kapo, ekfulmis fluegon de milda lumo. La turlumo lumis. Lasante en la ombro la tutan insulon, la hela radio iris fali mezen de la maro, kaj mi estis tie, perdita en la nokto, sub ĉi tiuj grandaj lumradioj kiuj preterpasante apenaŭ tuŝis min... Sed la vento ankoraŭ pli malvarmetiĝis. Necesis reeniri. Blinde, mi fermis la dikan pordon, fiksas la ferajn stangojn; poste, ankoraŭ palpante, mi iris tra malgranda ŝtuparo el giso kiu tremis kaj sonis sub miaj paŝoj, kaj mi alvenis ĉe la supro de la lumturo. ĉi tie, ekzemple, estis ja lumego.

Imagu gigantan lampon **Karselo**ⁿ kun ses vicoj da meĉoj ĉirkaŭ kiu malrapide pivotas la facetoj de la lanterno, la unuj

plenigitaj de grandega lenso el kristalo, la aliaj, apertaj al granda senmova vitraĵo kiu ŝirmas la flamon kontraŭ la vento... Enirante, mi estis blindigata. Ĉi tiuj kupraĵoj, ĉi tiuj stanaĵoj, ĉi tiuj reflektiloj el blanka metalo, ĉi tiuj muroj el konvekso kristalo kiuj turnis kun grandaj bluetaj ringoj, ĉi tiu tuta trembrilo, ĉi tiu tuta ŝanĝado de lumoj, dummomente turnis al mi la kapon.

Iom post iom tamen, miaj okuloj kutimiĝis al tio, kaj mi venis sidiĝi ĉe la piedo mem de la lampo, apud la gardisto kiu laŭte legis sian Plutarkon pro timo endormiĝi...

Ekstere, mallumo, abismo. Sur la malgranda balkono, kiu ĉirkaŭiras la vitraron, la vento rapidegas kiel frenezulo, hurlante. La lumturo krakas, la maro ronkas. Ĉe la pinto de la insulo, sur la subrifoj, la ondegoj bruegas kiel kanonpafoj... Foje, nevidebla fingro frapas la vitraron : ia nokta birdo kiun tiu lumo altiras kaj kiu venas rompi al si la kapon kontraŭ la kristalo... En la brilega kaj varma lanterno, nur la kraketado de flamo, la bruo de la oleo kiu elgutas, de la ĉeno kiu elbobeniĝas; kaj iu monotona voĉo deklamanta la vivon de **Demetrio de Falero**...

Noktomeze, la gardisto ekstaris, ĵetis lastan ekrigardon al siaj meĉoj, kaj ni malsupreniris. En la ŝtuparo, ni renkontis la kamaradon de la dua vaĉo kiu supreniris frotante al si la okulojn; oni transdonis al li la ladbotelon, la Plutarkon... Poste, antaŭ enlitiĝi, ni eniris dum momento en la fundan ĉambron, tute embarasita de ĉenoj, de dikaj pezaĵoj, de rezervujoj el stano, de ŝnuregojn, kaj tie en la lumo de sia lampeto, la gardisto skribis sur la grandan libron de la lumturo, ĉiam malfermitan :

Noktomeze. Forta maro. ŝtormo. ŝipo en la marmezo.

La Agonio de la Vivoplena.

Ĉar la mistralo de la alia nokto ĵetis nin sur la korsikan marbordon, lasu min rakonti al vi teruran marhistorion kiun la tieaj fiŝistoj ofte parolas dum la noktokunvenoj, kaj pri kiu hazardo liveris al mi tre strangajn informojn.

...Estis antaŭ du aŭ tri jaroj.

Mi traŝipis la Sardan Maron kun sep aŭ ok doganaj maristoj. Peniga vojaĝo por senspertulo! Dum la tuta monato de marto, ni ne ĝuis bonan tagon. La orienta vento furiozis kontraŭ ni kaj la maro ne kvietiĝis.

Iun vesperon kiam ni fuĝis antaŭ ŝtormo, nia ŝipo venis rifuĝi ĉe la enirejo de la **markolo de Bonifacio**, meze de amaso da insuletoj... Ilia aspekto estis tute malloga: grandaj nudaj rokoj, kovritaj de birdoj, kelkaj tufoj de absento, makisoj de mastikarboj, kaj ĉi tie kaj tie, en la ŝlimo, putrantaj lignopecoj. Sed vere, por tranokti, tiuj timigaj ŝtonegoj valoris ankoraŭ pli bone ol la rufo de malnova duonferdekita barko kie la ondego eniris kiel hejmen, kaj ni kontentigis nin per ĝi.

Apenaŭ alteriĝintaj, dum la maristoj ekbruligis fajron por la bujabeso, la estro alvokis min kaj montrante al mi malgrandan ĉirkaŭmuron el blanka masonaĵo perditan en la nebulo ĉe la fino de la insulo:

- Ĉu vi venas al la tombejo? li diris al mi.
- Iu tombejo, estro Lioneto! Kie do ni estas?

- En la Insuloj **Lavezio**, sinjoro. Ĉi tie estas enterigitaj la sescent viroj de la Vivoplena^[16] ĉe la loko mem kie ilia fregato perdiĝis, antaŭ dek jaroj... Kompatindaj homoj! Ili ne ricevas multajn vizitojn; estas ja la minimumo da deco ke

16 Estas la traduko de la nomo de iu francarmeaj fregato nomita "La Sémillante".

ni iru saluti ilin, ĉar ni estas ĉi tie...

- Tutkore, estro.

Kiel ĝi estis malgaja, la tombejo de la Vivoplena !... Mi ankoraŭ vidas ĝin kun ĝia malalta ĉirkaŭmuro, ĝia fera rusta pordo, malfacile malfermebla, ĝia silenta kapelo kaj centoj da nigraj krucoj kaŝitaj de la herbo... Ne ia krono de imorteloj, ne ia ajn memoraĵo ! Nenio... Ha ! La kompatindaj forlasitaj mortintoj, kiel ili devas esti malvarmaj en siaj tomboj de sortobato !

Ni restis tie dum momento, genuiĝintaj. La estro laŭte preĝis. Grandegaj laroj, solaj gardantoj de la tombejo, turniĝadis super niaj kapoj kaj miksis siajn raŭkajn blekoj kun la lamentadoj de la maro.

Tuj post la preĝo, ni malgaje revenis al la loko de la insulo kie la barko estis alligita. Dum nia foresto, la maristoj ne perdis sian tempon. Ni trovis flamantan fajregon ŝirmate de roko, kaj la marmiton kiu fumis. Ni ronde sidiĝis, kun la piedoj ĉe la flamo, kaj baldaŭ ĉiu ricevis sur siaj genuoj, en pelveto el ruĝa tero, du tranĉaĵojn de nigra pano abunde surverŝitaj. La manĝado estis silenta : Ni estis malsekaj, ni malsatis, kaj plie la proksimeco de la tombejo... Tamen, kiam la pelvetoj estis malplenigitaj, ni bruligis la pipojn kaj komencis iom babili. Kompreneble, ni parolis pri la Vivoplena.

- Sed fine, kiel la afero okazis ? Mi demandis al la ŝipestro, kiu, kapon en siaj manoj, pensoplene rigardis la flamon.

- Kiel la afero okazis ? respondis al mi la bona Lioneto kun peza suspiro, bedaŭrinde ! sinjoro, neniu en la mondo kapablas diri tion. Ĉio kion ni scias, estas ke la Vivoplena, ŝarĝita de trupoj por Krimeo, foriris antaŭvespere el Tulono dum malbona vetero. Nokte, tio plie difektiĝis. Vento, pluvo, maro giganta kiel oni neniam vidis tion... Matene la vento iom malfortiĝis, sed la maro estis ankoraŭ tute

malkvieta, kaj kun tio, ia terura nebulo de la diablo ĝis ne plu distingi signallampon je kvar paŝoj... Tiujn nebulojn, sinjoro, oni ne suspektas kiel ili estas trompaj... Ne gravas, mi opinias ke la Vivoplana verŝajne perdis matene sian rudron; ĉar nebulo ne estas bona argumento, sen difekto, neniam la kapitano estus veninta frakasiĝi ĉi tien kontraŭ. Li estis strikta maristo kiun ni ĉiuj konis. Li komandis la stacion en Korsikio dum tri jaroj kaj konis ĉian marbordon tiel bone kiel mi kiu ne konas aliaĵon.

- Kaj je kioma horo oni opinias ke la Vivoplana pereis ?

- Ŝajne estis tagmeze; jes, sinjoro, ĝuste dum tagmezo... Sed evidente ! en la nebulo de maro, tiu ĝusta tagmezo apenaŭ pli valoris ol nokton nigran kiel faŭkon de lupo... Iu doganisto de la marbordo rakontis al mi ke tiun tagon, ĉirkaŭ la deknua kaj duono, estante elirinta el lia dometo por realkroĉi liajn ŝutrojn, iu ventoblovo forprenis lian kaskedon, kaj ke riskante esti mem kunprenita de la ondego, li komencis kvarpiede postkuri ĝin laŭlonge de la marbordo. Vi komprenas ! La doganistoj ne estas riĉaj, kaj kaskedo kostas multe. Nu ŝajnus ke iumomente nia viro, relevante la kapon, estus ekvidinta tute proksime al si, en la nebulo, dikan ŝipon kun ferlitaj veloj kiu fuĝis sub la vento direkte al la insuloj Lavezio. Tiu ŝipo iris tiel rapide, tiel rapide, ke la doganistoj apenaŭ havis la tempon bone vidi ĝin. Ĉio tamen kredigas ke estis la Vivoplana ĉar post duonhora la paŝtisto de la insuloj aŭdis sur tiuj ĉi rokoj... Sed ĝuste jen la paŝtisto kiun mi parolas al vi, sinjoro; li mem rakontos al vi la aferon... Saluton Palombo !... Venu iom revarmigi vin; ne timu.

Iu kapuĉita viro kiun mi vidis vagi ekde momento ĉirkaŭ nia fajro kaj kiun mi rigardis kiel iu el la ŝipanaro, ĉar mi ne sciis ke estis paŝtisto sur la insulo, timeme proksimiĝis al ni.

Li estis maljuna leprulo trikvarone idiota, trafita de mi-

ne-scias kiun skorbutan difekton kiu faris al li dikajn ŝvelajn lipojn, abomenajn por vidi. Oni penege klarigis al li pri kio temis. Tiam, levante per la fingro sian malsanan lipon, la maljunulo rakontis al ni, ke fakte dum la koncerna tago, ĉirkaŭ la tagmezo, li aŭdis de sia kabano, teruran krakon sur la rokoj. Ĉar la insulo estis tute kovrita de akvo, li ne povis eliri, kaj estis nur la morgaŭon ke, malfermante sian pordon, li vidis la marbordon plenplena de disrompitaĵoj kaj de kadavroj tie postlasitaj de la maro. Timegita, li kurante fuĝis al sia barko por iri al Bonifacio serĉi homojn.

Laciĝinta pro esti tiom dirinta, la paŝtisto sidiĝis, kaj la ŝipestro reparolis :

- Jes, sinjoro, estas tiu ĉi kompatinda maljunulo kiu venis averti nin. Li estis preskaŭ freneza pro timo; kaj pro la afero, lia cerbo restis difektita. Necesas konsenti ke tio kaŭzis tion... Imagu sescent kadavrojn amase sur la sablo, pelmele kun la pecoj de ligno kaj la disŝiriĝoj de tolo... Kompatinda Vivoplena !... Fakte la maro disprenis ĝin kaj tiel bone frakasis ĝin ke en ĉiuj ĝiaj disrompaĵoj, la paŝtisto Palombo nur penege trovis sufiĉe por fari palisaron ĉirkaŭ sia kabano... Pri la viroj, preskaŭ ĉiuj kun difektita vizaĝo, terure kriplitaj... Estis kompatige vidi ilin grapole alkroĉitajn unujn la aliajn... Ni trovis la kapitanon en lia parada uniformo, la militpastron kun lia stolo ĉe la kolo, en angulo, inter du rokoj; etan ŝipknabon kun okuloj malfermitaj... oni estus kredanta ke li ankoraŭ vivis, sed ne ! Estis dirita ke ne unu elsaviĝus el tio...

Tiam la estro ekĉesis :

- Atentu Nardi ! li kriis, la fajro estingiĝas.

Nardi ĵetis sur la braĝon du aŭ tri pecojn de gudritaj tabuloj kiuj ekflamiĝis kaj Lioneto daŭrigis :

- Tio kio estas pli malĝoja en ĉi tiu rakonto, jen ĝi... Tri semajnojn antaŭ la katastrofo, malgranda korveto kiu iris al

Krimeo kiel la Vivoplana, sammaniere ŝiprompiĝis preskaŭ en la sama loko. Sed tiufoje, ni sukcesis savi la ŝipanaron kaj dudek soldatojn de la loĝistiko kiuj troviĝis surŝipe... Tiuj kompatindaj soldatoj ne sentis sin komfortaj, vi imagas ! Oni kondukis ilin al Bonifacio kaj ni gardis ilin dum du tagoj kun ni, en la marista gastejo... Tuj kiam ili estis bone sekaj kaj resanigitaj, bonan vesperon ! bonan ŝancon ! Ili reiris al Tulono kie, post kelka tempo, oni denove enŝipigis ilin por Krimeon... Divenu sur kiu ŝipo !... Sur la Vivoplana, sinjoro... Ni retrovis ĉiujn, ĉiujn dudek, kuŝantaj inter la mortintoj; en la loko kie ni estas... Mi mem relevis beletan brigadiston kun maldikaj lipharoj, iun blonduleton de Parizo kiun mi akceptis hejme kaj kiu senĉese ridigis nin per siaj rakontoj... Vidi lin tie, tio krevis al mi la koron... Ha ! Sankta Patrino !...

Post tio, la brava Lioneto, tute kortuŝita, skuis la cindrojn de sia pipo kaj volvis sin en sia marmantelo dezirante al mi bonan nokton... Dum ankoraŭ kelka tempo, la maristoj duonvoĉe babilis inter ili... Poste unu post la alia, la pipoj estingiĝis... Oni ne plu parolis... La maljuna paŝtisto foriris... Kaj mi sole restis revanta meze de la dormanta ŝipanaro.

Ankoraŭ sub la impreso de la funebra rakonto kiun mi ĵus aŭdis, mi provis enpense rekonstrui la kompatindan pereitan ŝipon kaj la historion de tiu agonio pri kiu la laroj estis solaj atestantoj. Kelkaj detaloj kiuj mirigis min, la kapitano en parada uniformo, la stolo de la militpastro, la dudek soldatoj de la loĝistiko, helpis min diveni ĉiujn peripetiojn de la dramo... Mi vidis la fregaton nokte forirantan de Tulono... Ĝi eliris el la haveno. La maro estis malkvieta, la vento terura; sed oni havis kiel kapitano, kuraĝa maristo, kaj ĉiuj surŝipe estis trankvilaj...

Matene, la mara nebulo leviĝis. Oni komencis maltrankviliĝi. La tuta ŝipanaro estis supre. La kapitano ne

forlasis la postkastelon... En la interferdeko kie la soldatoj estis kantonmentitaj, estis malluma; la etoso estis varma. Kelkaj estis malsanaj kaj kuŝintaj sur siaj sakoĵ. La ŝipo abomene tangis; ne eblas stari sin. Oni grupe babilis surplanke sidanta, alkröĉiginte al la benkoj; necesis krii por aŭdigi sin. Estis kiuj komencis timi... Aŭskultu do ! La ŝiprompiĝoj estis oftaj en tiuj ĉi regionoj; la soldatoj de la loĝistiko estis tie por diri tion, kaj tio kion ili rakontis ne trankviligis. Ilia brigadisto ĉefe, iu Parizano kiuj ĉiam ŝercis, hirtigis al vi la haŭtajn harojn per siaj ŝercoj :

- Iu ŝiprompo !... sed estas tre amuza, iu ŝiprompo !. Ni nur baniĝos kun glacio, kaj poste oni kondukos nin al Bonifacio, por manĝi merlojn ĉe la mastro Lioneto.

Kaj la soldatoj de la loĝistiko ekridis...

Subite krako... Kio tio estis ? Kio okazis ?...

- La rudro ĵus foriris, diris iu tute malseka maristo kiu kurante trapasis la interferdekon.

- Bonan vojaĝon ! kriis tiu diabla brigadisto; sed tio ne plu ridigis iun ajn.

Granda tumulto sur la ferdeko. La nebulo malpermesis vidi unu la alian. La maristoj blinde iris kaj reiris, timegitaj... Sen rudro ! La manovro ne neebliis... La drivanta Vivoplena rapidis kiel la vento... Estis tiam kiam la doganisto ekvidis ĝin pasi; estis duono post la deknua. Ĉe la antaŭo de la fregato, oni aŭdis kiel kanonpafon... La subrifoj ! La subrifoj !... Estis finota, ne plu estis espero, oni rekte iris al la marbordo... La kapitano malsupreniris en sian kajuton... Post momento, li venis reakiri sian lokon, sur la postkastelo, en parade uniformo... Li volis bele sin vesti por morti.

En la interferdeko, la soldatoj, malserenaj, rigardis unu la aliajn sen diri ion... La malsanuloj provis restari sin... La eta brigadisto ne plu ridis... Estis tiam kiam la pordo malfermiĝis kaj kiam la militpastro aperis ĉe la sojlo kun sia

stolo :

- Genue, miaj infanoj !

ĉiuj obeis. Per laŭtega voĉo, la pastro komencis la preĝon de la agoniantoj.

Subite terura kolizio, iu krio, unu sola krio, grandega krio, etenditaj brakoj, manoj kiuj alkroĉiĝis, terurigitaj rigardoj kie la vizio de la morto fulmrapide ekpasis...

Kompatindulgo !...

Estas tiel ke mi pasigis la tutan nokton revante, elvokante, dek jarojn poste, la animon de la kompatinda ŝipo kies la disrompaĵoj ĉirkaŭis min... Tre malproksime en la markolo, la ŝtormo sovaĝis; la flamo de la bivako kliniĝis sub la ventopuŝo; kaj mi aŭdis nian barkon danci ĉe la piedo de la rokoj knarigante sian ligkablون.

La Doganistoj.

La boato Emilia, de **Porto-Vekio**, surŝipe de kiu mi faris tiun malgajigan vojaĝon al la insuloj Lavezio, estis malnova ŝipo de la dogano, duonferdekita, kie oni havis por ŝirmi sin de la vento, de la ondoj, de la pluvo, nur iun etan gudritan rufon, apenaŭ sufiĉe larĝa por enhavi tablon kaj du ŝiplitojn. Tial necesis vidi niajn maristojn dum ŝtorma vetero. La vizaĝoj disfluetis, la tramalsekigitaj marmanteloj vaporis kiel tolaĵo en la sekigejo, kaj mezvintre la kompatinduloj tiel trapasis plenajn tagojn, eĉ noktojn, kaŭrantaj sur siaj malsekaj benkoj, frostotremante en tiu malsana malsekeco; ĉar oni ne povis surŝipe bruligi fajron, kaj la marbordo ofte estis malfacile atingebla... Nu, ne unu el tiuj viroj plendis. Dum la plej severa vetero, mi ĉiam vidis ĉe ili la saman serenecon, la saman bonan humoron. Kaj tamen kia malĝoja vivo estas tiu de tiuj ĉi doganaj maristoj !

Preskaŭ ĉiuj edziĝintaj, havantaj edzinon kaj infanojn sur tero, ili restas dum monatoj ekstere, boardante laŭlonge de tiuj tiom danĝeraj marbordoj. Por nutri sin, ili havas malmulte pli ol mucidan panon kaj sovaĝajn cepojn. Neniam vinon, neniam viandon, ĉar viando kaj vino multekostas kaj ili perlaboras nur po kvincent frankoj^[17] jare ! Kvincent frankojn jare ! Vi imagas ĉu la kabano tie ĉe la marista gastejo devas esti nigra, kaj ĉu la infanoj devas iri nudpiede !... Ne gravas ! ĉiuj tiuj homoj ŝajnas kontentaj. Estis ĉe la malantaŭo, antaŭ la rufo, grandan kuvon plenan de pluvakvo kie la ŝipanaro venadis trinki, kaj mi memoras ke, tuj post la lasta glutaĵo, ĉiu el tiuj ĉi kompatindaj diabloj skuis sian pokaletan kun iu "Ha !..." pro kontentiĝo, esprimo

17 500 francaj frankoj de tiu epoko valorus nun (2015) ĉirkaŭ 1.600€.

de samtempe komika kaj kortuŝa bonstato.

La plej gaja, la plej kontenta el ĉiuj estis iu eta bonifaciano sunbrunigita kaj dikmalalta, kiun oni nomis Palomboⁿ. Ĉi tiu nur kantadis, eĉ dum la plej ŝtorma vetero. Kiam la ondo fariĝis peza, kiam la ĉielo malheligita kaj plennuba pleniĝis per grajloj, kaj ke oni ĉiuj estis tie, la nazon supren, la mano sur la ŝkoto, atendante la ventopuŝon kiu baldaŭ venos, tiam, en la surŝipaj silentego kaj malsereneco, la trankvila voĉo de Palombo komenciĝis :

Ne, mia sinjoro !

Estas tro da honoro.

Lizeta estas sa...aĝa,

Restas en la vila...aĝo...

Kaj la skualo vane blovis, faris ĝemi la rigojn, skuis kaj inundis la barkon, la kanto de la doganisto senŝanĝe daŭrigis, balancita kiel mevo ĉe la pinto de la ondoj. Kelkfoje vento tro laŭte akompanis, oni ne plu aŭdis la parolojn; sed inter ĉiu impetega ondegado, en la fluado de la akvo kiu elgutis, la malgranda rekantaĵo ĉiam revenis :

Lizeta estas sa...aĝa,

Restas en la vila...aĝo...

Iam, tamen, kiam fortege blovis kaj pluvis, mi ne aŭdis lin. Estis tiel eksterordinare, ke mi elirigis la kapon el la rufo :

- Hej ! Palombo, oni do ne plu kantas ?

Palombo ne respondis. Li estis senmova, kuŝinta sub sia benko. Mi proksimiĝis al li. Liaj dentoj klakadis; lia tuta korpo tremis pro febro.

- Li havas *punturon*, malgaje diris al mi liaj kamaradoj.

Tio kion ili nomas *punturon* estas torakdoloro, la pleŭrito. Ĉi tiu granda plumbokolora ĉielo, ĉi tiu elgutanta barko, ĉi tiu kompatinda februlo envolvita en malnova mantelo el kaŭĉuko kiu brilis sub la pluvo kiel fokpelto, mi

neniam vidis ion pli malgajiga. Baldaŭ la malvarmo, la vento, la skuado de la ondoj pligravigis lian malsanon. La deliro kaptis lin; necesis alteriĝi.

Post multe da tempo kaj da penadoj, ni eniris ĉirkaŭ la vespero en malgranda senfrukta kaj silenta haveno, kiun vigligis nur la cirkla flugo de kelkaj marbirdoj. Tute ĉirkaŭ la strando stariĝis altaj krutaj rokoj, interplektitaj makisoj de arbustoj verdaj, el malhela verdo, sen sezono. Suben, ĉe la akvorando, malgranda blanka domo kun grizaj ŝutroj : estis la doganejo. Meze de tiu ĉi dezerto, tiu konstruaĵo de la ŝtato, numerita kiel kaskedo de uniformo, aspektis malĝoja. Estas tie kie oni elŝipigis la malfeliĉan Palomboⁿ. Malĝoja azilo por malsanulo ! Ni trovis la doganiston manĝantan apud la fajrujo kun lia edzino kaj liaj infanoj. Ĉiuj tiuj ĉi havis malgrasegajn flavajn mienojn, plidikigitajn okulojn, ŝvelantajn pro febro. La patrino, ankoraŭ juna, kun suĉinfano sur la brakoj, tremetis parolante al ni.

- Estas terura oficejo, mallaŭte diris al mi la inspektoro. Ni estas devigitaj ŝanĝi niajn doganistojn ĉiujn du jarojn. La marĉa febro foruzas ilin...

Tamen necesis venigi kuraciston. Ne estis unu antaŭ **Sarteno**, tio estas ses aŭ ok leŭgojn^[18] foren. Kiel fari ? Niaj maristoj estis elĉerpitaj; estis tro malproksime por sendi unu el la infanoj. Tiam, la virino, kliniĝante eksteren, alvokis :

- Franĉjo !... Franĉjo !

Kaj ni vidis eniri grandan knabegon, bone fortikan, veran tipon de ŝtelĉasisto aŭ de bandito kun lia ĉapo el bruna lano kaj lia marmantelo el kaprina felo. Elŝipiĝinte mi jam rimarkis lin, sidanta antaŭ la pordo, kun lia ruĝa pipo inter la dentoj, fusilo inter la kruroj; sed mi ne scias kial, li fuĝis ĉe nia alproksimiĝo. Eble li kredis ke ni havis ĝendarmojn kun

ni. Kiam li eniris, la doganistino iomete ruĝiĝis.

- Li estas mia kuzo... ŝi diris al ni. Nenia danĝero ke tiu ĉi perdiĝas en la makiso.

Poste ŝi mallaŭte parolis al li, montrante la malsanulon. La viro riverencis sen respondi, eliris, fajfis al sia hundo, kaj jen li forinta kun fusilo sur ŝultro, saltante de roko al roko per siaj longaj kruroj.

Dum tiu tempo, la infanoj, kiujn la ĉeesto de la inspektoro ŝajnis teruri, rapide finis sian vespermanĝon de kaŝtanoj kaj de Brucio (kazeo). Kaj ĉiam akvo, nur akvo sur la tablo! Kaj tamen estus bonege, iomete da vino, por tiuj etuloj. Ha! Mizero! Fine la patrino supreniris enlitigi ilin; la patro, flamigante sian manlanternon, iris ekzameni la marbordon, kaj ni restis apud la fajrujo por varti nian malsanulon kiu turniĝadis sur sia litaĵo, kvazaŭ li ankoraŭ esti marmeze skuita de la ondegtoj. Por iom mildigi lian punturon, ni varmigis rulŝtonojn, brikojn kiujn ni metis ĉe lian flankon. Unu aŭ dufoje, kiam mi alproksimiĝis al lia lito, la malfeliĉulo rekonis min kaj, por danki min, penege etendis al mi la manon, iun dikan manon, raspan kaj varmegan kiel unu el tiuj brikoj eltiritaj el la fajro...

Malĝoja vespertempo! Ekstere, la veteraĉo rekreskis ĉe la noktiĝo, kaj estis frakaso, rulbruo, ŝprucado de ŝaŭmo, la batalo de rokoj kaj de akvo. De tempo al tempo, la ventoblovo el la marmezo sukcesis gliti sin en la golfeton kaj envolvis nian domon. Oni ekkomprenis tion per subita kreskado de la flamo kiu abrupte lumigis la senĝojajn vizaĝojn de la maristoj, amasigitaj ĉirkaŭ la kameno kaj rigardantaj la fajron kun tiu senemocieca esprimo kiun donas la kutimiĝo al la grandaj spacoj kaj la similaj horizontoj. Kelkfoje ankaŭ, Palombo dolĉe plendis. Tiam ĉiuj okuloj turnis sin al la malluma angulo kie la kompatinda kamarado estis mortanta for de siaj familianoj, sen sukuro; la

brustoj ŝveliĝis kaj oni aŭdis pezajn sopirĝemojn. Estas ĉio kiun elŝiris el tiuj laboristoj de la maro, paciencaj kaj mildaj, la sento de ilia propra malbonsorto. Neniu ribelo, neniu striko. Iu sopirĝemo, kaj nenio pli !... Jes tamen, mi eraras. Preterpasante antaŭ mi por ĵeti faskon al fajro, unu el ili mallaŭte diris al mi per afliktita voĉo :

- Komprenu, sinjoro... Ni havas kelkfoje multe da turmentoj en nia metio !...

La Preposto de Kukunjano.

Ĉiujare okaze de la Kandelfesto, la provencaj poetoj eldonas en Avinjono gajan libreton ĝisrande plena de belaj versoj kaj beletaj fabeloj. Tiu de ĉi tiu jaro ĵus alvenas al mi, kaj mi trovas en ĝi ĉarmegan fableton kiun mi tuj provos por vi traduki ĝin iom mallongigante... Geparizanoj, etendu viajn korbegojn. Tio estas la fajna provenca tritikfaruno kiun ĉifoje oni tuj servos al vi...

La pastro Marteno estis preposto... de Kukunjano.

Bona kiel pano, sincera kiel pura akvo, li patre amis siajn gekukunjananojn; laŭ li, lia Kukunjano estintus la paradizo sur la tero se la gekukunjananoj donintus al li iom pli da kontentiĝo. Sed, bedaŭrinde ! la araneoj ŝpinis en lia konfesejo, kaj ĉe la bela tago de Pasko, la hostioj restis funde de lia sankta hostiujo. La bona pastro, pro tio, sentis sian koron vundetitan kaj ĉiam li petis de Dio la favoron ne morti antaŭ ol revenigi al la gregejo sian disan paŝtataron.

Nu, vi baldaŭ scios ke Dio aŭdis lin.

Iun dimanĉon, post la Evangelio, S^{ro} Marteno supreniris en la ambonon (predikejon).

- Miaj fratoj, li diris, vi kredos min se vi volas, la alian nokton, mi troviĝis, mi mizera pekulo, ĉe la pordo de paradizo.

Mi frapis; sankta Petro malfermis al mi !

- Ha ! Estas vi, mia brava sinjoro Marteno, li eligis al mi; kia bona vento...? Kaj kio estas por via servo ?

- Bela sankta Petro, vi kiu tenas la libregon kaj la ŝlosilon, ĉu vi povus diri al mi, se mi ne estas tro scivolema, kiom vi havas da gekukunjananoj en la paradizo ?

- Mi povas nenion rifuzi al vi, sinjoro Marteno; sidigu vin, ni kune tuj rigardos la aferon.

Kaj sankta Petro ekprenis sian dikan libron, malfermis ĝin, surmetis siajn nazumojn :

- Ni vidu iom : Kukunjano, ni diras. Ku... ku ... Kukunjano. Jen, ni estas. Kukunjano... Mia brava sinjoro Marteno, la paĝo estas tute blanka. Ne eĉ unu animo... Ne pli da gekukunjananoj ol da fiŝostoj en meleagro.

- Kiel ! Neniu Kukunjano ĉi tie ? Neniu ? Ne eblas ! Rigardu pli bone...

- Ne unu, sankta viro. Mem rigardu se vi opinias ke mi ŝercas.

Haha ! Mi ja piedfrapadis kaj kun la kunmetitaj manoj, mi petis kompaton. Tiam sankta Petro :

- KREDU min, sinjoro Marteno, ne bezonas esti tiel distaŭzita pro tio, ĉar vi povus esti trafita de kelka malbona sangalfluo. Ne estas via kulpo, finfine. Viaj gekukunjananoj, komprenu, devas certe travivi sian malgrandan kvarantenon en la purgatorio.

- Ha ! pro karitato, granda sankta Petro ! faru ke mi povu almenaŭ vidi ilin kaj konsoli ilin.

- Volonte, mia amiko... Prenu, rapide surmetu ĉi tiujn sandalojn, ĉar la ceteraj vojoj ne estas belaj... Jen kiu estas bone... Nun, paŝadu rekte antaŭ vi. Ĉu vi vidas tien, ĉe la fundo, turnante ? Vi trovos arĝentan pordon tute kovrita de nigraj krucoj... dekstren... Vi frapos, oni malfermos al vi... Adiaŭ ! Gardu vin sana kaj vigleta.

Kaj mi paŝis... mi paŝadis ! Kia ĉasesploro ! Mi havas la anseran haŭton, nur rememorante tion. Iu malgranda pado plena de rubusoj, de karbunkoloj kiuj brilis kaj de serpentoj kiuj siblis, alkondukis min ĝis la arĝenta pordo.

- Tok ! Tok !

- Kiu frapas ! eligis al mi raŭka kaj plorema voĉo.

- La preposto de Kukunjano.

- De...?

- De Kukunjano.

- Ha !... Eniru.

Mi eniris. Iu granda bela anĝelo kun flugiloj malhelaj kiel la nokto, kun robo brilega kiel la tago, kun ŝlosilo el diamanto pendita al sia zono, skribis kra-kra, en granda libro pli dika ol tiu de sankta Petro...

- Fine, kion vi volas kaj kion vi petas ? diris la anĝelo.

- Bela Dianĝelo, mi volas scii - mi eble estas tre sciema - ĉu vi havas ĉi tie la gekukunjananojn.

- La ?

- La gekukunjananojn, la homojn de Kukunjano..., de kiuj mi estas ilia preĝisto.

- Ha ! La pastro Marteno, ĉu ne ?

- Por servi vin, sinjoro anĝelo.

- Vi do diras Kukunjano...

Kaj la anĝelo malfermas kaj foliumas sian grandan libron, malsekigante sian fingron per salivo por ke la folio pli bone glitu...

- Kukunjano, li diris longe suspirante... Sinjoro Marteno ni havas en la purgatorio neniun el Kukunjano.

- Jesu' ! Mari' ! Jozefo ! Neniun el Kukunjano en la purgatorio ! Ho granda Dio ! Kie do ili estas ?

- Hej ! Sankta viro, ili estas en paradizo. Kie diable vi volas ke ili estu ?

- Sed mi ĵus venis de la paradizo...

- Vi ĵus venis de tie !... Nu ?

- Nu ! Ili ne estas tie !... Ha ! Bona patrino de la anĝeloj !...

- Kion vi volas, sinjoro Preposto ? Se ili estas nek en la paradizo nek en la purgatorio, ne ekzistas interloko, ili estas...

- Sankta Kruco ! Jesu', filo de Davido ! Aj ! Aj ! Aj !
Ĉu eblas ?... ĉu estus mensogo de la granda sankta Petro ?...
Tamen, mi ne aŭdis kanti la virkoko !... Aj ! Ni estas
kompatindaj ! Kiel mi iros al paradizo se miaj gekukunjananoj
ne estas tie ?

- Aŭskultu, mia kompatinda sinjoro Marteno, ĉar vi
volas, je kia ajn kosto, esti certa pri ĉio ĉi, kaj vidi per viaj
okuloj, tion kio okazis, sekvu tiun ĉi padon, rapide kuru se vi
kapablas kuri... Vi maldekstre trovos grandan portalon. Tie
vi informiĝos pri ĉio. Dio donas tion al vi !

Kaj la anĝelo fermis la pordon.

Estis longa vojeto tute pavimita de ruĝaj braĝoj. Mi
ŝanceliĝis kvazaŭ mi estis drinkinta; mi ĉiupaŝe stumblis; mi
ŝvitegis, ĉiu haro de mia korpo havis sian ŝvitguton kaj mi
anhelis pro soifo... Sed, vere, dank'al la sandaloj kiujn la
bona sankta Petro pruntedonis al mi, mi ne bruligis miajn
piedojn.

Kiam mi lampaŝe faris sufiĉe da mispaŝoj, mi vidis al mia
maldekstra mano, pordon... ne, portalon, grandegan portalon
tute oscedantan, kiel la pordo de granda forno. Ho ! Infanoj
miaj, kia spektaklo ! Tie oni ne demandas mian nomon; tie
tute ne da registro. Po plenfornoj tra malfermega pordo, oni
eniras tien, miaj fratoj, kiel dimanĉe vi eniras en drinkejon.

Mi abunde ŝvitegis, kaj tamen mi estis frostita, mi
tremetadis. Miaj haroj hirtiĝis. Mi flaris brulaĵon, rostitan
karnon, ion kiel la odoron kiu etendiĝas en nia Kukunjano kiam
Elojo, la hufoferisto, bruligas la hufon de maljuna azeno por
ĝin hufferi. Mi senspiriĝis en tiu fetora kaj arda aero; mi
aŭdis abomenan muĝadon, ĝemadojn, hurladojn kaj
blasfemojn.

- Nu ! Ĉu vi ja eniras aŭ ne eniras ? - eligis al mi,
pikante min per sia forko, kornhava demono.

- Mi ? Mi ne eniros. Mi estas amiko de Dio.

- Vi estas amiko de Dio... Ej! Sp... de favulo! Kion vi venas fari ĉi tie?...

- Mi venas... Ha! Ne parolu al mi pri tio, mi ne plu povas stari sur miaj kruroj... Mi venas... Mi venas de malproksime... humile demandi al vi... ĉu... ĉu pro sortobato... vi ne havus ĉi tie... iun... iun el Kukunjano...

- Ha! Fajro de Dio! Vi ja ŝajnigas frenezulon, kvazaŭ vi ne sciis ke tuta Kukunjano estis ĉi tie. Hej, malbela korvo, rigardu, kaj vi vidos kiel ni aranĝas ilin ĉi tie viajn damnitajn gekukunjananojn...

Kaj mi vidis, meze de terura flamokirlo :

La alta **Gajlkolora** Virkoko - vi ĉiuj konis lin, miaj fratoj - Gajlkolora Virkoko kiu tiom ofte ebriiĝis, kaj tiom ofte admonis sian kompatindan Klarionoⁿ.

Mi vidis Katerinoⁿ... tiun malgrandan fiulinon... kun ŝia nazo supren... kiu dormis tute sola en la garbejo... Vi rememoras pri ŝi, miaj geknaboj!... Sed ni preterlasu, mi tro diris pri ŝi.

Mi vidis Paskaloⁿ Peĉofingron kiu faris sian oleon per la olivoj de S^{ro} Juliano.

Mi vidis Elizabetaⁿ, la spikumantino kiu spikumante, por esti pli rapide nodinta sian garbon, plenmane ĉerpis en la garbaro.

Mi vidis mastron Grapasioⁿ kiu tiel bone oleis la radon de sia ĉarumo.

Kaj Delfenaⁿ kiu tiom multekoste vendis la akvon de sia puto.

Kaj la Tordiĝoⁿ kiu, kiam li renkontis min kunportanta la bonan Dion, rapidis laŭ sia vojo kun la bereto sur la kapo kaj la pipo en la buŝo... kaj fiera kiel pavo... kvazaŭ li renkontis hundon.

Kaj Mevoⁿ kun sia Zeta, kaj Jakoboⁿ, kaj Petroⁿ, kaj Tonioⁿ...

Emociita, palega pro timo, la aŭskultantaro ĝemis vidante en la tute malfermita infero, tiu sian patron kaj tiu sian patrinnon, tiu sian avinnon kaj tiu sian fratinnon...

- Vi bone sentas, miaj gefratoj, reparolis la bona pastro Marteno, vi bone sentas ke tio ne povas daŭri. Mi respondecas pri animoj, kaj mi volas, mi volas savi vin de la abismo kien vi ĉiuj estas ruliĝantaj kun kapo antaŭen. Morgaŭ mi komencos la laboron, ne pli malfrue ol morgaŭ. Kaj la laboro ne mankos ! Jen kiel mi agos. Por ke ĉio bone okazos, necesas bonorde fari ĉion. Ni iros vicon post vico, kiel en Ĵonkiero kiam ni dancas.

Morgaŭ lundon, mi konfesos la maljunulojn kaj la maljunulinojn. Tio ne estas nenio.

Mardon, la infanojn. Tio estos rapide plenumita.

Merkredon, la knabojn kaj la knabinojn. Tio povos esti longa.

Ĵaŭdon, la virojn. Ni mallongigos.

Vendredon, la virinojn. Mi diros : Neniajn fabelojn !

Sabaton, la mueliston !... Unu tago ne estas tro por li tutsola.

Kaj se dimanĉon ni estos finintaj, ni estos tre feliĉaj.

Komprenu, miaj infanoj, kiam la tritiko estas matura, necesas falĉi ĝin; kiam la vino estas ĉerpita, necesas trinki ĝin. Jen sufiĉe da malpura tolaĵo, nepras lavi ĝin, kaj bone lavadi ĝin.

Estas la indulgo kiun mi deziras al vi. Amen !

Tio kio estis dirita, estis farita. Oni metis la lavtolaĵon al la lavado.

Ekde tiu memorinda dimanĉo, la parfumo de la virtoj de Kukunjano spiriĝas ĝis dek leŭgoj^[19] ĉirkaŭe.

Kaj la bona pastro S^{ro} Marteno, feliĉa kaj plena de ĝojego, songiĝis dum la alia nokto ke, sekvita de sia tuta

19 10 leŭgoj estas proksimume 40 Km.

fidelularo, li grimpis kun splenda procesio meze de flamigitaj kandeloj, de nubo de incenso kiu bonodorigis kaj de diservaj infanoj kiuj kantis Tedeumon, la lumigitan vojon al la urbo de Dio.

Kaj jen la rakonto de la preposto de Kukunjano, tiel kiel tiu granda trampo Rumanio, kiu mem sciiĝi pri tio de alia bona kunulo, ordonis al mi diri ĝin al vi.

La Gemaljunuloj.

Iun leteron, patro Azano ?

- Jes, sinjoro... ĝi venis el Parizo.

Li tute fieris ke ĝi venis de Parizo, tiu brava patro Azano... Ne mi. Io diris al mi ke tiu Parizaĵo de la strato Johano-Jakobo, falanta neatendite kaj tiel frumatene sur mian tablon, estis tuj perdigonta al mi mian tutan tagon. Mi ne eraris, prefere vidu :

Necesas ke vi faru al mi servon, mia amiko. Vi tuj fermos vian muelejon dum unu tago kaj tuj iros al Eiguero^[20]... Eiguero estas grava urbeto je tri aŭ kvar leŭgoj^[21] de via hejmo - ia promenado. Alvenante, vi demandas la monaĥinejon de la orfinoj. La unua domo post la monaĥinejo estas malalta domo kun grizaj ŝutroj kaj ĝardeneto malantaŭe. Vi eniros sen frapi - la pordo ĉiam estas malfermita - kaj, enirante, vi laŭtege krios : "Saluton, bravuloj ! Mi estas la amiko de Maŭrico..." Tiam vi vidos du etajn gemaljunulojn, ho ! sed maljunaj, maljunaj, arkimaljunaj, etendi al vi la brakojn funde de siaj grandaj brakseĝoj, kaj vi kisos ilin je mia nomo per via tuta koro, kvazaŭ ili estus al vi. Poste vi babilos; ili parolos al vi pri mi, nur pri mi; ili rakontos al vi mil malsaĵaĵojn kiujn vi aŭskultos sen ridi... Vi ne ridos, ĉu ne ?... Tiuj estas miaj geavoj, du estuloj kies mi estas la tuta vivo kaj kiuj ne vidis min de antaŭ dek jaroj... Dek jaroj, tio estas longa ! Sed kion vi volas ? Mi, Parizo tenas min; ilin, estas la maljuneco... Ili estas tiel maljunaj, se ili venis vidi min, ili rompiĝus sur la vojo... Feliĉe, vi estas tie, mia kara muelisto, kaj brakumante vin, la kompatinduloj kredos iom kisi min mem... Mi tiel ofte parolis al ili pri ni kaj pri tiu bona amikeco kies...

20 Eiguero estas francaj komunumoj lokitaj sude de la Alpiloj.

21 1 leŭgo proksime valoras 4Km (depende de la lando).

La diablo glutu la amikecon ! Ĝuste tiun matenon, la vetero estis admirinda, sed kiu nenion valoris por trakuri la vojojn : tro da mistralo kaj tro da suno, vera tago de Provenco. Kiam tiu damnita letero alvenis, mi jam elektis mian sunan lokon inter du rokoj, kaj mi revis resti tie dum la tuta tago, kiel la lacerto, profitante de la lumo, aŭskultante kanti la pinoj... Nu, kion vi volas fari ? Mi grumblante fermis la muelejon, metis la ŝlosilon sub la **katklapo**. Mia bastono, mia pipo, kaj jen mi foririnta.

Mi alvenis en Eiguieroⁿ ĉirkaŭ la dua. La vilaĝo estis senhoma, ĉiuj en la kampo. En la ulmoj de la korso, blankaj pro polvo, la cikadoj kantis kiel meze de Kro^[22]. Fakte estis sur la placo de la urbodomo, azeno kiu lacertumis sub la suno, flugo de kolomboj ĉe la fontano de la preĝejo; sed nenion por indiki al mi la orfinejon. Feliĉe maljuna feino subite aperis al mi, kaŭrinta kaj ŝpinanta en la kavaĵo de ŝia pordo. Mi diris al ŝi tion kion mi serĉis; kaj ĉar tiu ĉi feino estis tre potenca, ŝi bezonis nur levi sian ŝpinbastonon : Tuj la monaĥinejo de la orfinoj stariĝis antaŭ mi kiel magie... Estis granda malgaja kaj nigra domo, tute fiera montri supre de ĝia ogiva portalo, iun malnovan krucon el ruĝa grejso kun iom da latino ĉirkaŭe. Apud tiu domo, mi ekvidis alian pli malgrandan. Grizajn ŝutrojn, ĝardenon malantaŭe... Mi tuj rekonis ĝin, kaj eniris sen frapi.

Mi revidos dum mia tuta vivo tiun longan koridoron freŝan kaj trankvilan, la roze farbitan muregon, la ĝardeneton kiu tremis, funde tra helkolora rulkurteno kaj sur ĉiuj paneloj, malfreŝajn florojn kaj violonojn. Ŝajnis al mi ke mi alvenis ĉe iu maljuna prefekto dum la epoko de **Sedeno**... Ĉe la fino de la koridoro, maldekstren tra duone malfermita pordo, oni aŭdis la tiktakadon de dika horloĝo kaj voĉon de infano, sed de infano en lernejo, kiu legis haltante

22 Kro (france : Crau) estas paleo-delta de la rivero Duranco.

post ĉiu silabo : Ti-am san-kta I-re-ne-o ek-kri-is : Mi es-tas la tri-ti-ko de la Di-si-njo-ro. Ne-ce-sas ke mi es-tu mu-e-li-ta per la den-to de ti-uj bes-toj... Mi diskrete alproksimiĝis al tiu pordo kaj rigardis.

En la kvieteco kaj la duonlumo de ĉambreto, iu bona maljunulo kun rozaj pometoj, faltoplena ĝis la fingropintoj, dormis funde de brakseĝo, kun la buŝo malfermita, kaj la manoj sur siaj genuoj. Ĉe liaj piedoj, iu knabino blue vestita - granda pelerino kaj malgranda infankufo, la kostumo de la orfinoj - legis La Vivon de Sankta Ireneo en libro pli dika ol ŝi... Tiu mirakla legado efikis al la tuta domanaro. La maljunulo dormis en sia brakseĝo, la muŝoj sur la plafono, la kanarioj en ĝia kaĝo, tie ĉe la fenestro. La dika horloĝo ronkis, tiktako, tiktako. Estis vigla en la tuta ĉambro nur granda lumstrio kiu falis rekta kaj blanka inter la fermitaj ŝutroj, plena de vivaj fajreroj kaj mikroskopaj valsoj... Meze de la ĝenerala duondormo, la infano serioze daŭrigis sian legadon : Tuj du leo-noj ĵet-is sin sur lin kaj for-man-ĝis lin... Estas ĉe tiu momento ke mi eniris... La leonoj de sankta Ireneo enfalantaj en la ĉambro ne kaŭzintus pli da konsternego ol mi. Vera teatrofrapo ! La knabineto eligis krion, la dika libro falis, la kanarioj, la muŝoj vekigis, la murhorloĝo sonoris, la maljunulo eksalte stariĝis, tute konsternita, kaj mi mem, iom konfuzita, mi haltis sur la sojlo laŭtege kriante :

- Saluton, bravuloj ! Mi estas la amiko de Maŭrico.

Ho ! Tiam, se vi vidis lin, la kompatinda maljunulo, se vi vidis lin veni al mi kun la brakoj etenditaj, brakumi min, premi al mi la manojn, delire kuri en la ĉambro, eligante :

- Dio mia ! Dio mia !...

Ĉiuj sulkoj de lia vizaĝo ridis. Li estis ruĝa. Li balbutis :

- Ha ! Sinjoro... Ha ! Sinjoro...

Poste li iris al la fundo alvokante :

- Panjeto !

Iu pordo kiu malfermiĝis, ia trotado de muso en la koridoro... Estis panjeto. Nenio tiel beleta kiel tiu eta maljunulino kun ŝia reto por hartubero, ŝia helbruna robo kaj ŝia brodita ŝalo kiun ŝi tenis en la mano por honori min laŭ la malnova modo... Kortuŝa detalo ! ili similis unu la alian. Kun falsa bukla hararo kaj flavaj harretoj, li ankaŭ povintus nomiĝi Panjeto. Sed la vera Panjeto devis multe plori dum sia vivo, kaj ŝi estis eĉ pli sulkiĝinta ol la alia. Kiel la alia ankaŭ ŝi havis apud si infaninon el la orfinejo, etan gardistinon en blua pelerino, kiu neniam forlasis ŝin; kaj vidi tiujn ĉi gemaljunojn protektitajn de tiuj ĉi orfinoj, estis tio kion oni povas imagi kiel plej kortuŝa.

Enirante Panjeto komencis fari al mi grandan klinsaluton, sed per sia interveno, la maljunulo interrompis ŝin :

- Li estas la amiko de Maŭrico...

Tuj jen ŝi kiu ekstremitis, kiu ploris, perdis sian ŝalon, kiu ruĝiĝis, tute ruĝa, eĉ pli ruĝa ol li... Tiuj gemaljunuloj ! Ili havis nur unu guton da sango en la vejnoj, kaj ĉe la plej eta emocio ĝi alfluis al ilia vizaĝo...

- Rapide, rapide, seĝon... diris la maljunulino al sia knabineto.

- Malfermu la ŝutrojn... kriis la maljunulo al la sia.

Kaj, ĉiu prenante min per iu mano, ili trotetante kondukis min ĝis la fenestro kiun oni tutlarĝe malfermis, por pli bone vidi min. Oni proksimigis la brakseĝojn, mi sidiĝis inter ambaŭ sur faldseĝo, la bluaj etulinoj malantaŭ ni, kaj la pridemandado komencis :

- Kiel li fartas ? Kion li faras ? Kial li ni venas ? Ĉu li estas kontenta ?

Kaj tiel plu ! Tiel plu ! Tiel dum horoj.

Mi ja respondis kiel eble plej bone al ĉiuj iliaj demandoj, donante pri mia amiko la detalojn kiujn mi sciis, aŭdace elpensante tiujn kiujn mi ne sciis, ĉefe evitante konfesi ke mi neniam rimarkis, ĉu liaj fenestroj bone fermis aŭ el kiu koloro estis la tapeto de lia ĉambro.

- La tapeto de lia ĉambro... ĝi estas blua, sinjorino, helblua, kun girlandoj...

- Ĉu vere ? Eligis la kompatinda maljunulino kortuŝita: kaj ŝi aldonis, turnante sin al sia edzo : Li estas tiel brava infano !

- Ho ! Jes, li estas brava infano ! ripetis la alia entuziasme.

Kaj dum la tuta tempo kiam mi parolis, estis inter ili balancoj de kapo, subtilaj etaj ridoj, palpebrumadoj, indulgaj mienoj, aŭ eĉ ankoraŭ la maljunulo kiu proksimiĝis por diri al mi :

- Parolu pli laŭte... ŝi havas la orelon iom surdan.

Kaj ŝi siaflanke :

- Iom pli laŭte, mi petegas vin !... Li ne bonege aŭdas...

Tiam mi plilaŭtigis la voĉon; kaj ambaŭ dankis min per rideto; kaj en tiuj kadukaj ridetoj kiuj kliniĝis al mi, serĉantaj ĝis funde de miaj okuloj la bildon de ilia Maŭrico, mi ja estis tre kortuŝita pro retrovi ĝin, tiun bildon, malnetan, konfuzan, preskaŭ nepercepteblan, kvazaŭ mi vidis mian amikon rideti al mi, de tre malproksime, en nebulo.

Subite la maljunulo rektiĝis sur sia brakseĝo :

- Sed mi pensas pri tio, Panjeto..., li eble ne tagmanĝis !

Kaj Panjeto, konsternita, kun brakoj supren :

- Ne tagmanĝinta !... Granda Dio !

Mi kredis ke temis denove pri Maŭrico, kaj mi estis respondonta ke tiu brava infano neniam atendis pli malfrue ol tagmezo por altablighi sin. Sed ne, temis ja pri mi kiun oni parolis; kaj necesis vidi kiu tumulto kiam mi konfesis ke mi

estis ankoraŭ nemanĝinta :

- Rapide la manĝilaron, etaj bluulinoj ! La tablo mezen de la ĉambro, la dimanĉan tablotukon, la telerojn kun floroj. Kaj ni ne tiom ridu, bonvolu ! Kaj ni rapidu...

Mi vere kredis ke ili hastis. Apenaŭ la tempon por rompi tri telerojn, la tagmanĝo troviĝis servita.

- Bonan etan tagmanĝon ! diris al mi Panjeto kondukante min al la tablo; sed vi estos tute sola... Ni, ni jam manĝis tiun matenon.

Tiuj kompatindaj maljunuloj ! Kiam ajn oni surprizas ilin, ili ĉiam manĝis matene.

La bona eta tagmanĝo de Panjeto estis iom da lakto, daktiloj kaj barkforma torteto, io kiel brogokuko; sufiĉe por nutri ŝin kaj ŝiajn kanariojn minimume dum ok tagoj... Kaj vidi ke nur mi finmanĝis ĉiujn ĉi proviantojn !... Tial, kia indigno ĉirkaŭ la tablo ! Kiel la etaj bluulinoj flustris donante kubutpuŝojn unu la alian, kaj tie, funde de sia kaĝo, kiel la kanarioj ŝajnis diri unu la alian : "Ho ! Tiu sinjoro kiu manĝas la tutan torteton !"

Mi manĝis ĝin tute, fakte, kaj preskaŭ sen rimarki tion, absorbita kiel mi estis pro rigardi ĉirkaŭ mi en tiu ĉi lumplena kaj kvieta ĉambro kie ŝvebis kiel odoron de malnovaj aferoj... Estis ĉefe du malgrandaj litoj al kiuj mi ne kapablis dekroĉi miajn okulojn. Ĉi tiuj litoj, preskaŭ du luliloj, mi imagis al mi ilin dum la mateno, ĉe la tagiĝo, kiam ili estas ankoraŭ dronigitaj sub siaj grandaj kurtenoj kun franĝoj. La tria sonis. Estis la horo kiam ĉiuj gemaljunuloj vekigis :

- Ĉu vi dormas, Panjeto ?
- Ne, mia amiko.
- Maŭrico estas brava infano, ĉu ne ?
- Ho ! Jes, li estas brava infano.

Kaj mi tiel imagis tutan konversacion, nur pro esti vidinta tiujn ĉi du malgrandajn litojn de maljunuloj, starigitaj unu apud la alia...

Dum tiu tempo, terura dramo okazis ĉe la alia fino de la ĉambro, antaŭ la ŝranko. Necesis atingi supren, sur la lastan breton, ian bokalon da brandaj ĉerizoj kiu atendis Maŭricoⁿ de antaŭ dek jaroj kaj kiun oni volis malfermi por mi.

Malgraŭ la petegoj de Panjeto, la maljunulo vlegis iri mem serĉi siajn ĉerizojn; kaj starante sur seĝo malgraŭ la forta timego de lia edzino, li provis trafi supren... Vi mem imagas la scenon, la maljunulo kiu tremas kaj kiu pene leviĝis, la etaj bluulinoj krampataj al lia seĝo, Panjeto malantaŭ li anhelanta, kun la brakoj etenditaj, kaj sur tiu tuto delikatan bonodoron de bergamoto kiu estis elspirita el la malfermita ŝranko kaj el la grandaj stakoj de rufa tuko... Estis ĉarme.

Finfine, post multaj klopodoj, oni sukcesis eltiri ĝin el la ŝranko, tiu ĉi teruran bokalon kaj kun ĝi malnovan tute tuberigitan pokalon el arĝento, la pokalon de Maŭrico kiam li estis etulo. Oni ĝisrande plenigis ĝin da ĉerizoj por mi; Maŭrico tiom ŝatis ilin, la ĉerizojn ! Kaj servante min, la maljunulo diris al mi ĉe la orelon kun frandema mieno :

- Vi ja estas tre bonŝanca pro kapabli manĝi tion... Estas mia edzino kiu preparis ilin... Vi estas gustumonta ion bonan.

Bedaŭrinde lia edzino preparis ilin, sed ŝi forgesis sukero ilin. Kion vi volas ? Oni fariĝas distriĝema, maljuniĝante. Ili estis abomenaj, viaj ĉerizoj, kompatinda Panjeto mia... Sed tio ne malebligis min elmanĝi ilin, ĝis la fino, ne ŝanĝante la mienon.

La manĝo finita, mi ekstariĝis por adiaŭi miajn gastigantojn. Ili tre voluntus iom plue reteni min por babilo pri la brava infano, sed ekmalheliĝis, la muelejo estis for, necesis foriri.

La maljunulo ekstariĝis samtempe kiel mi.

- Panjeto, mian veston... Mi volas akompani lin ĝis la placo.

Kompreneble ke funde de si mem Panjeto opiniis ke jam estis iom friska por konduki min ĝis la placo; sed ŝi nenion manifestis. Nur, dum ŝi helpis lin trapasi la manikojn de lia vesto, bela jako el Hispania tabakkoloro kun perlamotaj butonoj, mi aŭdis la karan estulinon kiu milde diris al li :

- Vi ne revenos tro malfrue, ĉu ne ?

Kaj li, kun petola mieneto :

- Hej! Hej!... Mi ne scias... eble...

Post tio, ili ridante rigardis sin unu la alian, kaj la etaj bluulinoj ridis pro vidi ilin ridi, kaj iliaflanke la kanarioj ankaŭ ridis laŭ ilia maniero... Inter ni, mi kredas ke laodoro de la ĉerizoj iom ebriigis ĉiujn ilin.

...Noktiĝis kiam ni eliris, la avo kaj mi. La eta bluulino sekvis nin de malproksime por revenigi lin; sed li ne vidis ŝin, kaj li estis fiera piediri ĉe mia brako kiel viro. Panjeto, radia, vidis tion de la sojlo de sia pordo, kaj ŝi havis, rigardante nin, beletajn balancojn de kapo kiuj ŝajnis diri : "Tamen, mia kompatinda edzo !... Li ankoraŭ paŝas".

Prozaj Baladoj.

Malfermante ĉimatene mian pordon, estis ĉirkaŭ mia muelejo, granda tapiŝo el blanka frosto. La herbo brilis kaj krakadis kiel vitro; la tuta monteto frostotremis... Dum unu tago, mia kara Provenco alivestis sin kiel la norda lando; kaj estas inter la pinoj franĝitaj de prujno, la tufoj de lavendoj disflorantaj kiel fasketoj el kristalo, ke mi verkis tiujn ĉi du baladojn el iom germana fantazio, dum la frosto sendis al mi siajn blankajn brilojn, kaj ke tie supre, en la hela ĉielo, grandaj trianguloj de cikonioj venantaj de la lando de **Henriko Hejno** malsupreniris al la Kamargo blekante : "Malvarmas... Malvarmas... Malvarmas".

1. La morto de la daŭfeno.

La eta daŭfeno estas malsana, la eta daŭfeno baldaŭ mortos... En ĉiuj preĝejoj de la reĝlando, la Sankta Monstranco restadas ekspoziciita tage kaj nokte, kaj grandaj kandlegoj brulas por la resanigo de la reĝa infano. La stratoj de la malnova rezidejo estas malgajaj kaj silentaj, la sonoriloj ne plu sonoras, la kaleŝoj veturis paŝe... En la ĉirkaŭaĵo de la palaco, la scivolaj burĝoj trarigardas tra la kradaĵoj, svisojn kun oritaj ventregoj kiuj babiladas en la kortoj kun grava mieno.

La tuta kastelo estas malkvieta... Ĉambelanoj, intendantoj, kurante supren- kaj malsupren-iradas la marmorajn ŝtuparojn... La galerioj estas plenaj de paĝioj kaj de korteganoj en vestoj el silko kiuj iras de iu grupo al alia mallaŭte peti novaĵojn... Sur la larĝaj peronoj, la afliktitaj damoj de honoro faras riverencegojn unu la alian, viŝante siajn okulojn per beletaj broditaj poŝtukojn.

En la Oranĝerio, estas granda kunveno de kuracistoj en talaro. Oni vidas ilin tra la fenestraj vitroj, svingi iliajn longajn nigrajn manikojn, majstre klini iliajn harvostajn perukojn^[23]... La gubernisto kaj la eskviro de la eta daŭfeno promenas antaŭ la pordo, atendante la decidojn de la kuracistaro. Kuirhelpistoj pasas apud ili sen saluti ilin. S^{ro} la eskviro sakras kiel fiakristo, S^{ro} la gubernisto deklamas versojn de Horacio... Kaj dum tiu tempo, tie direkte al la staloj, oni aŭdas longan plendan henon. Estas la alzano de la eta daŭfeno kiun la stalistoj forgesas kaj kiu malgaje alvokas antaŭ sian malplenan trogon.

Kaj la reĝo ? Kie estas mia reĝa Moŝto ?... La reĝo enfermis sin tute sola en ĉambro ĉe la fino de la kastelo... La Moŝtuloj ne ŝatas ke oni vidu ilin plori... Pri la reĝino, estas alia afero... Sidante ĉe litkapo de la eta daŭfeno, ŝi havas sian belan vizaĝon banata de larmoj, kaj laŭtege plorĝemas antaŭ ĉiuj, kiel farus drapistino.

En lia liteto el punktoj, la eta daŭfeno, pli blanka ol la kusenoj sur kiuj li kuŝas, ripozas kun la okuloj fermitaj. Oni kredas ke li dormas; sed ne ! La eta daŭfeno ne dormas... Li turnas sin al sia patrino, kaj vidante ke ŝi ploras, li diris al ŝi :

- Sinjorino reĝino, kial vi ploras ? Ĉu vi naive kredas ke mi baldaŭ mortos ?

La reĝino volas respondi. La singultoj malhelpas ŝin paroli.

- Ne do ploru, sinjorino reĝino; vi forgesas ke mi estas la daŭfeno kaj ke la daŭfenoj ne povas tiel morti...

La reĝino ankoraŭ pli laŭte plorĝemas, kaj eta daŭfeno komencas timiĝi.

- Hola, li diris, mi ne volas ke la morto venu kapti min,

23 Laŭvorte tradukita el la franca, estas martelo-peruko kiun oni povas priskribi kiel peruko kun longa tuba buklo enkadrigita de rubandoj.

kaj mi bone kapablos malhelpi ĝin alveni ĝis ĉi tie... Ke oni tuj venigu kvardek fortegajn landskenetojn por gardostari ĉirkaŭ nia lito !... Ke cent dikaj kanonoj nokte kaj tage gvatu kun flamigita meĉo sub niaj fenestroj ! Kaj ve al la morto, se ĝi aŭdacas alproksimiĝi nin !...

Por komplezi al la reĝa infano, la reĝino faras signon. Tuj oni aŭdas la dikajn kanonojn kiuj ruliĝas en la korto; kaj kvardek grandaj landskenetoj kun la halebardoj en la mano venas enviciĝi ĉirkaŭ la ĉambron. Ili estas malnovaj veteranoj kun grizaj lipharoj. La eta daŭfeno klakfrapas la manojn vidante ilin. Li rekonas unu el ili kaj alvokas lin :

- Lotario ! Lotario !

La veterano faras paŝon al la lito :

- Mi bone amas vin, mian maljunan Lotario"... Vidigu iom al mi vian grandan sabron... Se la morto volas kapti min, necesos mortigi ĝin, ĉu ne ?

Lotario respondas :

- Jes, Grandsinjoro...

Kaj li havas du dikajn larmojn kiuj fluas sur siaj tanilkoloraj vangoj.

Tiutempe, la militpastro alproksimiĝas al la eta daŭfeno kaj mallaŭte parolas al li longtempe, montrante al li krucifikson. La eta daŭfeno aŭskultas lin kun tre mirigita mieno, poste subite interrompante lin :

- Mi bone komprenas tion kion vi diras al mi, sinjoro pastro; sed fine ĉu mia amiketo Bepo ne povus morti anstataŭ mi, donante al li multe da mono ?...

La militpastro daŭrigas mallaŭte paroli al li, kaj la eta daŭfeno ŝajnas pli kaj pli mirigita.

Kiam la militpastro estas fininta, la eta daŭfeno suspiregante reparolas :

- Ĉio kion vi nun diris al mi estas tre malĝoja, sinjoro pastro; sed iu afero konsolas min, estas ke tie supre en la

paradizo de la steloj, mi estos ankoraŭ la daŭfeno... Mi scias ke la bona Dio estas mia kuzo kaj certe ne mankos trakti min laŭ mia rango.

Poste li aldonas, turnante sin al sia patrino :

- Oni alportu al mi miajn plej belajn vestojn, mian redingoton el blanka ermeno kaj miajn velurajn kortegajn ŝuojn ! Mi volas fari min eleganta por la anĝeloj kaj eniri en la ĉielon en daŭfena kostumo.

Triafoje, la militpastro klinas sin al la eta daŭfeno kaj mallaŭte parolas al li longtempe... Meze de lia parolado, la reĝa infano kolere interrompas lin :

- Sed tiam, li krias, esti daŭfeno, tio estas tute nenio !

Kaj sen voli aŭdi pli, la eta daŭfeno turnas sin al la murego kaj amare ploras.

2. La Subprefekto en la Kamparo.

S^{ro} subprefekto rondvizitas. Koĉero antaŭe, lakeo malantaŭe, la kaleŝo de la subprefektejo majeste kunportas lin al la regiona konkurso de la Valeto-de-Feinoj. Por ĉi tiu memorinda tago, S^{ro} subprefekto surmetis sian belan broditan veston, sian malgrandan klakĉapelon, sian striktan kuloton kun arĝentaj bandoj kaj sian ceremonian spadon kun tenilo el perlamoto... Sur liaj genuoj kuŝas grandan tekon el gofrita ĉagrino kiun li malgaje rigardas.

S^{ro} subprefekto malgaje rigardas sian tekon el gofrita ĉagrino; li pripensas pri la diabla parolado kiun necesos baldaŭ eldiri antaŭ la loĝantoj de Valeto de Feinoj :

- Gesinjoroj kaj karaj geregatoj...

Sed li vane tordetas la blondan silkon de siaj vangharoj kaj dudekfoje sinsekve ripetas :

- Gesinjoroj kaj karaj geregatoj... la sekvaĵo de la

parolado ne venas.

La sekvaĵo de la parolado ne venas... Estas tiom varme en tiu ĉi kaleŝo !... Ĝis la horizonto, la vojo al Valetto de Feinoj trembrilas sub la suno de la Sudo... La aero estas arda... kaj sur la ulmetoj de la vojrandoj, tute kovritaj de blanka polvo, miloj da cikadoj respondas unu la alian de arbo al arbo... Subite S^{ro} subprefekto tremetas. Tie for, piede de monteto, li ĵus ekvidis malgrandan arbaron da verdaj kverkoj kiu ŝajnas signi lin.

La arbareto da verdaj kverkoj ŝajnas signi lin :

- Venu do, sinjoro subprefekto; por verki vian paroladon, vi estos multe pli bone sub miaj arboj...

S^{ro} subprefekto estas allogita; li malsupren saltas el sia kaleŝo kaj diras al siaj servantoj atendi lin, ke li iris verki sian paroladon en la malgrandan arbaron da verdaj kverkoj.

En la arbareto da verdaj kverkoj estas birdoj, violoj, kaj fontoj sub la delikata herbo... Kiam ili ekvidis S^{ron} subprefekton kun lia bela kuloto kaj lia teko el gofrita ĉagrino, la birdoj ektimis kaj ĉesis kanti, la fontoj ne plu aŭdacis brui kaj la violoj kaŝis sin en la gazono... Tiu tuta malgranda mondo, neniam vidis subprefekton, kaj mallaŭte demandas al si, kiu estas tiu bela Sinjoro kiu promenas en arĝenta kuloto.

Mallaŭte, sub la foliaro, oni sin demandas kiu estas tiu bela Sinjoro en arĝenta kuloto... Dum tiu tempo, S^{ro} subprefekto, kontentega pro la silento kaj la malvarmeto de la arbaro, kuspas la baskojn de sia vesto, metas sian klakĉapelon sur la herbon kaj sidiĝas en la muskon piede de juna kverko; poste li malfermas sur siaj genuoj sian grandan tekon el gofrita ĉagrino kaj eltiras el ĝi larĝan ministran folion.

- Li estas artisto ! diras la silvio.

- Ne, diras la pirolo, li ne estas artisto, ĉar li havas

arĝentan kuloton; li plivole estas princo.

- Li pli ĝuste estas princo, diras la pirolo.

- Nek artisto, nek princo, intermetas maljuna najtingalo kiu kantis dum tuta sezono en la ĝardenoj de la subprefektejo... Mi scias kio tiu estas : li estas subprefekto !

Kaj la tuta arbareto komencas murmureti :

- Li estas subprefekto ! Li estas subprefekto !

- Kiel li estas kalva ! rimarkas alaŭdo kun granda plumtufo.

La violoj demandas :

- Ĉu tio estas malafabla ?

- Ĉu tio estas malafabla ? demandas la violoj.

La maljuna najtingalo respondas :

- Tute ne !

Kaj post tiu certigo, la birdoj rekomencas kanti, la fontoj flui, la violoj bonodori, kvazaŭ la viro ne ĉeestis...

Trankvilanima meze de ĉiu ĉi beleta bruo, S^o subprefekto alpreĝas en sia koro la Muzon de la **kultivantasembleo**, kaj la kraĵono levita, komencas deklami per sia voĉo de ceremonio :

- Gesinjoroj kaj karaj geregatoj...

- Gesinjoroj kaj karaj geregatoj..., diras la subprefekto per sia voĉo de ceremonio...

Iu ekridi interrompas lin; li turnas sin kaj vidas nenion krom dikan pegon kiu rigardas lin ridante, sidinta sur lia klakĉapelo. La subprefekto levas la ŝultrojn kaj volas daŭrigi sian prelegeton; sed la pego denove interrompas lin kaj de malproksime krias al li :

- Kial daŭrigi ?

- Kiel ! Kial daŭrigi ? diras la subprefekto kiu fariĝas tute ruĝa; kaj geste forpelante tiun ĉi senhontan beston, li ankoraŭ pli laŭte rekomencas :

- Gesinjoroj kaj karaj geregatoj...

- Gesinjoroj kaj karaj geregatoj..., pli laŭte rekomencas la subprefekto.

Sed tiam, jen la malgrandaj violoj kiuj leviĝas al li sur la pinto de siaj tigoj kaj kiuj mallaŭte diras al li :

- Sinjoro subprefekto, ĉu vi flaras kiel ni bone odoras ?

Kaj la fontoj faras al li sub la musko dian muzikon; kaj en la branĉoj, super lia kapo, amasoj da silvioj venas kanti al li siajn plej beletajn melodiojn; kaj la tuta arbareto kunĵuras por malhelpi lin verki lian prelegeton.

La tuta arbareto kunĵuras por malhelpi lin verki lian paroladon... S^{ro} subprefekto, ebria de odorojn, konfuzita de muziko, vane provas malcedi al la nova ĉarmo kiu invadas lin. Li alkubutiĝas sur la herbo, malagrafas sian belan veston, balbutas ankoraŭ du aŭ tri fojojn :

- Gesinjoroj kaj karaj geregatoj... Gesinjoroj kaj karaj geregatoj... Gesinjoroj kaj karaj...

Poste li sendas la geregatojn diablen; kaj la Muzo de la kultivantasembleo devas nur deturni la vizaĝon.

Deturnu vian vizaĝon, ho Muzo de la kultivantasembleo ! ... Kiam, post unu horo, la servantoj de la subprefektejo, malserenaj pro sia mastro, eniras en la malgranda arbaro, ili vidas spektaklon kiu retropaŝigas ilin pro hororo... S^{ro} subprefekto kuŝis sur la ventro, en la herbo, vestaĉita kiel bohemiano. Li estis demetinta sian vestaĉon;... kaj maĉetante violojn, S^{ro} subprefekto versis.

La Monpaperujo de Biksiu.

Iun matenon en oktobra monato, kelkajn tagojn antaŭ forlasi Parizon, mi vidis alveni hejmen - dum mi tagmanĝis - maljunulon en eluzitaj vestaĵoj, kurbakruran, kotkovritan, timeman, tremetante sur liaj longaj kruroj kiel senplumigita vadbirdo. Estis Biksiu. Jes, Parizanoj, via Biksiu; la kruelega kaj ĉarma Biksiu; tiu obstinema mokemulo kiu tiom ĝojigis vin de antaŭ dek kvin jaroj per liaj pamfletoj kaj liaj karikaturaj... Ha! La malfeliĉulo, kia mizerego! Sen grimaco kiun li faris enirante, neniam mi rekonintus lin.

Kun la kapo klinita al ŝultro, sian irbastonon ĉe la dentoj kiel klarneton, la famkonata kaj veaspekta ŝerculo antaŭeniris ĝis la mezo de la ĉambro kaj iris ĵeti sin kontraŭ mian tablon dirante per plendema voĉo :

- Kompatu al malriĉa blindulo !...

Estis tiel bone imitata ke mi ne sukcesis retenigi min ridi. Sed li, tute senkolere :

- Vi kredas ke mi ŝercas... rigardu miajn okulojn.

Kaj li turnis al mi du grandajn blankajn globojn sen esprimo.

- Mi estas blinda, kara mia, ĝismorte blinda... Jen tio kio estas skribi per vitriolo. Mi bruligis al mi la okulojn en ĉi tiu beleta metio; sed vere elbruligita... ĝisfunde! li aldonis, montrante al mi siajn forbrulitajn palpebrojn kie ne plu restis ombro de okulharo.

Mi estis tiel kortuŝita ke mi trovis nenion por diri al li. Mia silento maltrankviligis lin :

- Ĉu vi laboras ?

- Ne, Biksiu, mi tagmanĝas. Ĉu vi volas same fari ?

Li ne respondis, sed pro la tremetoj de liaj naztruoĵoj, mi

bone vidis ke li deziregis akcepti. Mi ekprenis lin ĉe la mano, kaj sidigis lin apud mi.

Dum oni servis lin, la malbonsortulo flaris la tablon kun eta rido :

- Tio tute ŝajnas bona. Mi baldaŭ regalos min; estas tiom longe ke mi ne plu tagmanĝis ! Pano de unu **spesdeko** ĉiumatene, kurante la ministeriojn... ĉar, vi scias, mi nun kuras tra la ministerioj; tio estas mia sola profesio. Mi provas ricevi tabakvendejon... Kion vi volas ? Necesas manĝi hejme. Mi ne plu kapablas desegni; mi ne plu kapablas verki... Dikti ?... Sed kio ?... Mi ja havas nenion en la kapo; mi elpensas nenion. Mia metio estis vidi la grimacojn de Parizo kaj fari ilin; nun ne plu eblas... Do mi pensis pri tabakbutiko; ne sur la bulvaroj, kompreneble. Mi ne rajtas tiun favoron, estante nek patrino de dancistino, nek vidvino de supera oficiro. Ne ! Nur malgranda provinca vendejo, ie tre malproksime en iu loko de la Vogezoj. Mi havos fortan pipon el porcelano; mi nomiĝos Johano aŭ Zebedeo, kiel en **Erkmano-Ĉatriano**, kaj mi konsolos min ne plu verki farante kornetojn da tabako per la verkoj de miaj samtempuloj.

"Jen ĉio kion mi petas. Ne multe, ĉu ne ?... Nu, estas malfacile por atingi tion... Tamen la protektoj ne devus manki al mi. Mi antaŭe estis tre konata. Mi vespermanĝadis ĉe la marŝalo, ĉe la princo, ĉe la ministroj; ĉiuj tiuj homoj volis havi min, ĉar mi amuzis ilin aŭ ili timis min. Nun mi ne plu timigas iun ajn. Ho miaj okuloj ! Miaj kompatindaj okuloj ! Kaj oni nenie invitas min. Estas tiel malĝoja, iu kapo de blindulo ĉe la tablo... Transdonu al mi la panon, bonvolu... Ha ! La banditoj ! Ili multekoste pagigos al mi tiun damnitan tabakbutikon. Ekde ses monatoj, mi eniras en ĉiujn ministeriojn kun mian petskribon. Mi alvenas matene, ĉe la horo kiam oni ekhejtas la stovon kaj kiam oni farigas rondiron al la ĉevaloj de Lia Ekscelenco sur la sablo de la

korto; mi foriras el tie nur ĉe noktiĝo, kiam oni alportas la dikajn lampojn kaj kiam la kuirejoj komencas bone odori...

"Mia tuta vivo okazas sur la kestoj da lignopecoj de la antaŭĉambroj. Tiel la pedeloj konas min, ĉu ne! Interne, ili nomas min: "Tiu bona sinjoro!" Kaj mi, por rikolti sian protekton, mi faras kalemburojn, aŭ mi desegnas per iu streko sur iu angulo de ilia skribsubaĵo, dikajn lipharojn kiuj ridigas ilin... Jen tio kio okazis al mi post dudek jaroj de impresegaj sukcesoj, jen la fino de artistovivo!... Kaj scii ke ili estas en Francio kvardek mil buboj al kiuj nia profesio kolektigas salivon en la buŝo. Scii ke estas ĉiutage, en la departementoj, lokomotivo kiu hejtiĝas por veturigi al ni korbopleno da stultuloj avidaj pri literaturo kaj pri presita bruoj!... Ha! Romaneska provinco, se la mizero de Biksiu povus servi al vi kiel instruoj!

Post tio, li enŝovis sian nazon en sian teleron kaj avide ekmanĝis, sen diri vorton... Estis kompatiga vidi lin agi. Ĉiun minuton, li perdis sian panon, sian forkon, palpis por trovi sian glason... Kompatinda viro! Li ne jam kutimis.

Post momento, li reparolis:

- Ĉu vi scias tion kio estas ankoraŭ pli abomena por mi? Estas ne plu kapabli legi miajn ĵurnalojn. Necesas esti fakulo por kompreni tion... Kelkfoje nokte, rehejmenirante, mi aĉetas unu el ili, nur por flari tiun odoron de malseka papero kaj de freŝajn novaĵojn... Tio estas tiel bona! Kaj neniu por legi ilin al mi! Mia edzino bone povus, sed ŝi ne volas, ŝi asertas ke oni trovas en la diversaĵoj aferojn kiuj ne estas decaj... Ha! Tiuj iamaj amantinoj, tuj post edzinigitaj, ne estas pli severmoraj ol ili. Ekde kiam mi faris de ŝi S^{inon} Biksiuo", tiu kredas sin devigita iĝi bigota, sed tiagrade!... Ĉu ŝi ne volis frotigi al mi la okulojn per la akvo de La Saleto! Kaj poste, la benita pano, la monkoklektoj, la Sankta-Infanaĵo, la etaj ĉinoj, kiu mi scias pli?... Ni estas ĝiskole

en la monferoj... Estus tamen bonfaro legi al mi miajn ĵurnalojn. Nu, ne, ŝi ne volas... Se mia filino vivus kun ni, ŝi ja legus ilin al mi; sed ekde kiam mi estas blinda, mi metis ŝin en Nia-Dipatrino-de-la-Artoj, por havi unu buŝo malpli por nutri...

"Ankoraŭ iu kiu donas al mi agrablaĵon, tiu ĉi ! Ne estas naŭ jaroj ke ŝi estas en la mondo, ŝi jam spertis ĉiujn malsanojn... Kaj malĝoja ! Kaj malbela ! Pli malbela ol mi, se tio eblas,... iu monstro !... Kion vi volas ? Mi ĉiam kapablis nur fari embarason... Ha tio, sed mi ja estas bona rakonti al vi miajn familiajn problemojn. Kion tio povas fari al vi ?... Nu, donu ankoraŭ al mi iom da tiu brando. Necesas ke mi vigligu min. Elirante el ĉi tie, mi iros al la publika klerigado, kaj la tieaj pedeloj ne estas facilaj por gajigi. Ili ĉiuj estas eksaj instruistoj.

Mi verŝis al li lian brandon. Li komencis fojete gustumi ĝin kun emociita mieno... Subite, mi ne scias kian fantazion pikis lin, li stariĝis kun sia glaso en la mano, dum momento movis ĉirkaŭ si sian kapon de blinda vipuro kun la afabla rideto de la homo kiu tuj parolos, poste per tranĉa voĉo, kiel por alparoli bankedo de ducent manĝilaroj :

- Je la artoj ! Je la beletro ! Je la gazetaro !

Kaj jen li tostante dum dek minutoj per la plej freneza kaj la plej mirinda improvizaĵo kiu neniam eligis el tiu cerbo de pajaco.

Imagu al vi jarfinan spektaklon titolita : la Artikolo de la Beletroj en 186* ; niajn laŭdire literaturajn kunvenojn, niajn babiladojn, niajn kverelojn, ĉiujn ridindaĵojn de strangega mondo, sterko de inko, infero sen nobleco kie oni tranĉas la gorĝon, kie oni interbuĉas unu la alian, kie oni rabas, kie oni parolas pri interezoj kaj monaferoj multe pli ol ĉe la burĝoj, tio kio ne malhelpas ke oni mortas tie pro malsato pli ol aliloke; ĉiujn niajn kovardaĵojn, ĉiujn niajn

mizerojn; la malnovan baronon T... de la Tombolo forirante fari "klaĉ... klaĉ... klaĉ..." en la Tuilerioj kun sia almozbovlo kaj sia helblua vesto; poste niajn mortintojn dum la jaro, la amasinformajn entombigojn, la oracion de la Delegita Sinjoro ĉiam la sama : "Kara kaj karmemora ! Kompatinda kara !" por malfeliĉulo al kiu oni rifuzas pagi la tombon; kaj tiujn kiuj mortigis sin, kaj tiujn kiuj freneziĝis; imagu al vi ĉion ĉi rakontita, detalita, mimita de genia grimacisto, vi tiam havos ideon pri tio kio estis la improvizaĵo de Biksiu.

Lian toston finitan, lian glason trinkitan, li demandis al mi la horon kaj disdegne foriris, sen adiaŭi min... Mi ne scias tion kion la pedeloj de S^{ro} Durui sentis post lia vizito de tiu mateno; sed mi scias ke neniam en mia vivo mi sentis min tiom malĝoja, tiom konsternita kiom post la foriro de tiu ĉi terura blindulo. Mia inkujo naŭzis min, mia plumo timegigis min. Mi volintus foriri foren, kuri, vidi arbojn, flari ion bonodora... Kia malamo, Dio mia ! Kiom da galo ! Kia bezono klaĉi kontraŭ ĉion, makuli ĉion ! Ha ! La mizerulo...

Kaj mi furioze paŝadis en mia ĉambro, kredante ankoraŭ aŭdi la rikanon de malsimpatio kiun li havis parolante al mi pri sia filino.

Subite, apud la seĝo kie la blindulo sidiĝis, mi sentis ruli ion sub mia piedo. Kliniĝante mi rekonis lian monpaperujon, dikan brilan monbiletujon, kun rompitaĵoj kaj kojnoj, kiun li neniam forlasas kaj kiun li ridante nomas sian poŝon da veneno. Ĉi tiu poŝo, en nia mondo, estis tiel diskonata kiel la famaj desegnaĵoj de S^{ro} de Ĵirardino. Oni diris ke estis teruraj aferoj en ĝi... La okazo bone prezentigis por certigi min pri tio. La malnova bileto, tro ŝvelita, falante krevis, kaj ĉiuj paperoj rulante disiĝis sur la tapiŝo; necesis al mi pluki ilin unu post la alia ...

Iu amaso da leteroj skribitaj sur papero kun floroj, ĉiuj komencantaj per "Kara paĉjo mia" kaj subskribitaj "Celina

Biksiu el la Infanoj de Maria.

Malnovaj receptoj por infanaj malsanoj : krupo, konvulsioj, skarlatino, morbilo... (la kompatinda etulino ne eskapis nur unu !)

Fine granda stampita koverto de kie elŝoviĝis kiel knabineta kufo, du aŭ tri flavaj haroj tute frizitaj; kaj sur la koverto, per dika skribo treminta, skribo de blindulo :

"Haroj de Celina, tranĉitaj je la 13a de majo, la tago de ŝia eniro tien".

Jen tio kio estis en la monpaperujo de Biksiu.

Ĉu eblas, Parizanoj, vi ĉiuj estas la samaj. La malsimpatio, la ironio, terura rido, kruelegaj ŝercoj, kaj poste por konkludi... *Haroj de Celina tranĉitaj je la 13a de majo.*

La Legendo de la Viro kun Cerbo el Oro.

por la sinjorino kiu petas gajajn rakontojn.

Legante vian leteron, sinjorino, mi sentis kiel rimorson. Mi riproĉis min pri la iom tro duonfunebra koloro de miaj rakontetoj, kaj mi antaŭdecidis hodiaŭ proponi al vi ion ĝojan, ege ĝojan.

Kial mi finfine estus malgaja ? Mi vivas je mil leŭgoj de la parizaj nebuloj, sur sunbrila monteto, en la lando de la tamburinoj kaj de la moskatelo. Ĉirkaŭ mia hejmo, ĉio estas nur suno kaj muziko; mi havas orkestrojn de blankvostuloj, ĥorsocietojn de paruoj; matene, la numeniojn kiu blekas "Kureli ! Kureli !", tagmeze, la cikadojn, poste la paŝtistojn kiuj ludas fifron, kaj la brunajn belulinojn kiujn oni aŭdas ridi en la vinberejoj... Vere, la loko estas malbone elektita por nutri nigrajn pensojn; mi plivole devus sendi al la sinjorinoj poemojn el roza koloro kaj plenajn korbojn da galantaj fabeloj.

Nu, ne ! Mi ankoraŭ estas tro proksime de Parizo. Ĉiutage, ĝis en miaj pinoj, ĝi sendas al mi la ŝprucaĵojn de siaj malĝojoj... En la sama horo kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn, mi ĵus ekaŭdis la mizeran morton de la kompatinda **Karlo Barbara**; kaj mia muelejo tute sentas funebbron. Adiaŭ la numenioj kaj cikadoj ! Mi ne plu havas kuraĝon por io ajn gaja... Jen kial, sinjorino, anstataŭ la beleta ŝercema fabelo kiun mi antaŭdecidis verki al vi, vi ankoraŭ hodiaŭ havos nur melankolian legendon.

Iam estis viro kiu havis cerbon el oro; jes, sinjorino, cerbon tute el oro. Kiam li naskiĝis, la kuracistoj pensis ke tiu infano ne vivos, tiom lia kapo estis peza kaj lia kranio senmezura. Tamen, li vivis kaj kreskis sub la suno kiel bela

plantaĵo de olivarbo; sed lia dika kapo ĉiam kuntiris lin, kaj estis kompato vidi lin paŝante albatigi al ĉiuj mebloj... Li ofte falis. Iun tagon li rulfalis de supre de iu perono kaj batis sian fronton kontraŭ marmoran ŝtupon, kie lia kranio tintis kiel ingoto. Oni kredis lin mortan; sed restarigante lin, oni trovis sur li nur negravan vundon, kun du aŭ tri koaguliĝintaj gutetoj el oro en liaj blondaj haroj. Estas tiel ke la gepatroj sciigis ke la infano havis cerbon el oro.

La afero estis gardita sekrete; la kompatinda knabo mem suspektis nenion. De tempo al tempo, li demandis kial oni ne plu lasis lin kuri antaŭ la pordo kun la knabetoj de la strato.

- Oni ŝtelus vin, mia bela trezoro! respondis al li lia patrino...

Tiam la knabo timegis esti rabita; li reiris ludi tute sola, sen diri ion ajn, kaj peze vagis de iu ĉambro al alia...

Nur je dek ok jaroj, liaj gepatroj malkaŝis al li la monstran donon kiun li ricevis de la destino; kaj ĉar ili edukis kaj nutris lin ĝis tiam, ili kompanse petis de li iom da lia oro. La infano ne hezitis; senprokraste - Kiel? Per kiuj rimedoj? La legendo ne diras tion - Li elŝiris el sia kranio pecon da masiva oro, iun pecon dikan kiel juglando kiun li fiere ĵetis sur la genuojn de sia patrino... Poste tute mirigita pro la riĉaĵoj kiujn li portis en la kapo, freneza pro deziroj, ebria de sia potenco, li forlasis la patran hejmon kaj foriris tra la mondo malŝparante sian trezoron.

Pro la vivaranĝo laŭ kiu li gvidis sian vivon, reĝe kaj semante oron sen kalkuli, oni dirintus ke lia cerbo estis neelĉerpebla... Ĝi tamen elĉerpiĝis, kaj laŭmezure oni povis vidi la okulojn estingiĝi, la vango pli kaviĝi. Fine, iun tagon, en mateno de freneza diboĉado, la malfeliĉulo, sole restanta inter la restaĵoj de la festeno kaj la lustroj kiuj paliĝis, timegiĝis pro la grandega breĉo kiun li jam faris en sia

ingoto; estis tempo por halti.

De tiam, estis nova vivmaniero. La viro kun la cerbo el oro foriris izolece vivi de la laboro de siaj manoj, suspektema kaj timema kiel avarulo, malcedante al tento, provante mem forgesi ĉi tiujn pereigajn riĉaĵojn al kiuj li ne plu volis tuŝi... Bedaŭrinde iu amiko sekvis lin en lia soleco, kaj tiu amiko konis lian sekreton.

Iun nokton, la kompatindulo abrupte ekvekiĝis pro kapdoloro, terura doloro; li freneziganta stariĝis kaj vidis en lunradio, la amikon kiu fuĝis kaŝante ion sub sia mantelo...

Ankoraŭ iom da cerbo kiun oni forprenis de li !...

Post kelka tempo de tiam, la viro kun la cerbo el oro enamiĝis, kaj ĉi-foje ĉio estis finita... Li amis per la plej bona de sia animo iun blondan virineton kiu ankaŭ bone amis lin, sed plie preferis la kvastojn, la blankajn plumojn kaj la beletan orbrunajn pendaĵojn svingiĝantajn kontraŭ la botetoj.

Inter la manoj de tiu ĉi ĉarma estulino - duonbirdo, duonpupo - la ormoneretoj malaperis, tio estis plezuro. Ŝi havis ĉiujn kapricojn; kaj li neniam kapablis diri ne; li eĉ, pro timo ĉagreni ŝin, elkaŝis al ŝi la malgajan sekreton de sia riĉaĵo.

- Ni do estas tre riĉaj ? ŝi diris.

La kompatindulo respondis :

- Ho ! jes... tre riĉaj !

Kaj li ame ridetis al la blua birdeto kiu senkonscie manĝis de li la kranion. Kelkfoje tamen, la timo kaptis lin, li deziris montri sin avara; sed tiam la virineto saltetante venis al li, kaj diris al li :

- Mia edzo kiu estas tiom riĉa ! aĉetu al mi ion tre multekosta...

Kaj li aĉetis al ŝi ion tre multekosta.

Tio tiel daŭris dum du jaroj; poste iun matenon, la

virineto mortis, sen ke oni scu kial, kiel iu birdo... La trezoro atingis sian finon; per tio kio restis de ĝi, la vidvo farigis por sia kara mortintino, belan entombigon. Sonorilegoj tondradantaj, pezaj nigre drapiritaj kaleŝoj, elegante ornamitaj ĉevaloj, arĝentaj larmoj en la veluro, nenio ŝajnis al li tro bela. Kion nun gravis al li sia oro ?... Li donis el ŝi por la preĝejo, por la portantoj, por la revendistinoj de imorteloj; li donis el ĝi ĉien, sen marĉandi... Tial, elirante el la tombejo, restis al li preskaŭ nenio pri tiu mirinda cerbo, apenaŭ kelkaj pecetoj sur la parietoj de la kranio.

Tiam oni vidis lin foriri tra la stratoj, kun konfuzita mieno, manojn antaŭen, stumblanta kiel ebria homo. Vespere, ĉe la horo kiam la ĉiovendejoj lumiĝas, li haltis antaŭ larĝa montrofenestro en kiu tuta senordaĵo da ŝtofoj kaj ornamaĵoj brilis sub la lumoj, kaj restis longtempe tie rigardante du botetojn el blua sateno borderitajn de cigna lanugo. "Mi scias iun al kiu tiuj ĉi botetoj tre plaĉus", li diris al si ridetante; kaj jam ne plu memorante ke la virineto mortis, li eniris por aĉeti ilin.

El la fundo de sia postbutiko, la vendistino aŭdis laŭtan krion; ŝi alkuris kaj retropaŝis pro timo vidante starantan viron kiu sin apogis ĉe la vendotablo, kaj dolore rigardis ŝin kun konsternita mieno. Li havis per iu mano la blujajn botetojn kun bordero el cignaĵo, kaj prezentis la alian manon tute sangokovrita, kun oraj skrapaĵoj ĉe la fino de la ungoj.

Tia estas, sinjorino, la legendo de la viro kun cerbo el oro.

Malgraŭ siaj ŝajnoj de fantazia fabelo, ĉi tiu legendo estas vera de la komenco ĝis la fino... Estas tra la mondo kompatinduloj kiuj estas kondamnitaj vivi de sia cerbo, kaj pagas per bela fajna oro, el sia medolo kaj sia substanco, la plej malgrandajn aferojn de la vivo. Estas por ili iu ĉiutaga doloro; kaj poste, kiam ili estas lacaj suferi...

La Poeto Mistralo.

Lastan dimanĉon, ellitiĝante, mi kredis vekigi en la strato de **Suburbo-Montmartro**. Pluvis, la ĉielo estis griza, la muelejo malgaja. Mi timis hejme pasigi tiun malvarman pluvan tagon, kaj tuj venis al mi la emo iri iom revarmigi min apud **Frederiko Mistralo**, tiu fama poeto kiu loĝas je tri leŭgoj de miaj pinoj, en lia malgranda vilaĝo de **Majano**.

Tuj pensinta, tuj foririnta : iu bastonego el mirtoligno, mia Montanjo, iu kovrilo, kaj ek !

Neniu en la kamparo... Nia bela katolika Provenco dimanĉe lasas ripozigi la grundon... La hundoj solaj en la loĝejo, la farmodomoj fermitaj... Kelkfoje, ĉareto de varveturigisto kun ĝia fluetanta baŝo, maljunulino kapuĉinta en ŝia pelerino rufbruna, mulinoj en paradvesto, kovraĵo el blua kaj blanka espartaĵo, ruĝaj kvastoj, arĝentaj tintiloj - trotete kuntiranta plenan kariolon da homoj de farmejo kiuj iras ĉeesti meson; poste, tie tra la nebuleto, iu barko sur la irigacia kanalo kaj iu staranta fiŝkaptisto kiu ĵetas sian ĵetreteton...

Ne eblas legi survoje tiun tagon. La pluvo falis torente, kaj la tramontano ĵetis ĝin al vi kvazaŭ per plenaj siteloj en la vizaĝo... Mi iris laŭ la tuta vojo per unu spiro, kaj fine, post tri horoj de paŝado, mi ekvidis antaŭ mi la malgrandajn arbarojn da cipresoj meze de kiuj la lando de **Majano** ŝirmas sin pro timo de la vento.

Ne iu kato sur la stratoj de la vilaĝo; ĉiuj ĉeestis la altan meson. Kiam mi pasis antaŭ la preĝejo, la serpento^[24] ronkis, kaj mi vidis la kandelojn brili tra koloraj vitroj.

La loĝejo de la poeto estas ĉe la ekstremo de la lando;

24 Iama ligna blovinstrumento, kun buŝpeco kaj klipoj.

estas la lasta domo maldekstre sur la vojo al **Sankta-Remiĝo** - unuetaĝa dometo kun ĝardeno antaŭe... Mi senhaste eniras... Neniu ! La salona pordo estas fermita, sed mi aŭdas malantaŭen iun kiu paŝas kaj kiu laŭte parolas... Tiu ĉi paŝado kaj tiu ĉi voĉo estas bone konataj de mi... Mi haltas dum momento en la malgranda koridoro kalkita, kun mano sur la butono de la pordo, tre emociita. Mia koro batadas. Li estas tie. Li laboras... Ĉu necesas atendi ke la strofo estu finita ? ... Vere ! Domaĝe, mi eniru.

Ha ! Parizanoj, kiam la poeto de Majano venis ĉe vi montri Parizoⁿ al sia **Mirejlo** kaj ke vi vidis lin en viaj salonoj, tiun Ŝaktasoⁿ^[25] en urba vesto kun alta kolumo kaj granda ĉapelo kiu tiom ĝenis lin kiom lia gloro, vi kredis ke li estis Mistralo... Ne, ne estis li. Ekzistas nur unu Mistralo en la mondo, tiu kiun mi lastdimanĉe surprizis en lia vilaĝo, kun la ĉapo el felto sur la orelo, sen veŝto, en jako, kun lia ruĝa kataluna lanzono ĉirkaŭ la lumboj, kun la okulo vigla, kun la inspiro fajro ĉe la vangostoj, belega kun bona rideto, eleganta kiel greka paŝtisto, kaj paŝanta per grandaj paŝoj, kun manoj en liaj poŝoj, farante versojn...

- Kiel ! Estas vi ? kriis Mistralo ĵetante sin al mia kolo; bona ideo kiun vi havis por veni !... Ĝuste hodiaŭ estas la festo de Majano. Ni havas la muzikon de Avinjono, la virbovojn, la procesion, la farandolon, estos grandioza... La patrino baldaŭ revenos el la meso; ni tagmanĝos, kaj poste, ek ! ni iros vidi danci belaj fraŭlinoj...

Dum li parolis, mi rigardis kun emocio tiun ĉi malgrandan salonon kun helaj tapiŝoj kiun mi ne vidis de tiom longe, kaj kie mi jam pasigis tiel belajn horojn. Nenio estis ŝanĝita. Ankoraŭ la kanapo flave kvadrata, la du pajlaj brakseĝoj, la senbraka Venuso kaj la Arleza Venuso sur la kamenbreto, la

25 Rolando malmulte kutiminta al civilizacio, heroo de romano (*Atala*) de Chateaubriand.

portreto de la poeto fare de **Heberto**, lia fotografio fare de **Stefano Karĵato**, kaj en angulo apud la fenestro, la skribotablo - iu senvalora malgranda skribotablo de registrada kolektisto - tute ŝarĝita de malnovaj libroj kaj vortaroj. Meze de ĉi tiu skribotablo, mi ekvidis dikan malfermitan kajeron... Estis Kalenda, la nova poemo de Frederiko Mistralo, kiu devas aperi ĉe la fino de ĉi tiu jaro, la tagon de Kristnasko. Tiu ĉi poemo, Mistralo laboris al ĝi ekde sep jaroj, kaj jen preskaŭ ses monatoj ke li skribis la lastan verson de ĝi; tamen li ne ankoraŭ kuraĝiĝas disigi de ĝi. Vi komprenas, oni ĉiam havas strofon por fajnigi, rimon pli sonoratan por trovi... Mistralo kiom ajn verkas provence, li laboras siajn versojn kvazaŭ ĉiuj devus legi ilin en la lingvo kaj konsideri liajn penojn de bona laboristo... Ho ! la brava poeto, kaj ke estas ja Mistralo pri kiu Montanjo povintus diri : *Memoru pri tiu al kiu, ĉar oni demandis pri kio li klopodis tiom forte en arto kiu nur povis atingi la scion de malmulte da homoj, "Al mi sufiĉas iom, li respondis. Al mi sufiĉas unu. Al mi sufiĉas ne unu".*

Mi tenis la kajeron de Kalenda inter miaj manoj, kaj mi foliumis ĝin, plena de emocio... Subite muziko de fifroj kaj tamburinoj eksplodas sur la strato, antaŭ la fenestro, kaj jen mia Mistralo kiu kuras al la ŝranko, elprenas el ĝi glasojn, botelojn, trenas la tablon mezen de la salono, kaj malfermas la pordon por la muzikistoj, dirante al mi :

- Ne ridu ... Ili venas doni al mi la aŭbadon,... mi estas magistratano.

La malgranda ĉambro pleniĝas de homoj. Oni metis la tamburinojn sur la seĝojn, la malnovan standardon en angulon; kaj la **kuirita vino** cirkulas. Poste, kiam oni malplenis kelkajn botelojn je la sano de S^{ro} Frederiko, ke oni serioze interbabilis pri la festo, ĉu la farandolo estos tiel

bela kiel la pasintan jaron, ĉu la virbovoj bone reagos, la muzikistoj retiriĝis kaj iras doni la aŭbadon ĉe la aliajn magistratanojn. Tiam, la patrino de Mistralo alvenas.

kvazaŭ per turno de la mano, la tablo estas primetita : iu bela blanka tuko kaj du manĝilaroj. Mi konas la kutimojn de la domo; mi scias ke kiam Mistralo akceptas gaston, lia patrino ne altabliĝas... La kompatinda maljunulino konas nur sian provencan kaj sentus sin malkomfortan por babili kun Francoj... Cetere, oni bezonas ŝin en la kuirejo.

Dio ! La beleta manĝo kiun mi ricevis tiun matenon : peco de rostita kapridaĵo, monta fromaĝo, mosta konfitaĵo, figoj, moskatelaj vinberoj. La tuto trinkante tiun bonan Novkastelon^[26] de la papoj kiu havas tiel belan rozkoloron en la glasoj...

Dum la deserto, mi iras serĉi la kajeron de poemo kaj alportas ĝin sur la tablon antaŭ Mistralo.

- Ni diris ke ni eliros, eligis la poeto ridetante.

- Ne ! Ne ! Kalenda ! Kalenda !

Mistralo rezignacias, kaj per sia muzika kaj dolĉa voĉo, batante la takton de siaj versoj per la mano, li komencas la unuan kanton :

- Pri knabino freneza pro amo - nun kiam mi diris la malgajan aventuron - mi kantos, se Dio volas, infano de Kasiso - malriĉa eta fiŝisto de engraŭloj...

Ekstere, la sonoriloj sonoris la vesprojn, la petardoj eksplodis sur la placo, la fifroj pasis kaj repasis sur la stratoj kun la tamburinoj. La virbovoj de Kamargo kiujn oni kondukis por kuri, muĝis.

Mi, la kubutoj sur la tablotuko, kun larmoj en la okuloj, mi aŭskultis la rakonton pri la eta provenca fiŝisto.

Kalenda estis nur fiŝisto; la amo faras de li iun heroon.

26 Franca Rodana vino originale nomita "Château-Neuf".

Por konkeri la koron de sia am-injo - la bela Esterela - li entreprenas mirindajn aferojn, kaj la dek du laboroj de Herkulo estas nenio apud la siaj.

Iam, enkapigante al si esti riĉa, li inventis geniajn fiŝkaptilojn, kaj revenigas al haveno ĉiujn fiŝojn de la maro. Alia fojo, estas terura bandito de la gorgoj de **Oliulo**, la grafo Severano kiun li iras turmenti ĝis en lia kaŝejo inter liaj murdistoj kaj liaj kromvirinoj... Kia fortikulo tiu eta Kalenda! Iun tagon, ĉe la **Sankta-Baŭmo**, li renkontas du partioj de kunuloj venintaj tie por elbatali ilian kverelon per teruraj piedbatoj super la tombo de Majstro Jakobo, iu provencano kiu faris la ĉarpentaĵon de la templo de Salomono, bonvolu. Kalenda sin ĵetas meze de la buĉado kaj kvietigas la kunulojn parolante al ili...

Superhomaj entreprenoj!... Estis tie supre, en la rokoj de **Lureo**, nealirebla arbaro da cedroj kie neniam hakisto kuraĝis supreniri. Kalenda ja iras. Li ekloĝiĝis tie tute sola dum tridek tagoj. Dum tridek tagoj oni aŭdas la bruon de lia hakilo kiu sonas enprofundiĝante en la trunkojn. La arbaro krias; unu post la alia, la malnovaj gigantaj arboj falas kaj ruliĝas al la fundo de la abismoj kaj kiam Kalenda revenas malsupren, ne plu restas unu cedro sur la monto...

Fine rekompence por tiom da heroaĵoj, la fiŝisto de engraŭloj akiras la amon de Esterela, kaj li estis nomumita konsulon de la loĝantoj de Kasiso. Jen la rakonto de Kalenda... Sed ne gravas pri Kalenda? Tio kio estas antaŭ ĉio en la poemo, estas Provenco - Provenco de la maro, Provenco de la monto - kun sia historio, siaj moroj, siaj legendoj, siaj pejzaĝoj, iu tuta popolo naiva kaj libera kiu trovis sian faman poeton antaŭ ol morti... Kaj nun, difinu trakojn, plantu telegrafiajn fostojn, forpelu la provencan lingvon el la lernejoj! Provenco eterne vivos en Mirejlo kaj en Kalenda.

- Sufiĉe da poezio ! diris Mistralo, fermante sian kajeron. Necesas iri vidi la feston.

Ni eliris; la tuta vilaĝo estis sur la stratoj; granda blovo de bizo balais la ĉielon, kaj la ĉielo ĝoje brilis sur la ruĝaj tegmentoj malsekigitaj de pluvo. Ni ĝustatempe alvenis por vidi eniri la procesion. Estis dum unu horo iu neĉesema vicirado da pentofarantoj en kapuĉvestaĵo, blankaj pentofarantoj, bluaj pentofarantoj, grizaj pentofarantoj, fratinaroj da vualitaj fraŭlinoj, rozaj standardoj kun oraj floroj, grandaj senorigitaj sanktuloj el ligno portitaj per kvar ŝultroj, sanktulinoj el fajenco kolorigitaj kiel idoloj kun dikaj bukadoj enmane, ĥormanteloj, monstrancoj, baldakenoj el verda veluro, krucifiksoj enkadrigitaj de blanka silko, tiu tuto ondiganta pro la vento en la lumo de la kandeloj kaj de la suno, meze de psalmoj, de litanioj kaj de sonoriloj kiuj tondradis.

La procesio finita, la gesanktuloj enremizigitaj en siaj kapeloj, ni iris vidi la virbovojn, poste la ludojn sur la kampo, la luktojn de homoj, la tri saltojn, la kato-strangoladon, la ludon de la felsako, kaj la tutan beletan trajnon da festoj de Provenco... Noktiĝis kiam ni revenis al Majano. Sur la placo, antaŭ la malgranda trinkejo kie Mistralo iras vespere ludi sian partion kun sia amiko Zidoro, oni bruligis fajregon de ĝojo... La farandolo sin aranĝis. Lanternoj el ŝtancita papero estis lumigataj ĉie en la ombroj; la junularo lokiĝis; kaj baldaŭ, responde al la alvoko de la tamburinoj, komencis ĉirkaŭ la flamo, freneza bruema rondodanco kiu devis daŭri dum la tuta nokto.

Post la vespermanĝo, tro laca por ankoraŭ kuri, ni supreniris en la ĉambron de Mistralo. Estas modesta ĉambro de kamparano kun du grandaj litoj. La muroj ne havas

paperon; la plafonaj solivoj vidiĝas... antaŭ kvar jaroj, kiam la Akademio donis al la aŭtoro de Mirejlo la premion de tri mil frankoj, S^{ino} Mistralo faris al si ideon.

- Se ni tapetigus kaj plafonigus vian ĉambron ? Ŝi diris al sia filo.

- Ne ! Ne ! respondis Mistralo... Tio estas la mono de la poetoj, oni ne tuŝas tion.

Kaj la ĉambro restis tute nuda; sed tiel longe dum la monon de la poetoj daŭris, tiuj kiuj frapis ĉe Mistralo ĉiam trovis lian monsaketo malfermita...

Mi estis kunportinta la kajeron de Kalenda en la ĉambron, kaj mi volis ankoraŭ legigi al mi fragmenton antaŭ ol endormiĝi. Mistralo elektis la epizodon de la fajencoj. Jen ĝi per kelkaj vortoj :

Estas en granda manĝo, mi ne scias kie. Oni alportas sur la tablon pompan servicon el fajenco de **Mustie**. Funde de ĉiu telero, blue desegnita en la emajlo, estas provenca motivo; la tuta historio de la lando troviĝas en tio. Tial necesas vidi per kia amo estas priskribitaj tiujn ĉi belajn fajencojn; iu strofo por ĉiu telero, tiom multe da malgrandaj poemoj el naiva kaj lerta laboro, elfaritaj kiel pentraĵeto de **Teokrito**.

Dum Mistralo diris al mi siajn versaĵojn en tiu bela provenca lingvo, pli ol tri kvaronoj latina, kiun la reĝinoj antaŭe parolis, kaj nun kiun nur niaj paŝtistoj komprenas, mi admiris tiun ĉi viron ene de mi, kaj pensante pri la ruinigita stato kie li trovis sian gepatran lingvon kaj tio kion li faris el ĝi, mi imagis unu el tiuj malnovaj palacoj de la princoj de **Baŭo** kiel oni vidas ilin en la **Alpiloj**^[27] : ne plu da tegmentoj, ne plu da balustroj al peronoj, ne plu da vitraloj al fenestroj, la tref-ornamo de la ogivoj rompita, la blazono de la pordoj

27 Mi ne trovis bonan tradukon. Alpiloj estas propra nomo de malaltaj montaroj en la sudoriento de Francio sur la Mediteraneo.

manĝita de musko, kokinoj pikplukantaj en la honorkorto,
porkoj ruliĝantaj piede de la fajnaj kolonetoj de la galerioj,
la azeno paŝtiĝanta en la kapelo kie la herbo kreskas,
kolomboj venantaj trinki en la grandaj sanktakvujoj
plenplene da pluvakvo, kaj fine, inter tiuj ruinaĵoj, du aŭ tri
familioj de kamparanoj kiuj konstruis al si kabanoj en la
flankoj de la malnova palaco.

Poste, jen ke iun belan tagon, la filo de unu el tiuj
kamparanoj ekzaltiĝas pri tiuj ĉi grandaj ruinoj kaj indignas
vidi ilin tiel profanitaj; rapide, rapide, li forpelas la brutaron
el la honorkorto; kaj la feoj venantaj helpi lin, li rekonstruas
per si mem la grandan ŝtuparon, remetas lignotegaĵojn sur la
murojn, vitralojn al la fenestroj, restarigas la turojn,
reorumas la ĉambron de la trono, kaj organizas la vastan
palacon de alia tempo, kie loĝis papoj kaj imperiestrinoj.

Ĉi tiu restaŭrita palaco, tio estas la provenca lingvo.

Ĉi tiu filo de kamparano, tiu estas Mistralo.

La Tri Mallaŭtaj Mesoj.

kristnaska fabelo.

* ** *** I *** ** *

- Du trufitajn meleagrinaĵojn, Garigu ?...

- Jes, mia pastra moŝto, du belegajn meleagrinojn plenŝtopitajn per trufoj. Mi scias tion ĉar estas mi kiu helpis por plenigi ilin. Oni dirintus ke ilia haŭto tuj rompiĝos rostiĝante, tiom ĝi estis streĉita...

- Jesuo Maria ! Mi kiu tiom ŝatas la trufojn !... Rapide donu al mi mian surplison, Garigu... Kaj kun la meleagrinaĵoj, kion vi ankoraŭ ekvidis en la kuirejo ?...

- Ho ! Ĉiajn bonaĵojn... Ekde tagmezo ni nur senplumigis fazanojn, upupojn, bonaziojn, urogalojn. La plumoj flugis ĉie... Poste el la lageto, oni alportis angilojn, orajn karpojn, trutojn, ...

- Dikaj kiel, la trutoj, Garigu ?

- Dikaj kiel tio, mia pastra moŝto... Grandegaj !...

- Ho ! Dio ! Ŝajnas al mi ke mi vidas ilin... Ĉu vi metis la vinon en la buretojn ?

- Jes, mia pastra moŝto, mi metis la vinon en la buretojn... Sed kompreneble ! Ĝi ne valoras tiun kiun vi trinkos baldaŭ elirante el la noktomeza meso. Se vi vidus tion en la manĝoĉambro de la kastelo, tiujn ĉiujn karafojn kiuj flagras plenplenaj da vino el ĉiuj koloroj... Kaj la arĝentan teleraron, la cizelitajn ornamopladojn, la florojn, la kandelabrojn !... Neniam tia kristnaska festeno estos vidata. Sinjoro markizo invitis ĉiujn gesinjorojn de la ĉirkaŭaĵoj. Vi estos almenaŭ kvardek ĉe la tablo, sen enkalkuli nek la prefekton, nek la notarion... Ha ! Vi estas tre feliĉa esti en ili, mia pastra moŝto !... Nur esti flaranta ĉi tiujn belajn

meleagrinaĵojn, laodoro de la trufoj sekvas min ĉien...

Mmmmh !...

- Nu, mia infano. Ni gardu nin de la peko de frandemeco, ĉefe dum la naskiĝnokto... Iru tre rapide bruligi la kandlegojn kaj sonorigi la unuan baton de la meso; ĉar jen noktomezo estas proksima, kaj necesas ne malfruigi nin...

Ĉi tiu konversacio okazis dum la Kristnaska nokto en la favorjaro mil sescent kaj pli, inter la pastra moŝto Balagero, iama prioro de la Barnabanoj, nuntempe kapelpastro dungita de la siroj de Trinkelaĵo, kaj lia eta kleriko Garigu, aŭ almenaŭ tiu kiun li kredis esti eta kleriko Garigu, ĉar vi scios ke la diablo tiun vesperon prenis la rondan vizaĝon kaj la neprecizajn trajtojn de la juna sakristiano por pli bone instigi la pastran moŝton al la tento kaj kulpigi lin pri malbelega peko de frandemeco. Do, dum la ŝajna Garigu (hm ! hm !) fortege kariljonigis la sonorilojn de la nobela kapelo, la pastra moŝto finis surmeti sian kazublon en la sakristieto de la kastelo; kaj la menso jam perturbigita de ĉiuj ĉi gastronomiaj priskriboj, li ripetis al si mem vestante sin :

- Rostitaj meleagrinoj... oraj karpoj... Trutoj dikaj kiel tio !...

Ekstere, la nokta vento blovis disigante la muzikon de la sonoriloj, kaj proporcie, lumoj aperis en la ombro sur la flankoj de la monto **Ventoro**, supre de kiu stariĝis la malnovaj turoj de Trinkelaĵo. Estis familioj de kamparanoj kiuj venis aŭdi la noktomezan meson en la kastelo. Ili kvin- aŭ ses-ope grimpis la deklivon kantante, la patro antaŭe kun lanterno en la mano, la virinoj envolvitaj en siaj grandaj brunaj pelerinoj kie la infanoj kunpremiĝis kaj ŝirmis sin. Malgraŭ la horo kaj la malvarmo, tiu tuta brava popolo piediris gajvogle, subtenata de la ideo ke ĉe la eliro de la

meso, estus kiel ĉiujare tablo primetita por ili malsupre en la kuirejoj. Temp'al tempe, sur la forta deklivo, la kaleŝo de iu Sinjoro antaŭita de torŝoportistoj, flagrigis siajn glacojn en la lunlumo, aŭ iu mulino trotis skuante siajn tintilojn, kaj ĉe la brileto de la manlanternoj envolvitaj de nebuleto, la kamparanoj rekonis sian prefekton kaj salutis lin preterpasante :

- Bonan vesperon, bonan vesperon, mastro Arnotoⁿ !

- Bonan vesperon, bonan vesperon, miaj infanoj !

La nokto estis hela, la steloj plibriligitaj pro malvarmo; la bizo pikis kaj ereta grajlo, glitanta sur la vestoj sen malsekigi ilin, fidele gardis la tradicion de neĝblankaj Kristnaskoj. Tute supre de la deklivo, la kastelo aperis kiel la celo, kun sia giganta maso da turoj, gabloj, la spajro de sia kapelo stariĝanta en la nigreblua ĉielo, kaj amaso da lumetoj kiuj flagris, iris kaj venis, svingiĝis ĉe ĉiuj fenestroj kaj similis pro la malhela fono de la konstruaĵo, al la fajreroj kurantaj en la cindroj de bruligita papero... Preter la levponto kaj la poterno, necesis por iri al la kapelo, transpaŝi la unuan korton , plena de kaleŝoj, de lakeoj, de portseĝoj, tute hela pro la fajro de la torĉoj kaj la flamoj de la kuirejoj. Oni aŭdis la tintadon de la turnrostiloj, la bruegon de la kaseroloj, la kolizion de la kristalaĵoj kaj de la arĝentaĵaro movigitaj dum la preparoj de manĝo; super tio, varmeta vaporo kiu bonodoris la rostitajn karnojn kaj la fortajn herbojn de kompleksaj saŭcoj, dirigis al la kamparanoj, kiel al la kapelpastro, kiel al la prefekto, kiel al ĉiuj :

- Kian bonan festenon ni faros post la meso !

* ** *** **II** *** ** *

Tin tin tin !... Tin tin tin !...

Estas la noktomeza meso kiu komencas. En la kapelo de la kastelo, ia katedralo miniaturo, kun interkrucitaj arkaĵoj, kun lignotegaĵoj el kverko, la tapiŝoj starantaj ĝis la alteco de la muroj estis streĉitaj, ĉiuj kandeloj lumigitaj. Kaj kiom da homoj ! Kaj kiom da tualetoj ! Jen unue, sidanta en la skulptitaj ĥorseĝoj kiuj ĉirkaŭas la ĥorejon, la siro de Trinkelaĵo, en vesto el salmokolora tafto, kaj apud li ĉiuj noblaj gesinjoroj invititaj. Kontraŭe, sur la preĝoseĝo garnita de veluro, sin lokis la maljuna vidvina markizino en sia robo el fajrokolora brokaĵo kaj la juna damo de Trinkelaĵo, kapvestita de alta kapzono el gofrita punto laŭ la lasta modo de la kortego de Francio. Pli malsupre oni vidas, nigre vestitaj, kun vastaj pintiĝantaj perukoj kaj razitaj vizaĝoj, la prefekton Tomasoⁿ Arnotonoⁿ kaj la notarion mastron Ambrojoⁿ, du rimarkindaj notoj inter la brilkoloraj silkoj kaj la brokitaj damaskoj. Poste venas la grasaj ĉefservistoj, la paĝioj, la ĉasoservistoj, la intendantoj, Damo Barbara kun ĉiuj ĉiaj ŝlosiloj flanke pendantaj al ringo el fajna arĝento. Ĉe la fundo, sur la benkoj, estas la malalta oficistaro, la servistinoj, la kamparanoj kun iliaj familioj; kaj finfine, tie for, tute kontraŭ la pordo kiun ili diskrete duonmalfermas kaj refermas, sinjoroj kuirhelpistoj kiuj venas inter du saŭcoj kapti etan arion de meso kaj alporti odoron de festeno en la preĝejon tute festantan kaj varmetan pro tiom da flamigitaj kandeloj.

Ĉu estas la vido de ĉi tiuj malgrandaj blankaj biretoj kiuj malatentigas la celebranton ? Ĉu ne estus pli ĝuste la sonorileto de Garigu, tiu furioza eta sonorileto kiu svingiĝas ĉe la piedo de la altaro kun infera hastego kaj ŝajnas ĉiam diri :

- Ni rapidu, ni rapidu... Pli frue ni finos, pli frue ni sidos ĉetable.

La fakto estas ke ĉiufoje kiam ĝi tintas, ĉi tiu

sonorileto de la diablo, la kapelpastro forgesas sian meson kaj nur pensas pri la festeno. Li imagas al si la kuiristojn en ekscitiĝo, la fornojn kie brulas fajron de forĝejo, la vaporetan kiu leviĝas de la duone malfermitaj kovriloj, kaj en ĉi tiu vaporeto du belegajn meleagrinojn, plenŝtopitajn, streĉitajn, vejnitajn de trufoj...

Aŭ ankoraŭ, li vidas pasi vicojn da paĝioj kunportantaj pladojn ĉirkaŭvolvitajn de tentaj vaporoj, kaj kun ili, li eniras en la grandan ĉambron jam preta por la festeno. Ho delectiĝo ! Jen la grandega tablo tute ŝarĝita kaj splenda, la pavoj vestitaj per siaj plumoj, fazanoj disigantaj siajn orbrunajn flugilojn, la rubenkoloraj boteletoj, la piramidoj da brilaj fruktoj inter la verdaj branĉoj, kaj tiuj mirindaj fiŝoj pri kiuj parolis Garigu (ha ! fakte jes, Garigu !) prezentitaj sur tavolo de fenkolo, la skvamo perlamota kvazaŭ ili eliris el la akvo, kun bukedo da bonodoraj herboj en siaj naztruoj de monstroj. Tiom akra estas la vizio de tiuj ĉi mirindaĵoj ke ŝajnas al moŝto Balagero ke ĉiuj tiuj ĉi mirigaj pladoj estas servataj antaŭ li sur la brodaĵoj de la altartuko, kaj du- aŭ tri-foje, anstataŭ "Dominus vobiscum !" ^[28], li mire aŭdas sin diri la Tablopreĝon. Krom ĉi tiuj malgravaj eraroj, la digna viro tre konsciencie plenumas sian diservon, sen salti linion, sen forgesi genufleksadon; kaj ĉio iras sufiĉe glate ĝis la fino de la unua meso; ĉar vi scias ke, dum Kristnaska tago, la sama celebranto devas plenumi tri sinsekvajn mesojn.

- Jam unu ! diras al si la kapelpastro kun suspiro de malpeziĝo; poste, sen perdi minuton, li faris signon al sia kleriko aŭ tiu kiun li kredas esti sia kleriko, kaj...

Tin tin tin !... Tin tin tin !...

Estas la dua meso kiu komenciĝas, kaj kun ĝi, ankaŭ komenciĝas la peko de moŝto Balagero.

28 Latina esprimo de kristana meso signifanta "Disinjoro estu kun vi".

- Rapide, rapide, ni rapidu ! krias al li per ĝia akreta voĉeto la sonorileto de Garigu, kaj ĉifoje la malfeliĉa celebranto, tute fordonita al la demono de frandemeco, ĵetegas sin al la meslibro kaj voras la paĝojn kun la avideco de sia troekscitita apetito. Furioze li kliniĝas, restariĝas, skizas la krucosignojn, la genuajn fleksadojn, mallongigas ĉiujn siajn gestojn por esti pli frue fininta. Apenaŭ se li etendas siajn brakojn dum la Evangelio, se li frapas sian bruston dum la konfespreĝo. Inter la kleriko kaj li, estas al tiu kiu plej rapide balbutos. Versikloj kaj sponsorioj rapidegas, interpuŝiĝas. La vortoj, duonelparolitaj, sen malfermi la buŝon, tio kio petus tro da tempo, finiĝas per nekompreneblaj murmuroj.

Oremus^[29] ... us... us...

Mea culpa^[29] ... pa... pa...

Same kiel la pelitaj vinberrikoltantoj tretantaj la vinberaron de la kuvo, ili ambaŭ vadas en la latina de la meso, sendante ŝprucojn al ĉiuj flankoj.

Dom... scum^[30] !... diras Balagero

... Stutuo^[30] !... respondas Garigu ; kaj ĉiam la damnita eta sonorileto ĉeestas, kiu tintas ĉe iliaj oreloj, kiel tiuj tintiloj kiujn oni metas al la poŝtoĉevaloj por grandrapide galopigi ilin. Pensu ke per tiu kadenco, mallaŭta meso estas rapide fuŝfinita.

- Jam du ! diras la kastelpastro, tute spirmanka; poste sen havigi al si tempon por spiri, ruĝa, ŝvita, li desaltas la ŝtupojn de la altaro kaj...

Tin tin tin !... Tin tin tin !...

Estas la tria meso kiu komenciĝas. Estas nur kelkaj farendaj paŝoj por alveni la manĝoĉambron; sed, bedaŭrinde !

29 Ellatine "Oremus" = "Ni preĝu" kaj "Mea culpa" = "Estas mia kulpo". Ili estas du kristanaj preĝoj de la latina meso.

30 Latina respondo mallongigita al "Dominus vobiscum ". La tuta respondo estas "Et cum spiritu tuo" kiu signifas "Kaj kun via spirito".

laŭmezure kiel la festeno alproksimiĝas, la malbonsorta Balagero sentas sin trafita de frenezo de senpacienco kaj frandemeco. Lia vizio fortikiĝas, la oraj karpoj, la rostitaj meleagrinaĵoj estas ĉi tie, tie... Li tuŝas ilin;... li ilin... Ho ! Dio ! La pladoj fumas, la vinoj bonodoras; kaj skuante sian furiozan tintilon, la eta sonorileto krias al li :

- Rapide, rapide, ankoraŭ pli rapide !

Sed kiel li povus pli rapidi ? Liaj lipoj apenaŭ moviĝas. Li ne plu prononcas la vortojn... Krom se li tute trompus la bonan Dion kaj mistraktus al Li lian meson... Kaj estas tio kion li faras, la mizerulo !... De tentiĝo al tentiĝo, li komencas saltante versiklon, poste du. Poste la epistolo estas tro longa, li ne finas ĝin, fluglegas la Evangelion, pasas antaŭ la Kredo sen eniri, saltas la Patronian, salutas de malproksime la prefacion, kaj per saltegoj, kaj per impetoj tiel sin pelas en eternan damnadon, ĉiam sekvata de la senhonora Garigu (vade retro, Satanas^[31]!), kiu asistas lin per mirinda konsento, suprenlevas al li lian kazublilon, duope turnas la paĝojn, puŝegas la pupitrojn, faligas la buretojn kaj senĉese skuas la etan sonorileton pli kaj pli forte, pli kaj pli rapide.

Necesas vidi la konsternitan vizaĝon kiun faras ĉiuj ĉeestantoj ! Devigitaj sekvi per la mimiko de la pastro, ĉi tiun meson kies vorton ili ne aŭdas, iuj leviĝas kiam la aliaj genuiĝas, sidiĝas kiam la aliaj stariĝas; kaj ĉiuj fazoj de ĉi tiu stranga diservo konfuziĝas sur la benkoj en amaso da diversaj sintenoj. La stelo de Kristnasko survoje en la ĉielvojoj, tien, al la malgranda stalo, paliĝas pro teruro vidante ĉi tiun konfuzon...

- La pastro tro rapidas... Oni ne povas sekvi, murmuris la maljuna vidvino delire skuanta ŝian ĉapelon.

Mastro Arnoto kun siaj grandaj okulvitroj el ŝtalo sur

31 Latina esprimo dirita de Jesuo kaj kiu signifas "Retiroiru, foriru, Satano".

la nazo, serĉas en sia meslibro kie diable oni povas ja troviĝi. Sed finfine, ĉiuj tiuj bravuloj, kiuj ankaŭ ili pensas festeni, ne bedaŭras ke la meso iru tiom rapidege; kaj kiam moŝto Balagero, kun radiantanta vizaĝo, turnas sin al la ĉeestantaro kriante per sia tuta potenco : "Ite, missa est"^[32] ; estas nur unu voĉo en la kapelo por respondi al li "Deo gratias"^[33] tiel ĝoja, tiel entuziasmiganta, ke oni jam sin kredus ĉe la tablo por la unua tosto de la kristnaska festeno.

* ** *** III *** ** *

Kvin minutojn poste, la amaso da Sinjoroj sidiĝis en la granda salono, kun la kapelpastro meze de ili. La kastelo, supremalsupren iluminita, bruis pro kantoj, krioj, ridoj kaj onidiroj; kaj la respektinda moŝto Balagero plantis sian forketon en flugilon de bonazio, dronigante la rimorson de sia peko en superfluo da vino de la Papo kaj da bonaj sukroj de viandoj. Tiom li trinkis kaj manĝis, la sankta kompatindulo, ke li mortis dum la nokto pro terura koratako, sen havi nur tempon por penti; poste li matene alvenis en la ĉielon, ankoraŭ tute en stato de ekscitiĝo pro la festoj de la nokto, kaj mi lasas vin pensi, kiel li estis akceptata.

- Foriru el miaj okuloj, malbona kristano ! diras al li la suverena Juĝisto, nia mastro al ĉiuj. Via kulpo estas sufiĉe granda por forviŝi tutan vivon de virto... Ha ! Vi ŝtelis al mi noktan meson... Nu vi anstataŭe pagos al mi tricent kaj vi eniros en paradizo nur kiam vi estos celebrinta en via propra kapelo ĉi tiujn tricent mesojn de Kristnasko en la ĉeesto de ĉiuj tiuj kiuj pekis pro via kulpo kaj kun vi...

...Kaj jen la vera legendo de moŝto Balagero kiel oni rakontas ĝin en la lando de la olivoj. Hodiaŭ, la kastelo de Trinkelaĝo ne plu ekzistas, sed la kapelo staras ankoraŭ

32 Latina esprimo de kristana meso kiu signifas "Iru la meso estas dirita".

33 Tiu latina respondo signifas "Ni danku Dion".

rekte tute supre de monto **Ventoro** en bosketo da verdaj kverkoj. La vento klakigadas sian dismetitan pardonon, la herbo okupas la sojlon; estas nestoj en la anguloj de la altaro kaj en la embrazuro de la altaj duklapaj fenestroj kies la koloritaj vitraloj malaperis de longe. Tamen ŝajnas ke ĉiujare dum Kristnasko, supernatura lumo vagas inter tiuj ruinoj, kaj ke irante al la mesoj kaj al la festenoj, la kamparanoj ekvidas tiun fantomon de kapelo lumigita de nevideblaj kandeloj kiuj brulas en la libera aero, eĉ sub la neĝo kaj la vento. Vi ridos pri tio se vi volas, sed tiea vinberisto, nomata *Garigo*ⁿ, sendube iu posteulo de *Garigu*, asertis al mi ke dum iu kristnaska vespero, estante iom ebria, li perdiĝis en la montaro ĉe la flanko de Trinkelaĵo; kaj jen tio kion li vidis... ĝis la dek-unua, nenion. Ĉio estis silenta, estingita, senviva. Subite, ĉirkaŭ la noktomezo, iu kariljono sonoris tute supre de la sonorilturo, iu malnova, malnovega kariljono ke ŝajnis esti je dek leŭgoj. Baldaŭ, en la vojeto kiu supreniras, *Garigo* vidis fajrojn tremi, hezitemajn ombrojn moviĝadi. Sub la antaŭpordo de la kapelo, oni paŝis, oni flustris :

- Bonan vesperon, *Mastro Arnoto*ⁿ !
- Bonan vesperon, bonan vesperon, miaj infanoj !...

Kiam ĉiuj estis enirintaj, mia vinberisto, kiu estis tre brava, milde alproksimiĝis kaj rigardante tra la rompita pordo ekvidis maloftan spektaklon. Ĉiuj tiuj homoj kiujn li vidis pasi estis instalintaj ĉirkaŭ la ĥorejo, en la ruina navo, kvazaŭ la malnovaj benkoj ankoraŭ ekzistis. Belaj Damoj kun brokaĵo kaj kapvestoj el punto, grandsinjoroj pasamentitaj de supre malsupren, kamparanoj kun florumitaj ĵaketoj tiel kiel niaj avoj havis, ĉiuj ŝajnis maljunaj, velkaj, polvaj, lacaj. De tempo al tempo, noktobirdoj, kutimaj gastoj de la kapelo, vekitaj pro ĉiuj tiuj lumoj, venis vagi ĉirkaŭ la kandeloj kies flamo supreniris rekte kaj neprecize kvazaŭ ĝi brulis

malantaŭ gazo; kaj tio kio multe amuzis *Garigo*ⁿ, estis ia moŝtulo kun grandaj okulvitroj el ŝtalo kiu senĉese skuadis sian altan nigran perukon, sur kiu unu el ĉi tiuj birdoj sin tenis rekte tute implikita silente batigante la flugilojn...

Funde, malgranda maljunulo kun infana staturo, genue meze de la ĥorejo, senespere svingadis sonorileton sen tintilo kaj sen voĉo, dum iu pastro, vestinta per malnova oraĵo, iris, reiris antaŭ la altaro recitante preĝojn kies vorton oni ne aŭdis... Kompreneble li estis moŝto *Balagero*, diranta sian trian mallaŭtan meson.

La Oranĝoj.

Fantazio.

En Parizo, la oranĝoj aspektas magajaj kiel falintaj fruktoj kolektitaj sub la arbo. Je la horo kiam ili alvenas ĉe vi, meze de pluva kaj malvarma vintro, kun sia ŝelo brila, sia bonodoro troigita en tiuj landoj de kvietaj saporoj, donas al ili strangan aspekton, iom ciganan. Dum la nebletaj vesperoj, ili malgaje laŭiras laŭlonge de la trotuaroj, amasigitaj en siaj malgrandaj vojaĝantaj ĉaretoj, sub la malhela lumeto de lanterno el ruĝa papero. Monotona kaj gracila krio akompanas ilin, perdita en la trafiko de veturiloj, la tondro de la omnibusoj :

- Po du soldoj por la Valenco !

Por la tri kvaronoj da Parizanoj, tiu frukto malproksime plukita, banala pri sia rondeco, kie la arbo lasis nenion krom maldikan verdan ligilon, similas al la sukeraĵo; al la dolĉaĵo. La silkopapero kiu envolvas ĝin, la festoj kiujn ĝi akompanas, kontribuas al tiu impresio. Ĉefe ĉe la proksimeco de januaro, la miloj da oranĝoj disŝutitaj sur la stratoj, ĉiuj tiuj ŝeloj restantaj en la koto de la rivereto, pensigas al kelka giganta kristarbo kiu skuus sur Parizo siajn branĉojn ŝarĝitajn de artefaritaj fruktoj. Ne angulo kie oni ne renkontas ilin. En la hela montrofenestro de la butikoj, elektitaj kaj ornamitaj; ĉe la pordo de malliberejoj kaj de maljunulejoj, inter la paketoj de biskvitoj, la amasoj da pomoj; antaŭ la enirejo de la balejoj, de la dimanĉaj spektakloj. Kaj ilia delikata bonodoro miksiĝas kun laodoro de la gaso, kun la bruo de violonaĉoj, al la polvo de la benketoj de la pulbalkono. Oni fine emas forgesi ke necesas oranĝujojn por produkti oranĝojn, ĉar dum la frukto alvenas al ni rekte de la Sudo

per plenaj kestoj, la arbo, stucita, transformita, pretigita, el la varma vitrodomo kie ĝi pasigis la vintron, faras nur mallongan aperon en la libera aero de la publikaj ĝardenoj.

Por bone koni la oranĝojn, necesas vidi ilin ĉe ili, en la insuloj Balearoj, en Sardinio, en Korsiko, en Alĝerio, en la orblua aero, la varmeta atmosfero de la Mediteraneo. Mi rememoras pri malgranda arbaro da oranĝujoj ĉe la eniro de **Blida**; estas tie ke ili estis belaj! En la malhela, brila, glacea foliaro, la fruktoj havis la brilon de koloritaj vitraĵoj, kaj origis la ĉirkaŭan aeron per tiu aŭreolo de splendo kiu ĉirkaŭas la brilajn florojn. Tie kaj tie maldensiĝoj lasis vidi tra la branĉoj la muregojn de la urbeto, la minareton de moskeo, la kupolon de marabutejo, kaj supre la gigantan mason de Atlaso, verda ĉe ĝia bazo, kronita per neĝo kiel per blanka pelto, kun ondumoj, ia svageco da falitaj flokoj.

Iun nokton, dum mi estis tie, mi ne scias per kiu fenomeno nekonata ekde tridek jaroj, tiu zono de prujno kaj de vintro sin skuis super la dormanta urbo, kaj **Blida** vekigis transformita, blanke pudrita. En tiu alĝeria aero tiel delikata, tiel pura, la neĝo ŝajnis perlumota polvo. Ĝi havis rebrilojn de plumoj de blanka pavo. La plej bela, tio estis la arbaro da oranĝujoj. La solidaj folioj restigi la neĝon netuŝitan kaj rektan kiel ŝorbetoj sur pletoj el lako, kaj ĉiuj fruktoj pudritaj de prujno havis belegan dolĉecon, diskretan radiadon kiel oron vualitan per helblankaj ŝtofoj. Tio malprecize faris la impreson de festo de preĝejo, de ruĝaj sutanoj sub roboj el punktoj, de oritaĵoj de altaro envolvitaj de gipuroj...

Sed mia plej bona memoro pri oranĝoj ankoraŭ venas al mi de Barbikaglia, granda ĝardeno proksime de **Ajaĉo**, kie mi iris siesti dum la varmaj horoj. Ĉi tie la oranĝujoj, pli altaj, pli malproksimaj ol en **Blida**, malsupreniris ĝis la vojo, de kiu la ĝardeno estis disigita nur per arbeda heĝo kaj fosaĵo. Tuj

poste, estis la maro, la grandega blua maro... Kiajn bonajn horojn mi pasigis en tiu ĝardeno ! Super mia kapo, la oranĝuoj en florado kaj en fruktado bruligis siajn aromajn esencojn. De tempo al tempo, matura oranĝo, subite disiĝinta, falis apud mi kiel pezigita pro varmeco, kun obtuza kaj seneĥa bruo, sur la firma tero. Mi nur devis etendi la manon. Estis belegaj fruktoj el purpura ruĝo interne. Ili ŝajnis al mi bongustegaj, kaj plie la horizonto estis tiel bela ! Inter la folioj, la maro metis brilegajn blujn spacojn kiel rompitaĵojn da vitro, kiuj ŝanĝbrilis en la nebuleto de la aero. Kun tio la onda movado ondanta la atmosferon ĝis grandaj distancoj, tiu kadenca murmuro kiu lulas vin kiel en nevidebla barko, la varmeco, laodoro de oranĝoj... Ha ! Kiel oni sin sentis komforta por dormi en la ĝardeno de Barbikaglia !

Kelkfoje tamen, ĉe la plej bona momento de la siesto, batadoj de tamburo abrupte ekvekis min. Estis malfeliĉaj tamburistoj kiuj venis lertiĝi malsupren sur la vojo. Tra la truoj en la heĝo, mi videtis la kupron de la tamburoj kaj la grandajn blankajn antaŭtukojn sur la ruĝaj pantalonoj. Por iom ŝirmi sin de la blinda lumo kiun la polvo de la vojo senkompate resendis al ili, la kompatindaj gajuloj venis sin meti ĉe la piedo de la ĝardeno en la mallonga ombro de la heĝo. Kaj ili frapis ! Kaj ili suferis de la varmo ! Tiam, eltirante min perforte el mia hipnotismo, mi amuzis min ĵetante al ili kelkajn el tiuj belaj fruktoj el ruĝa oro kiuj pendis apud mia mano. La celita tamburo haltis. Estis hezitema minuto, ĉirkaŭrigardo por vidi de kie venis la belega oranĝo ruliĝanta antaŭ li en la fosaĵo; poste li rapidege deprenis ĝin kaj grandapetite mordis sen eĉ formeti la ŝelon.

Mi ankaŭ memoras ke tute apud Barbikaglia, kaj disigita nur per malgranda malalta muro, estis sufiĉe stranga

ĝardeneto kiun mi superis de la alteco kie mi troviĝis. Estis malgranda terpeco burĝe aranĝita. Ĝiaj aleoj blondaj pro sablo, borderitaj de tre verda bukso, la du cipresoj de ĝia enirpordo aspektigi ĝin kiel marsejlan kampodomon. Neniu linio de ombro. Funde, konstruaĵo el blanka ŝtono kun lumlukoj de keleto ternivele. Mi unue kredis al kampodomo; sed, pli bone rigardante ĝin, la krucon kiu superstaris ĝin, iu surskribo kiun mi vidis de for, ĉizita en la ŝtono, sen distingi la tekston, rekonigis al mi tombon de korsika familio. Tute ĉirkaŭ Ajaĉo, estas multe da ĉi tiuj malgrandaj funebraj kapeloj, starigitaj meze de ĝardenoj al ili solaj. La familio tien venas dimanĉe, por viziti siajn gemortintojn. Tiel komprenita, la morto estas malpli veaspekta ol en la konfuzo de la tombejoj. Sole amikaj paŝadoj malkvietigas la silenton.

De mia loko, mi vidis bonan maljunulon trankvile troti tra la aleoj. Ĉiutage li stucis la arbojn, ŝpatis, akvumis, kaj forigis la velkajn florojn per zorgoplena atento; poste, ĉe la sunsubiro, li eniris en la malgrandan kapelon kie dormis la gemortintoj de lia familio; li relokis la ŝpaton, la rastilojn, la grandajn akvilojn; ĉio ĉi kun la trankvileco kaj sereneco de ĝardenisto de tombejo. Tamen, sen ke li bone rimarku tion, ĉi tiu bravulo laboris kun ia konsidero, ĉiuj bruoj malfortigitaj, kaj la pordo de la keleto refermita, ĉiufoje diskrete kvazaŭ li timis veki iun. En la granda sublima silento, la prizorgado de ĉi tiu ĝardeneto ne ĝenis birdon, kaj ĝia najbareco ne malgajigis. Nur la maro ŝajnis pli vastega, la ĉielo pli alta, kaj ĉi tiu senfina siesto metis tute ĉirkaŭ ĝi, inter la ĉarma naturo, premega per multe da vivo, la senton de eterna ripozo...

La du Gastejoj.

Estis revenante de **Nimo**, iun julian posttagmezon. Estis premeĝa varmo. Ĝis la horizonto, la blanka arda vojo trembrilis inter la ĝardenoj de olivujoj kaj de malgrandaj kverkoj, sub granda suno el senbrila arĝento, kiu plenigis la tutan ĉielon. Ne iu makulo de ombro, ne iu bloveto de vento. Nenio, nur la vibrado de la varma aero kaj la strida bruado de la cikadoj, freneza, surdiga muziko kun rapida takto, kiu ŝajnas la sonoro mem de ĉi tiu grandega luma vibrado. Mi paŝis meze de dezerto de antaŭ du horoj, kiam subite antaŭ mi, grupo de blankaj domoj distingigis el la polvo de la vojo. Estis tio kiun oni nomas la ĉevalŝanĝejo de Sankta Vincento : kvin aŭ ses kampodomoj, longaj garbejoj kun ruĝa tegmento, trinkujo sen akvo en bosketo da malgrasaj figuoj kaj ĉe la finfino de la lando, du grandaj gastejoj kiuj vidalvide interrigardas ĉiuflanke de la vojo.

La najbareco de ĉi tiuj gastejoj havis ion okulfrapantan. Ĉe iu flanko, granda nova konstruaĵo, plena de viveco, de vikleco, ĉiuj pordoj malfermitaj, la diliĝenco haltita antaŭe, la ŝvitegantaj ĉevaloj kiujn oni maljungis, la elveturiĝintaj vojaĝantoj haste trinkantaj sur la vojo en la mallarĝa ombro de la muroj; la korto embarasita de muloj, de ĉaretoj; kuŝantaj varĉaristoj sub la hangaroj atendante la malvarmeton. Interne, krioj, sakraĵoj, pugnobatoj sur la tabloj, la tintigoj de glasoj, la bruego de bilardo, la ŝtopiloj de limonadoj kiuj forsaltis, kaj superante ĉi tiun tutan tumulton, ĝoja laŭta voĉo kiu kantegis ĝis tremetigi la vitrojn :

*La bela Margotona
Frumatene ellitiĝis,*

Prenis sian arĝentan kruĉon,

Al la akvo foriris...

...La kontraŭa gastejo male estis silenta kaj kvazaŭ forlasita. Herbo sub la portalo, rompitaĵoj ŝutroj, sur la pordo, branĉeto de rusko tute rustiĝinta kiu pendis kiel malnova plumtufo, la ŝtupoj de la sojlo senmovigitaj per ŝtonoj de la vojo... Ĉio ĉi tiel malriĉa, tiel mizera ke vere estis bonfarado halti tie por trinki glaseton.

Enirante, mi trovis longan senhoman kaj senĝojan halon kiun la blinduma taglumo de tri grandaj fenestroj sen kurtenoj faras ankoraŭ pli malĝoja kaj pli senhoma. Kelkaj lamaj tabloj kie restis glasoj senbriligitaĵoj de polvo, difektita bilardo kiu etendis siajn kvar celtruojn kiel almozuojn, flava sofo, malnova verŝtablo, tie dormis en malsaniga kaj peniga varmego. Kaj muŝoj! muŝoj! Neniam mi vidis tiom el ili: sur la plafono, gluiĝintaĵoj sur la vitroj, en la glasoj, grapole... Kiam mi malfermis la pordon, estis zumado, batado de flugiloj kvazaŭ mi enirus en abelujon.

Funde de la halo, en la embrazuro de duklapa fenestro, estis virino staranta kontraŭ la vitro, tre okupiĝanta rigardi eksteren. Mi alvokis ŝin dufoje:

- He! la gastigantino!

Ŝi malrapide turnis sin, kaj vidigis al mi kompatindan vizaĝon de kamparanino, faltoplenan, fendetoplenan, terkoloran, enkadrita en longaj ornamaĵoj de rufa punto, kiel la maljunulinoj de nia regiono surmetas. Tamen ŝi ne estis maljunulino; sed la larmoj tute velkigis ŝin.

- Kion vi volas? ŝi demandis viŝante siajn okulojn.

- Sidiĝi dum momento kaj trinki ion...

Ŝi rigardis min tre mirigita, sen moviĝi de sia loko, kvazaŭ ŝi ne komprenis.

- Ĉu do ĝi ne estas gastejo ĉi tie?

La virino suspiris:

- Jes... ĝi estas gastejo, se vi volas. Sed kial vi ne iras transen kiel la aliaj ? Estas multe pli gaje...

- Ĝi estas tro gaja por mi... Mi pli ŝatas resti ĉe vi.

Kaj, sen atendi ŝian respondon, mi sidiĝis antaŭ tablon.

Kiam ŝi estis tute certa ke mi serioze parolis, la gastigantino komencis iri kaj reiri kun multokupata mieno, malfermante tirkestojn, movante botelojn, viŝante glasojn, ĝenante la muŝojn... Oni sentis, ke ĉi tiu vojaĝanto por servi estis tuta okazaĵo. En momentoj, la malfeliĉulino haltis, kaj frenezetiĝis kvazaŭ ŝi senesperigis finprepari tion.

Poste ŝi pasis en la fundan ĉambron; mi aŭdis ŝin skui dikajn ŝlosilojn, mistrakti serurojn, priserĉi en la panujo, blovi, senpolvigi, lavi la telerojn. De tempo al tempo, suspirego, malbone sufokita singulto...

Post iu kvaronhoro de tiu ĉi agmaniero, mi havis antaŭe mi telerentenon da sekvinberoj, malnovan panon de Bokero^[34] tiel malmolan kiel sabloŝtono, kaj botelon da vinaĉo.

- Vi estas servita, diris la stranga estulino, kaj ŝi tre rapide reiris preni sian lokon antaŭ la fenestro.

Trinkante, mi provis babiligi ŝin.

- Ne ofte iu venas ĉe vi, ĉu ne, kompatinda sinjorino mia ?

- Ho ! Ne sinjoro, neniam iu... Kiam ni estis solaj en la lando, tio estis malsama : ni havis la ĉevalŝanĝejon, manĝojn de ĉasaĵoj dum la tempo de la maranasoj, veturilojn dum la tuta jaro... Sed ekde kiam la najbaroj venis enlokiĝi, ni perdis ĉion... La homoj pli ŝatas iri kontraŭen. Ĉe ni, oni opinias ke estas tro malĝoje... La fakto estas ke la domo ne estas tre agrabla. Mi ne estas bela, mi suferas intermitan febron, miaj du etulinoj mortis... Tien, male, oni ĉiam ridas. Estas Arlezanino, kiu mastrumas la gastejon, bela virino kun punktoj kaj tri volvoj de ora ĉeno ĉirkaŭ la kolo. La

34 Mi ne trovis kaj do inventis tiun tradukon. France, ĝi estas "Beaucaire".

veturigisto, kiu estas ŝia amanto, alvenigi al ŝi la diliĝencon. Kun tio multe da delogulinoj kiel ĉambristinoj... Tial, klientaro alvenas tie ! Ŝi havas la tutan junularon de **Bezuso**, de **Redesano**, de **Ĵonkiero**. La varĉaristoj deturnas sin por pasi ĉe ŝi... Mi ja restas ĉi tie dum la tuta tago, sen iu ajn, konsumante min.

Si diris tion per distrita, seninteresa voĉo, kun la frunto ankoraŭ apoganta kontraŭ la vitro. Estis evidente en la kontraŭa gastejo io kiu maltrankviligis ŝin...

Subite, ĉe la alia flanko de la vojo, okazis granda movo. La diliĝenco ekmoviĝis en la polvo. Oni aŭdis la vipobatojn, la fanfaron de la postiljono, la knabinojn alkurintajn al la pordo kiu kris "Adiaŭ !... Adiaŭ !..." kaj super tio, la rimarkindan voĉon de antaŭ nelonge rekanteganta ankoraŭ pli forte :

Prenis sian arĝentan kruĉon,

Al la akvo foriris...

De tie ne vidis veni

Tri kavalirojn de la armeo...

...Je ĉi tiu voĉo la gastigantino tutkorpe tremetis kaj turnante sin al mi :

- Ĉu vi aŭdas ? Ŝi mallaŭte diris al mi, estas mia edzo.

Li bone kantas, ĉu ne ?

Mi rigardis ŝin, konsternita.

- Kiel ? Via edzo !... Ankaŭ li do iras tien ?

Tiam ŝi, per afliktita mieno, sed kun granda mildeco :

- Kion vi volas, sinjoro ? La viroj estas tiel, ili ne ŝatas vidi plori; kaj mi ĉiam ploras de post la morto de la infanetoj... Plie, estas tiel malĝoja ĉi tiu granda barako kie neniam estas iu... Tiam, kiam li tro enuas, mia kompatinda Jozefo iras aliflanken trinki, kaj ĉar li havas belan voĉon, la Arlezanino kantigas lin. ŜŜ ? !... Jen li kiu rekomencas.

Kaj tremante, la manojn antaŭe, kun dikaj larmoj kiu ankoraŭ pli malbeligis ŝin, ŝi restis tie kvazaŭ en ekstazo

antaŭ la fenestro aŭskultanta sian Jozefoⁿ kanti por la
Arlezanino :

La unua diris al ŝi :
"Saluton, bela amatino !"

En Miliana.

Vojaĝaj notoj.

Tiufoje, mi kunkondukas vin pasigi tagon en beleta urbeto de Alĝerio, je du- aŭ tri-cent leŭgoj de la muelejo... Tio iom ripozos nin de la tamburinoj kaj la cikadoj...

...Baldaŭ pluvos; la ĉielo estas griza, la krestoj de la monteto Zakaro kovriĝas per nebuleto. Malgaja dimanĉo... En mia malgranda hoteloĉambro, kun la fenestro malfermita al la arabaj remparoj, mi provas distri min ekbruligante cigaredojn... Oni metis sub mia dispono la tutan bibliotekon de la hotelo; inter tre detala historio de la registrado kaj kelkaj romanoj de Paŭlo de Kock, mi malkovris malsortimentitan volumon de Montanjo... Mi blinde malfermis la libron, relegis la admirindan leteron pri la morto de La Boesio... Jen mi pli revema kaj pli malgaja ol neniam... Kelkaj gutoj de pluvo jam falas. Ĉiu guto, falante sur la sojlon de la duklapa fenestro, faras larĝan stelon en la polvo tie amasiĝinta de post la pasintjaraj pluvoj... Mia libro glitas el miaj manoj kaj mi pasigas longajn momentojn rigardante ĉi tiun melankolian stelon...

La dua horo sonis ĉe la horloĝo de la urbo, malnova marabutejo kies maldikajn blankajn muregojn mi videtas de ĉi tie... Kompatinda marabutejo! Kiu dirintus tion al li antaŭ tridek jaroj, ke iun tagon li portus meze de sia brusto dikan urban ciferplaton, kaj ke ĉiujn dimanĉojn, ĉe la horbato de la dua, li donus al la preĝejoj de Miliana la signalon soni la vesprojn? Tin tin tin! Jen la sonoriloj ekas!... Tio daŭros longtempe... Vere, ĉi tiu ĉambro estas malgaja. La dikaj matenaj araneoj, kiujn oni nomas filozofiajn pensojn, ŝpinis siajn retojn en ĉiuj anguloj... Ni iru eksteren.

Mi alvenas sur la grandan placon. La muziko de la tria liniotrupoj, kiun iom da pluvo ne timigas, ĵus viciĝis ĉirkaŭ sia estro. Ĉe unu el la fenestroj de la divizia loko, la generalo aperas ĉirkaŭita de siaj servosoldatoj; sur la placo, la subprefekto paŝas tien kaj reen ĉe la brako de la paciga juĝisto. Duona dudeko da etaj Araboj, duonnudaj, ludas globetojn en angulo kun kruelaj krioj. Tie for, maljuna judo en ĉifonaĵoj venas serĉi sunradion kiun li hieraŭ lasis en tiu loko kaj kiun li miras ne plu trovi... "Unu, du, tri, ek!" La muziko ekludas malnovan mazurkon de **Taleksi**, kiun la gurdoj ludis dum la lasta vintro sub miaj fenestroj. Ĉi tiu mazurko tedis min antaŭe; hodiaŭ ĝi kortuŝas min ĝis larmoj.

Ho! Kiel ili estas feliĉaj la muzikistoj de la 3a! La okulo fiksita al la duhokaj notoj, ebriaj de ritmo kaj de frapobruo, ili zorgas pri nenio krom nombri siajn taktojn. Ilia animo, ilia tuta animo enestas en ĉi tiu kvadrato el papero tiel larĝa kiel la mano - kiu tremas ĉe la fino de la instrumento inter du kupraj dentoj. "Unu, du, tri, Ek!" Ĉio estas en tio por ĉi tiuj bravuloj; neniam la naciaj arioj kiujn ili ludas, okazigis al ili la nostalgion. Ve! Mi kiu ne ludas muzikon, tiu ĉi muziko ĉagrenas min, kaj mi malproksimiĝas...

Kien mi povus pasigi ĝin, ĉi tiu griza posttagmezo de dimanĉo? Nu! La butikoj de S^{ro} Omaro estas malfermita... Ni iru ĉe S^{ro} Omaro.

Kvankam li havas butikon, S^{ro} Omaro tute ne estas butikisto. Li estis sangoprince, filo de la maljuna deĵo de Alĝero kiu mortis strangolita de la janiĉaroj. Tuj post la morto de sia patro, S^{ro} Omaro rifuĝis en Miliana kun sia patrino kiun li adoris, kaj vivis tie dum kelkaj jaroj kiel filozofa grandsinjoro inter siaj leporhundoj, siaj falkoj, siaj ĉevaloj kaj siaj edzinoj, en beletaj tre varmetaj palacoj plenaj de oranĝujoj kaj de fontanoj. Venis la francoj. S^{ro} Omaro, unue nia malamiko kaj la aliancano de **Abdelkader**,

fine kverelis kontraŭ la emiro kaj akceptis sian submetiĝon. La emiro por sin venĝi, eniris en Milianaⁿ dum foresto de S^{ro} Omaro, rabis liajn palacojn, detruis liajn oranĝujojn, kunprenis liajn ĉevalojn kaj liajn edzinojn, kaj premigis la gorgon de lia patrino sub la fermoplato de granda kofro... La kolero de S^{ro} Omaro estis terura : tujtuje li sin metis en servadon de Francio, kaj ni havis nek pli bonan aŭ nek pli kruelan soldaton ol li dum nia milito daŭris kontraŭ la emiro. La militon finitan, S^{ro} Omaro revenis al Miliana; sed ankoraŭ hodiaŭ, kiam oni parolas pri **Abdelkader** antaŭ li, li iĝas pala kaj liaj okuloj lumiĝas.

S^{ro} Omaro estas sesdekjara. Malgraŭ la aĝo kaj la variolo, lia vizaĝo restis bela : grandaj okulharoj, virina rigardo, ĉarma rideto, princa mieno. Ruinigita pro la milito, restas al li de sia tiama riĉeco nur farmobienon en la ebenaĵo de la **Ŝelifo** kaj domon en Miliana, kie li burĝe vivis kun siaj tri filoj edukitaj antaŭ siaj okuloj. La indiĝenaj estroj traktas lin kun granda respekto. Kiam diskuto vigliĝas, oni volonte prenas lin kiel juĝanton, kaj lia prijuĝo preskaŭ ĉiam rolas kiel leĝo. Li malmulte eliras : oni trovas lin dum ĉiuj posttagmezoj en butikoj apudmetita al lia domo kaj kiu rigardas al la strato. La meblaro de ĉi tiu ĉambro ne estas riĉa : blankaj muroj kalkitaj, cirkla benko el ligno, kusenoj, longaj pipoj, du braĝujoj... Estas tie kie S^{ro} Omaro aranĝas aŭdiencon kaj juĝadas. Iu Salomono en butikoj.

Hodiaŭ, dimanĉon, la ĉeestantaro estas multenombra. Dekduo da ĉefoj estas kaŭrantaj, en siaj burnusoj, tute ĉirkaŭ la ĉambro. Ĉiu el ili havas apud si grandan pipon, kaj malgrandan glason da kafo en fajna ingotenilo el filigrano. Mi eniras, neniu moviĝas... De sia loko, S^{ro} Omaro sendas renkonte al mi sian plej ĉarman rideton kaj invitas min per la mano sidiĝi apud li, sur granda kuseno el flava silko; poste, kun fingro sur la lipoj, li signas al mi aŭskulti.

Jen la kazo : La kaido de la Beni-Zuguzogoj havinta kelkan konteston kun judo de Miliana pri terpeco, la du partioj interkonsentis alporti la disputon antaŭ S^{ro} Omaro kaj fidi al lia juĝado. Rendevuo estas aranĝita por la sama tago, la atestantoj estas kunvokitaj; subite jen mia judo kiu ŝanĝas sian opinion, kaj venas sole, sen atestantoj, deklari ke li pli ŝatas sin konfidi al la paciga juĝisto de la francoj ol al S^{ro} Omaro... La afero estis tie ĉe mia alveno.

La judo - maljuna, terkolora barbo, maronkolora jako, bluaj ŝtrumpoj, velura kaskedo - levas la nazon al la ĉielo, ruladas la petegantajn okulojn, kisas la babuŝojn de S^{ro} Omaro, klinas la kapon, genuiĝas, kunigas la manojn... Mi ne komprenas la araban, sed laŭ la pantomimon de la judo, per la vorto "zukisto de paco, zukisto de paco" kiu ĉiumomente revenas, mi divenas ĉi tiun tutan belan paroladon :

- Ni ne dubas pri S^{ro} Omaro, S^{ro} Omaro estas saĝa, S^{ro} Omaro estas justa... Tamen, la zukisto de paco multe pli bone okupiĝos pri nian aferon.

La aŭskultantaro, indignigita, restas senesprima kiel arabo kiun ĝi estas... Kuŝinta sur sia kuseno, la okulo vualita, la sukkena nargilebeko ĉe la lipoj, S^{ro} Omaro - dio de ironio - ridetis aŭskultante. Subite, meze de sia plej bela periodo, la judo estas interrompita de energia "karamba !"^[35] kiu abrupte haltigas lin; samtempe hispana koloniano, alveninta tie kiel atestanto de la kaido, forlasas sian lokon kaj, alproksimiĝanta al Iskarioto, ŝutas sur lian kapon plenan korbon da blasfemoj el ĉiuj lingvoj, el ĉiuj koloroj - interalie kelkan francan vorton tro kruda, sinjoro, por ke oni ripetas ĝin ĉi tie... La filo de S^{ro} Omaro, kiu komprenas la francan, ruĝiĝas pro aŭdi tian vorton en la ĉeesto de sia patro kaj eliras el la ĉambro. - Memori ĉi tiun trajton de la araba eduko. - La aŭskultantaro estas ankoraŭ senesprima, S^{ro}

35 Hispana sakraĵo esprimanta surprizon, timon, koleron, ktp...

Omaro ankoraŭ ridetanta. La Judo stariĝas kaj atingas dorsdirekte la pordon, tremante pro timo, sed pli kaj pli pepante sian eternan zukisto de paco, zukisto de paco... Li eliras. La hispano, furioza, sin pelas post li, kuniĝis al li sur la strato kaj dufoje - flak ! klak ! - frapas lin trafe en la vizaĝo... Iskarioto falas surgenuen, brakoj kruce... La hispano, iom honta, eniras en la butikon... Tuj kiam li estas enirinta, - la judo restariĝas kaj insideme ĉirkaŭrigardas al la bunta amaso kiu ĉirkaŭas lin. Ekzistas tie homoj el ĉiuj gentoj - Maltanoj, Maonanoj, Negroj, Araboj, ĉiuj kunigitaj en la malamo kontraŭ la judo kaj feliĉaj vidi mistrakti unu el ili... Iskarioto momente hezitas, poste kaptante Arabon per la basko de lia burnuso :

- Vi vidis lin, Ĥamedo, vi vidis lin... Vi ĉeestis... La kristano frapis min... Vi estos atestanto... nu... nu... vi estos atestanto.

La Arabo liberigas sian burnuson kaj forpuŝas la judon... Li nenion scias, li nenion vidis; ĝuste tiam li turnis la kapon...

- Sed vi, Kaduro, vi vidis lin... Vi vidis la kristanon bati min... krias la kompatinda Iskarioto al dika negro senŝeligante kaktofigon...

La Negro kraĉas en signo de malestimo kaj foriras, li nenion vidis. Li ankaŭ nenion vidis, tiu malgranda Maltano kies la karbokoloraj okuloj malice brilas malantaŭ lia bereto; ŝi nenion vidis, ĉi tiu **Maonanino** kun brikkolora vizaĝo kiu forkuras ridante kun sian korbon da granatoj sur la kapo...

La judo vane krias, petegas, klopodas... neniu atestanto ! Neniu vidis ion... feliĉe, du el liaj samreligianoj preterpasas tiumomente en la strato, kun klinita kresto, tuŝetante la muregojn. La judo ekvidas ilin :

- Rapide, rapide, miaj fratoj ! Rapide al la aferkonsilisto ! Rapide al la zukisto de paco ! Vi ja vidis lin... vi vidis ke oni batis la maljunulon !

Se ili vidis lin ! Mi vere kredas.

...Granda tumulto en la butikoj de S^{ro} Omaro... La kafejestro plenigas la tasojn, rebruligas la pipojn. Oni babilas, oni plengorĝe ridas. Estas tiom amuze vidi draŝi judon !... Mezo de la bruego kaj de la fumo, mi malrapide atingas la pordon; mi deziras iri iomete vagi ĉe la flanko de Israelo por scii kiel la samreligianoj de Iskarioto akceptis la ofendon farita al sia frato...

- Venu manĝi ĉi tiun vesperon, sinjoro, krias al mi la bona S^{ro} Omaro...

Mi akceptas, dankas. Jen mi ekstere.

En la juda kvartalo, ĉiuj estas sur la piedoj. La afero jam faras grandan bruon. Neniu ĉe la butiketoj. Brodistoj, tajloroj, selistoj - la tuta Israelo estas sur la strato... La viroj kun velura kaskedo, kun blujaj ŝtrumpoj el lano, grupe gestadantaj brue... La virinoj, palaj, ŝvelaĉaj, rigidaj kiel lignaj idoloj, en siaj rektaj roboj kun ora brustotolaĵo, la vizaĝo ĉirkaŭita de nigraj rubandetoj, iras de iu grupo al alia, babilante... Ĝuste kiam mi alvenas, granda movado okazas en la homamaso. Oni rapidas, oni kuregas... Apoginta sur siaj atestantoj, la judo, heroo de la aventuro, pasas inter du kordonoj da kaskedoj, sub pluvo da instigoj :

- Venĝu vin, frato, venĝu nin, venĝu la juda popolo. Timu nenion; vi havas la leĝon kun vi.

Forpuŝe malbela nano, stinkante la peĉon kaj la malnovan ledon, alproksimiĝas al mi kun aflikta mieno, kun pezaj suspiroj :

- Vi vidas ! li diras al mi. La kompatindaj judoj, kiel oni traktas nin ! Li estas maljunulo ! Rigardu. Ili preskaŭ mortigis lin.

Vere, kompatinda Iskarioto ŝajnas pli morta ol viva. Li preterpasas antaŭ mi, kun la okulo senbrila, la vizaĝo malvigla; ne paŝante, sin trenante... Nur forta monkompensado

kapablas resanigi lin; tial oni ne kondukas lin ĉe la kuraciston, sed ĉe la aferkonsiliston.

Estas multaj aferkonsilistoj en Alĝerio, preskaŭ tiom kiom da lokustoj. La metio estas bona, ŝajnas. Ĉiaokaze, ĝi havas tiun oportunaĵon ke oni povas facile eniri en ĝi, sen ekzamenoj, nek patronado, nek staĝo. Kiel en Parizo ni faras sin verkistojn, oni faras sin aferkonsiliston en Alĝerio. Sufiĉas por tio, scii iom da franca, da hispana, da araba, ĉiam havi kodon en sia teko, kaj pri ĉio la temperamenton de la metio.

La taskoj de la konsilisto estas tre diversaj : laŭvice advokato, proceduristo, makleristo, ekspertizisto, interpretisto, komisiisto, librotenisto, skribisto, li estas la faktoto de la kolonio. Sed Harpagono havis nur unu faktoton, kaj la kolonio havas pli el ili ol necesas al ĝi. Nur por Miliana, oni nombras ilin dekduope. Ĝenerale, por eviti elspezojn de oficejo, tiuj sinjoroj ricevas siajn klientojn ĉe la kafejo de la granda placo kaj donas siajn konsultojn - ĉu ili donas ilin ? - inter la absinto kaj la brandokafo.

Estas al la kafejo de la granda placo kiun la digna Iskarioto direktas sin, flankita de siaj du atestantoj. Ni ne sekvu ilin.

Elirante el la juda kvartala, mi pasas antaŭ la domo de la araba oficejo. De ekstere, kun ĝia ĉapo el ardezoj kaj la franca flago kiu flagras sur ĝi, oni rigardus ĝin kiel la urbodomon de la vilaĝo. Mi konas la interpretiston, ni eniru fumi cigaredon kun li. De cigaredo al cigaredo, mi fine ja mortigos ĝin, ĉi tiun dimanĉon sen suno !

La korto kiu antaŭas la oficejon, estas obstrukcita de Araboj en ĉifonaĵoj. Ili estas tie ĉirkaŭ kvindek farantaj antaŭĉambrojn, kaŭrantaj, laŭlonge de la muro, en siaj burnusoj. Ĉi tiu beduena antaŭĉambro odoras - kvankam en libera aero - fortan odoron de homa led. Ni rapide

preterpasu. En la oficejo mi trovas la interpretiston vidalvide al du grandaj blekemuloj, tute nudaj sub longaj malpuregaj kovriloj, kaj rakontante per furioza mienludo, mi ne scias kia rakonto pri ŝtelita rozario. Mi sidiĝas sur mato en iu angulo, kaj spektas... Beleta kostumo, tiu ĉi kostumo de interpretisto; kaj kiel la interpretisto de Miliana bone survestas ĝin! Ili ŝajnas tajlitaj unu por la alia. La kostumo estas ĉielblua kun nigraj ŝnurgalonoj kaj oraj butonoj kiuj brilas. La interpretisto estas blonda, roza, tute bukla; iu beleta blua husaro plena de humuro kaj fantazio; iom babilema (li parolas tiom da lingvoj!), iom skeptika (li konis **Renan** en la orientalista lernejo!), granda amato de sporto, tiel trankvila en la araba bivako kiel en la vesperfestoj de la subprefektino, dancanta mazuron pli bone ol iu ajn, kaj faranta kuskuson kiel neniu. Parizano, por ĉion diri; jen mia viro, kaj ne miru ke la virinoj ŝategas lin. Kiel dandismon, li havas nur unu rivalon: la serĝento de la araba oficejo. Tiu ĉi, kun sia tuniko el fajna tuko kaj siaj gamaŝoj kun butonoj el perlamoto, igas la malesperon kaj la envion de la tuta garnizono. Forkomandita al la araba oficejo, li estis liberigita de la taskoj, kaj ĉiam montris sin sur la stratoj, blanke gantita, freŝe frizita, kun grandaj registroj sub la brako. Oni admiras kaj oni timas lin. Li estas aŭtoritatulo.

Decide, ĉi tiu rakonto pri ŝtelita rozario riskas esti tre longa. Bonan vesperon! Mi ne atendas la finon.

Elirante, mi trovas la antaŭĉambron en ekscitita stato. La homamaso kunpremiĝas ĉirkaŭ iu altstatura indiĝeno, pala, fiera, volvita en nigra burnuso. Ĉi tiu, antaŭ ok tagoj, batalis en la **Zakaro** kun pantero. La pantero mortis; sed la viro estis kun la duonon de la brako manĝita. Vespere kaj matene li venas pansigi sin en la araba oficejo, kaj ĉiufoje oni haltigas lin en la korto por aŭdi lin rakonti lian okazintaĵon. Li malrapide parolas, kun bela guturala voĉo. De tempo al

tempo li malfermas sian burnuson kaj montras, ligita al sia brusto, sian maldekstran brakon envolvitan de sangaj toloj.

Apenaŭ kiam mi estas sur la strato, jen fortega fulmotondro kiu ekokazas. Pluvo, tondro, fulmoj, siroko... Rapide, ni ŝirmu nin. Mi rekte trapasas hazardan pordon, kaj falas meze de kuniĝo de ciganoj, amasiĝintaj sub la arkaĵoj de maŭra korto. Ĉi tiu korto apudas al la moskeo de Miliana; ĝi estas la kutima rifuĝo de la islama mizereco, oni nomas ĝin la korto de malriĉuloj.

Grandaj malgrasaj leporhundoj, tute kovritaj de laŭsoj, venas vagi ĉirkaŭ mi, kun malafabla mieno. Dorsapogiĝanta kontraŭ unu el la pilieroj de la galerio, mi provas montri memfidan mienon, kaj sen paroli al iu, mi rigardas la pluvon kiu resaltas sur la kolorigitaj slaboj de la korto. La geciganoj estas surgrunde, kuŝintaj amasope. Apud mi, juna virino, preskaŭ bela, kun gorĝo kaj kruroj malkovritaj, kun dikaj brakringoj el fero ĉe la pojnoj kaj la maleoloj, kantas strangan arion je tri melankoliaj kaj nazalaj notoj. Kantante, ŝi mamnutris etan infanon tute nudan el ruĝa bronzo, kaj per la brako restita libera, ŝi pistis hordeon en ŝtona pistujo. La pluvo, pelita de kruela vento, kelkfoje inundas la krurojn de la suĉigantino kaj la korpon de ŝia suĉinfano. La ciganino tute ne atentis pri tio, kaj daŭrigas kanti, sub la ekblovego, pistante la hordeon kaj donante la mamon.

La ŝtormo malpliigas. Profitante de plibeliĝon, mi rapidas forlasi tiun korton de Mirakloj, kaj direktas min al la vespermanĝo de S^{ro} Omaro; estas la tempo... Trairante la grandan placon, mi denove renkontis mian maljunan judon de antaŭ nelonge. Li apogas sin sur sia aferkonsilisto; liaj atestantoj gaje paŝas malantaŭ li; bando da malbonaj malgrandaj judoj kapriolas ĉirkaŭe... ĉiuj vizaĝoj radias. La konsilisto zorgas pri la afero : li petos al la tribunalo du mil frankojn kiel monkompenson.

Ĉe S^{ro} Omaro, pompa vespermanĝo. La manĝoĉambro rigardas al eleganta maŭra korto kie kantas du aŭ tri fontanoj... Bonega turka manĝo, rekomendita al Barono Briso. Inter aliaj pladoj, mi rimarkas kokidaĵon kun migdaloj, vanilan kuskuson, viandon kun testuda saŭco - iomete peza sed el la plej alta gusto - kaj biskvitoj kun mielo kiujn oni nomas pasteĉoj de la Radio... Kiel vino, nur ĉampano. Malgraŭ la islama leĝo, S^{ro} Omaro iom trinkas ĝin - kiam la servistoj turnas la dorson... Post la vespermanĝo, ni transiras en la ĉambron de nia gastiganto kie oni alportas al ni konfitaĵojn, pipojn kaj kafon... La aranĝo de tiu ĉambro estas el la plej simplaj : divano, kelkaj matoj; ĉe la fundo, granda tre alta lito, sur kiu pigrumas ruĝaj kusenetoj broditaj per oro... Sur la murego estas kroĉita malnovan turkan pentraĵon figuranta la heroaĵojn de iu admiralo Hamadio. Laŭdire, en Turkio, la pentristoj uzas nur unu koloron sur iu pentraĵo : ĉi tiu pentraĵo estas dediĉita al verdo. La maro, la ĉielo, la ŝipoj, la Admiralo Hamadio mem, ĉio estas verda, kaj per kia verdo !...

La araba kutimo postulas ke oni frue foriras. La kafo prenita, la pipoj fumitaj, mi deziras bonan nokton al mia gastiganto kaj mi lasas lin kun liaj edzinoj.

Kien mi finos mian vesperon ? Estas tro frue por enlitiĝi, la klarionoj de la spahioj ankoraŭ ne sonis la retiriĝon. Cetere, la oraj kusenetoj de S^{ro} Omaro dancas ĉirkaŭ mi fantastajn farandolojn kiuj malhelpus min dormi... Jen mi antaŭ la teatro, ni eniru dum momento.

La teatro de Miliana estas iama staplo por furaĝo, pli-malpli bone transformita al spektaklejo. Dikaj oleolampoj, kiujn oni plenigas per oleo dum la interakto, servas kiel lustrojn. La partera publiko estas staranta, la orkestra publiko sur benkoj. La balkona publiko estas tre fieraj ĉar ili havas pajlajn seĝojn... Tute ĉirkaŭ la spektaklejo, longa

malhela koridoro sen pargeto... Oni kredus sin sur la strato, nenio mankas... La prezentado jam komencis kiam mi alvenas. Je mia granda surprizo, la aktoroj ne estas malbonaj, mi parolas pri la viroj; ili havas vigecon, vivecon... Ili estas preskaŭ ĉiuj amatoroj, soldatoj de la 3^a; la regimento fieras pri tio kaj venas ĉiuvespere aplaŭdi ilin.

Koncerne la virinojn, bedaŭrinde !... estas ankoraŭ kaj ĉiam tiu eterna virineco de la malgravaj teatroj de provinco, arogantaj, troigitaj kaj falsaj... Tamen, estas du kiuj interesas min inter ĉi tiuj sinjorinoj, du tute junaj judinoj de Miliana kiu debutas en la teatro... La gepatroj estas en la ĉeestantaro kaj ŝajnas kontentegaj. Ili havas konvinkon ke iliaj filinoj baldaŭ gajnos milojn da duroj per tiu afero. La legendo de Raĥel, Izraelidino, milionulino kaj aktorino, jam estas fama inter la judoj de Oriento.

Nenio tiel amuza kaj kortuŝa kiel tiuj du etaj Judinoj sur la tabuloj... Ili timeme staras en angulo de la scenejo, pudritaj, ŝminkitaj, dekoltitaj kaj tute streĉitaj. Ili suferas malvarmo, ili hontas. De tempo al tempo, ili balbutas frazon sen kompreni ĝin, kaj dum ili parolas, siaj grandaj hebreaj okuloj konsterneg rigardas en la spektaklejon.

Mi eliras el la teatro... Meze de la ombro kiu ĉirkaŭas min, mi aŭdas kriojn en angulo de la placo... Sendube kelkaj Maltanoj diskutante per frapoj de tranĉilo...

Mi malrapide revenas al la hotelo, laŭ la remparoj. Adorindaj odoroj de oranĝujoj kaj de tujoj leviĝas de la ebenaĵo. La aero estas milda, la ĉielo preskaŭ pura. Tie for, ĉe la fino de la vojo, staras malnova fantomo de murego, restaĵoj de kelka antikva templo. Tiu muro estas sakrala : ĉiutage la arabaj virinoj venas pendigi tien eksvotojn, pecojn de haïk^{oj[36]} kaj fouta^{oj[36]}, longajn rufajn harplektaĵojn

36 Mi ne trovis tradukon, ĝi estas speco de granda kaptuko surmetita kiel vualo (haïk) de Magrebaninoj kaj kiel turbano (fouta) de la Magrebaninoj.

ligitajn de arĝentaj fadenoj, pecojn de burnuso... ĉio tio
flirtas sub maldika lunradio, laŭ la varmeta blovo de la
nokto...

La Lokustoj.

Ankoraŭ iu memoraĵo de Alĝerio, kaj poste ni revenos al la muelejo...

Dum la nokto de mia alveno en ĉi tiu farmobieno de **Sahelo**, mi ne povis dormi. La lando nova, la agitado de la vojaĝo, la bojadoj de la ŝakaloj, plie nervoziga, prema varmego, kompleta sufokiĝo, kvazaŭ la maŝoj de la kul-vualo ne lasis pasi ventoblovon... Kiam mi malfermis mian fenestron ĉe la tagiĝo, peza nebuleto de somero, malrapide kirlita, franĝita ĉe la randoj de nigra kaj roza koloro, ŝvebis en la aero kiel nubo de polvo sur batalejo. Neniu folio moviĝis, kaj en tiuj belaj ĝardenoj, kiujn mi havis sub la okuloj, la interspacigitaj vitoj sur la deklivoj sub la sunego kiu faras vinojn sukerajn, la fruktoj de Eŭropo ŝirmitaj en angulo de ombro, la malgrandaj oranĝujoj, la mandarinujoj en longaj vicoj mikroskopaj, ĉio gardis la saman mornan aspekton, tiun ĉi senmovecon de la folioj atendanta la ŝtormon. La bananujoj mem, tiuj altaj dolĉe verdaj kanoj, ĉiam svingitaj de kelka blovo kiu taŭzas ilian delikatan hararon tiel malpezan, silente kaj rekte staris laŭ regulaj plumpfaskoj.

Mi restis dum momento por rigardi tiun mirindan plantejon kie ĉiuj arboj de la mondo troviĝis kunigitaj, ĉiu donanta dum sia sezono siajn ekzotajn florojn kaj fruktojn. Inter la kampoj de tritiko kaj la boskoj de korkokverkoj, rivereto brilis, revigliganta vidi ĝin en tiu ĉi sufoka mateno; kaj admirante la lukson kaj la ordon de tiuj aferoj, tiun ĉi belan farmodomon kun ĝiaj maŭraj arkadoj, ĝiaj tute blankaj terasoj de mateniĝo, la stalojn kaj la ŝedojn ĉirkaŭe arigitajn, mi pensis ke antaŭ dudek jaroj, kiam tiuj ĉi

bravuloj venis ekloĝiĝi en ĉi tiu valo de Sahelo, ili trovis nur malbonan barakon de vojisto, sovaĝan terenon hirtigitan de nanaj palmoj kaj de lentiskoj. Ĉio por krei, ĉio por konstrui. Ĉiumomente, ribeloj de Arabanoj. Necesis lasi la plugilon por refuti la kontraŭaĵojn. Poste la malsanoj, la oftalmitoj, la febroj, la malbonaj rikoltoj, la hezitadoj de la sensperteco, la lukto kontraŭ obstina administrado, ĉiam hezitema. Kiom da klopodoj ! Kiom da laciĝo ! Kia senĉesa kontrolado !

Ankoraŭ nun, malgraŭ la malbonaj tempoj finitaj kaj riĉaĵo tiel altapreze gajnita, ambaŭ, la viro kaj la virino, estis la unuaj ellitiĝintaj en la bieno. Ĉe tiu frua horo, mi aŭdis ilin iri kaj reiri en la grandaj kuirejoj de la teretaĝo, priatentantaj la kafon de la laboristoj. Baldaŭ sonorilo sonoris, kaj post momento la laboristoj sinsekvis sur la vojo. Vitistoj de Burgonjo; kabilaj plugistoj en ĉifonaĵoj, kapvestitaj de ruĝa fezo; Maonanaj teraĵistoj kun la kruroj nudaj; Maltanoj; **Lukanoj**; iu tuta diverskonsista popolo, malfacile por estri. Al ĉiu el ili la farmisto, antaŭ la pordo, disdonis lian tagan taskon per seka, iom raspa voĉo. Kiam li finis, la brava viro levis la kapon, kaj observis la ĉielon kun maltrankvila mieno; poste ekvidante min ĉe la fenestro :

- Malbona vetero por la kultivado, li diris al mi, jen la siroko.

Efektive, laŭmezure kiam la suno leviĝis, varmegaj, sufokaj aerblovaĵoj, alvenis al ni de la sudo kiel de la pordo de forno malfermita kaj refermita. Oni ne sciis kien sin meti, kion fariĝi. La tuta mateno tiel pasis. Ni trinkis kafon sur la matoj de la galerio, sen kuraĝi aŭ paroli aŭ moviĝi. La hundoj kuŝintaj, serĉante la malvarmeton de la slaboj, sin etendis laŭ senkuraĝaj pozoj. La matenmanĝo iom revigligis nin, abunda kaj aparta matenmanĝo kie estis karpaĵoj, trutaĵoj, apraĵo, erinacaĵo, butero de **Staelio**, la vinoj de **Krescia**, gujavoĵoj, bananoj, ia tuta kutimŝanĝo de manĝaĵoj kiu

bone similis al la tiel kompleksa naturo de kiu ni estis ĉirkaŭita. Oni estis eltabliĝontaj. Subite, ĉe la fenestropordo, fermita por protekti nin kontraŭ la fornegan varmegon de la ĝardeno, grandaj krioj tondris :

- La akridoj ! La akridoj !

Mia gastiganto fariĝis tute pala kiel iu homo al kiu oni sciigas katastrofon, kaj ni rapidege eliris. Dum dek minutoj, estis en la loĝejo, tiel trankvila antaŭ momento, bruo de hastaj paŝadoj, de konfuzaj voĉoj perditaj pro la agitado de vekiĝo. El la ombro de la vestibloj kie ili endormiĝis, la servistoj pafiĝis eksteren tintigante per bastonoj, forkoj, draŝiloj, ĉiuj metalaj uzaĵoj kiuj enfalis en ilian manon, kuprajn kaldronojn, pelvojn, kaserolojn. La paŝtistoj blovis en siaj kornoj de paŝtejo. Aliaj havis marajn konkajn, ĉaskornojn. Tio kaŭzis timigan kaj neharmonian bruegon kiun superis per akutega noto, la "hu ! hu ! hu !" de la arabaj virinoj alkurintaj de najbara duaro. Ofte, ŝajnas, sufiĉas granda bruo, sonora vibrado de la aero por forigi la lokustojn, por malhelpi ilin malsupreniri.

Sed kie do ili estis tiuj teruraj bestoj ? En la ĉielo vibranta pro varmo, mi vidis nenion krom nubo venanta de la horizonto, kuprokolora, kompakta, kiel hajlonubo, kun bruo de ŝtorma vento en la mil frondoj de arbaro. Tio estis la lokustoj. Inter ili subtenitaj de siaj sekaj etenditaj flugiloj, ili amase flugis, kaj malgraŭ niaj krioj, niaj penoj, la nubo daŭre antaŭeniris, ĵetante sur la ebenaĵo grandegan ombron. Baldaŭ ĝi alvenis super niajn kapojn; sur la randoj, oni dumsekunde ekvidis, franĝiĝon, ŝiriĝon. Kiel la unuaj grenoj de ekpluvo, kelkaj disiĝis, distingeblaj, rufetaj; poste la tuta svarmo krevis, kaj tiu hajlo da insektoj falis dense kaj brue. Ĝis tie kie la rigardo povas atingi, la kampoj estis kovritaj de akridoj, de gigantaj akridoj, dikaj kiel fingro.

Tiam la masakro komenciĝis. Malbelega murmuro de

frakaso, de dispremita pajlo. Per la erpiloj, la pioĉoj, la plugiloj, oni fosis tiun moviĝeman grundon; kaj pli oni mortigis ilin, pli ili estis. Ili tavole svarmis kun iliaj altaj kruroj interplektitaj; tiuj el la supro eksaltis pro premateco, saltante ĉe la nazo de la ĉevaloj jungitaj por ĉi tiu stranga plugado. La hundoj de la farmobieno, tiuj de la duaro, ĵetitaj trans la kampojn, impetegis al ili, dispremante ilin furioze. Tiumomente du rotoj de **turkoj**^[37], kun klarionoj fronte, alvenis por helpi la malfeliŝajn kolonianojn, kaj la buĉado ŝanĝis la aspekton.

Anstataŭ disbati la lokustojn, la soldatoj flamigis ilin, disŝutante longajn spurojn de pulvo.

Laca pro mortigi, naŭzita de la fetoraodoro, mi reiris. Interne de la farmodomo, estis preskaŭ tiom kiom ekstere. Ili eniris tra la aperturoj de la pordoj, de la fenestroj, de la breĉoj por kamentuboj. Rande de la lignotegaĵoj, en la kurtenoj jam tute manĝitaj, ili sin trenis, falis, flugis, grimpis sur la blankaj muroj kun giganta ombro kiu duobligis ilian malbelecon. Kaj ankoraŭ tiu teruraodoro.

Dum la tagmanĝo, necesis rezigni pri akvo. La cisternoj, la basenoj, la putoj, la fiŝujoj, ĉio estis difektita. Vespere, en mia ĉambro, kie oni tamen mortigis ilin grandkvante, mi ankoraŭ aŭdis svarmadojn sub la mebloj, kaj tiun krakon de elitroj similan al la ŝaŭmado de la guŝoj kiuj eksplodas sub la varmego. Tiun nokton ankaŭ mi ne sukcesis dormi. Cetere, ĉirkaŭ la farmobieno, ĉio maldormis. Flamoj ternivele trakuris la tutan ebenaĵon. La **turkoj** ankoraŭ mortigis ilin.

La morgaŭon, kiam mi malfermis mian fenestron kiel la antaŭtagon, la lokustoj estis foririntaj; sed kian ruinon ili forlasis malantaŭ si! Ne plu iu floro, ne plu iu herbero: ĉio estis nigra, ronĝita, kalcinita. La bananujoj, la abrikotujoj, la

37 Nomo donita de la rusoj dum la Krima milito al la Alĝeriaj tiraljoroj kiujn ili kredis turkojn.

persikujoj, la mandarinuoj, rekonigis nur per la aspekto de siaj nudigitaj branĉoj, sen la ĉarmo, la flirtado de la folio kiu estas la vivo de la arbo. Oni purigis la lagetojn, la cisternojn. Ĉie plugistoj fosis la teron por mortigi la ovojn demetitajn de la insektoj. Ĉiu terbulo estis turnita, zorge rompita. Kaj la koro premiĝis pro vidi la mil blankajn radikojn, plenajn de suko, kiuj aperis en ĉi tiuj disfaloj de fekunda tero...

La Eliksiro de la Pastra Moŝto.

- Trinku tion, mia najbaro; vi diros al mi viajn impresojn pri tio.

Kaj guto post guto, kun la detalema zorgado de gemisto nombranta perlojn, la preposto de **Gravesono** verŝis al mi du fingrolarĝoj da likvoro verda, ora, varma, brila, bongustega... Mia stomako estis tute varmigata.

- Ĝi estas la eliksiro de Patro Livulo, la ĝojo kaj la sano de nia Provenco, eligis la brava viro, kun fiereco; oni produktas ĝin en la monaĥejo de la **Premonstratoj**, je du leŭgoj de via muelejo... Tio ja valoras ĉiujn kartuzianajn likvorojn de la mondo, ĉu ne ?... Kaj se vi scius kiom estas amuza, la historio de tiu eliksiro ! Prefere aŭskultu...

Tiam, tute naive, sen malicaĵo, en ĉi tiu manĝoĉambro de pastrejo, tiom senartifika kaj tiom kvieta kun ĝia Kalvaria vojo laŭ pentraĵetoj kaj ĝiaj beletaj helaj kurtenoj amelitaj kiel surpriso, la pastro komencis por mi rakonteton iomete skeptika kaj impertinenta, laŭ la maniero de fabelo de **Erasm**o aŭ de **Asucio** :

- Antaŭ dudek jaroj, la **Premonstratuloj**, aŭ pli ĝuste la Blankaj Pastroj, kiel niaj Provencanoj nomas ilin, enfalis en grandan mizeron. Se vi vidintus ilian tiaman domon, ĝi afliktus vin.

La granda muro, la domturo Pakomo, disfalis. Tute ĉirkaŭ la klostro plenplena de herboj, la kolonetoj fendiĝis, la ŝtonaj sanktulstatuoj sinkis en siaj niĉoj. Ne iu vitralo staranta, ne iu pordo kiu eltenis. En la mezkortoj, en la kapeloj, la vento de la Rodano blovis kiel en Kamargo, estingante la kandelojn, rompante la plumbaĵojn de la vitroseptoj, elpelante la akvon el la sanktakvujoj. Sed la plej

malgaja el ĉio estis la sonorilturo de la monaĥejo, senbrua kiel malplena kolombejo; kaj la Pastroj, pro manko de mono por aĉeti al si sonorilon, devigitaj sonorigi la matutinion per klakiletoj el ligno de migdalujo !...

Kompatindaj blankaj Pastroj ! Mi ankoraŭ vidas ilin dum la procesio de la **Kristokorpa Festo**, malgaje defilante en iliaj flikitaj pelerinoj, palajn, malgrasajn, nutritajn de citroloj kaj akvomelonoj, kaj malantaŭ ili, Monsinjoro abato kiu venis kun klinita kresto, tute malfiera montri en la suno, sian senorigitan episkopan bastonon kaj sian vermopikitan mitron el blanka lano. En la vicoj, la sinjorinoj de la pia societo komplete ploris pro tio, kaj la dikaj standardistoj tute mallaŭte rikanis inter si montrante unu la alian la kompatindajn monaĥojn :

- La sturnoj iras malgrasaj kiam ili iras ope.

Fakte la malbonsortaj Blankaj Pastroj mem alvenis al la demando, ĉu ili ne pli bone farus peli sin tra la mondo kaj serĉi nutraĵon ĉiu siaflanke.

Nu, iun tagon kiam ĉi tiu grava demando estis diskutita en la kapitulo, oni venis sciigi al la prioro ke la frato Livulo petis esti aŭskultata ĉe la konsilio... Vi scios, informcele, ke ĉi tiu frato Livulo estis la bovisto de la monaĥejo; tio estas, ke li pasigis siajn tagojn vagadante de arkado al arkado en la klostro, pelante antaŭ si du malgrasegajn bovinojn kiu serĉis la herbon en la fendoj de la pavimoj. Nutrita ĝis dekdu jaroj de maljuna frenezulino el la lando de **Baŭ** kiun oni nomis onklino Begona, de tiam hejmakceptita de la monaĥoj, la malfeliĉa bovisto neniam sukcesis lerni ion krom konduki siajn bestojn kaj reciti sian "Pater noster"^[38]; kvankam li diris ĝin en provenca, ĉar li havis malgrandan cerbon kaj spiriton kiel plumban spadeton. Cetere, fervora kristano, kvankam iom viziulo, kontenta en la pentoĉemizo, kaj

trudante al si disciplinon per firma konvinko, kaj brakoj !...

Kiam oni vidis lin eniri en la kapituloĉambro, simpla kaj mallerta, salutante la ĉeestantaron kun kruro malantaŭe; prioro, kanonikoj, trezoristo, ĉiuj ekridis. Ĉiam estis la efekto kiun kaŭzis tiu bona grizhariĝanta vizaĝo kun sia kaprobarbo kaj siaj okuloj iom frenezaj, kiam li alvenis ie; tial la frato Livulo ne emociiĝis pro tio.

- Viaj Pastraj Moŝtoj, li eligis per kontentiĝema tono, tordetante sian rozarion de olivkernoj, oni vere pravas diri ke estas la malplenaj bareloj kiuj plej bone kantas. Imagu ke, post multaj fosadoj en mia cerbo, jam tiom malplena, mi kredas ke mi trovis rimedon por nin ĉiuj eltiri el la embaraso.

Jen kiel. Vi bone scias, onklinon Begonaⁿ, tiun bravan virinon kiu vartis min kiam mi estis infaneto (Dio havu sian animon, la maljuna diboĉulino ! Ŝi kantis tre maldecajn kanzonojn post esti trinkinta). Mi do diros al vi, viaj respektindaj pastroj, ke onkline Begona, dum sia vivo, spertis pri la montaj herboj tiom multe kaj pli bone ol maljuna Korsika merlo. Vere, ŝi ellaboris je la fino de siaj tagoj, nekompareblan eliksiron miksante kvin aŭ ses speciojn de kuracherboj kiujn ni iris kune pluki en **Alpiloj**^[39]. Tio okazis antaŭ pluraj jaroj : sed mi opinias ke, kun la helpo de Sankta Aŭgusteno kaj la permeso de nia pastro Abato, mi kapablus - bone serĉante - retrovi la recepton de ĉi tiu mistera eliksiro. Ni tiam devus nur enboteligi ĝin kaj vendi ĝin iom multekosta, tio kio permesus al la komunumo malrapidete riĉiĝi, same kiel niaj fratoj de La Trapo kaj de la granda...

Li ne havis tempon por fini. La prioro stariĝis por sin ĵeti al lia kolo. La kanonikoj prenis al li la manojn. La trezoristo, ankoraŭ pli kortuŝita ol ĉiuj aliaj, respekte kisis al li la tute franĝigitan randon de lia skapulario... Poste ĉiu

39 Mi ne trovis bonan tradukon. Alpiloj estas propra nomo de malaltaj montaroj en la sudoriento de Francio sur la Mediteraneo.

revenis al sia katedro por interkonsiliĝi; kaj senprokraste la kapitulo decidis ke oni konfidus la bovinojn al la frato Trasibulo, por ke la frato Livulo povu tute sin dediĉi al la preparado de sia eliksiro.

Kiel la bona frato sukcesis trovi la recepton de onklino Begona ? Koste de kiaj klopodoj ? Koste de kiaj maldormadoj ? La historio ne diras tion. Sed, tio kio estas certa, estas ke post ses monatoj, la eliksiro de la Blankaj Pastroj jam estis tre populara. En la tuta grafejo, en la tuta lando de Arlezo, ne iu farmodomo, ne iu garbejo, kiu ne havis, funde de sia provizejo, inter la boteloj da kuirita vino kaj la terkruĉoj da pikolinaj olivoj, malgrandan flakonon el bruna tero, sigelita per la blazono de Provenco, kun ekstaziĝanta monaĥo sur arĝenta etikedo. Danke al la furoro de sia eliksiro, la domo de la Premonstratuloj tre rapide riĉiĝis. Oni rekonstruis la domturon Pakomoⁿ. La prioro ricevis novan mitron, la preĝejo beletajn ellaboritajn vitralojn; kaj en la delikata krenelaro de la sonorilturo, tutan kvanton da sonoriloj kaj sonoriletoj ekaperis, iun belan Paskan matenon, tute tintadantaj kaj kariljonadantaj.

Koncerne la fraton Livulon, tiun kompatindan servantan fraton kies la malgracioj tiom gajigis la kapitulon, ne plu temis pri tio en la monaĥejo. Oni konis nur, de tiam, la pastran Moŝton Livuloⁿ, cerbuman viron kun granda scio, kiu vivis tute izolita de la tiom negravaj kaj tiom multoblaj okupoj de la klostro, kaj enfermiĝis dum la tuta tago en sia distilejo, dum tridek monaĥoj traesploris la montaron por serĉi al li bonodorajn herbojn... Tiu ĉi distilejo kie neniu, ne eĉ la prioro, rajtis eniri, estis malnova forlasita kapelo tute ĉe la fino de la ĝardeno de la kanonikoj. La simpleco de la bonaj pastroj faris de tio misteran kaj mirindan lokon; kaj se, hazarde, aŭdaca kaj scivola monaĥeto, kroĉiĝanta al ampelopsoj, alvenus ĝis la rozvitralo de la portalo, li

fulmrapide falus de tie, timiĝinta pro esti vidinta la Pastron Livuloⁿ, kun lia barbo de nekromanciano, kliniĝantan super liaj fornoj kun la alkoholometro en la mano; poste tute ĉirkaŭe, retortojn el roza grejso, gigantajn distililojn, serpentotubojn el kristalo, tutan strangan amason kiu ensorĉite flagris en la ruĝa lumeto de la vitraloj...

Ĉe la noktiĝo, kiam sonis la lasta anĝeluso, la pordo de tiu loko de mistero diskrete malfermiĝis, kaj la pastra Moŝto iris al la preĝejo por la vespera diservo. Necesis vidi kian akcepton kiam li trapasis la monaĥejon! La fratoj formis spaliron laŭlonge de lia trairado. Ili diris: "ŜŜ!... Li havas la sekreton!..."

La trezoristo sekvis lin kaj parolis al li kun klinita kresto... Meze de tiuj flategoj, la pastro foriris, viŝante al si la frunton, sian trikornan ĉapelon kun larĝaj randoj malantaŭ metitan kiel aŭreolo, rigardante ĉirkaŭ si kun kompleza mieno, la grandajn kortojn plantitajn per oranĝujoj, la blujajn tegmentojn kie turniĝis novaj ventomontriloj, kaj en la klostro brila pro blankeco - inter la elegantaj kaj florplenaj kolonetoj - la kanonikojn freŝe vestintajn duope paradis kun ripozitaj mienoj.

- Estas al mi ke ili ŝuldas tion ĉion! diris en si mem la respektindulo; kaj ĉiufoje ĉi tiu penso plumblovis lin de orgojlo.

La kompatindulo pro tio estis vere punita. Vi tuj komprenos...

Imagu ke iun vesperon, dum la diservo, li alvenis en la preĝejon kun eksterkutima ekscitiĝo: ruĝa, senspira, kun la kapuĉo oblikve metita, kaj tiel malserena ke prenante benitan akvon, li trempis en ĝi siajn manikojn ĝis la kubuto. Unue oni kredis ke estis pro la emocio malfrue alveni; sed kiam oni vidis lin riverencegi la orgenon kaj tribunojn anstataŭ saluti la ĉefaltaron, ventosubite trairi la preĝejon,

vagi en la ĥorejo dum kvin minutoj por serĉi sian ĥorseĝon, poste fine sidinta, kliniĝi de ambaŭ flankoj ridetante kun beata mieno, iu mira murmuro trakuris tra la tri navoj. Oni susuris de breviero al breviero :

- Kion do havas nia Pastro Livulo ?... Kion do havas nia Pastro Livulo ?

Dufoje la prioro, malpacienigita, faligis sian episkopan bastonon sur la slabojn por ordoni silenton... Tie, funde de la ĥorejo, la psalmoj ankoraŭ daŭrigis; sed la responsorioj mankis entuziasmon...

Subite, mezmeze de la *Ave verum*^[40], jen mia Pastro Livulo kiu sin renversas en sia ĥorseĝo kaj ekkantas per laŭtega voĉo :

*En Parizo, estas Blanka Pastro,
Patatin, patatan, tarabin, taraban...*

Ĝenerala konsterno. Ĉiuj leviĝas. Oni krias :

- Forprenu lin... li estas demonhavanta !

La kanonikoj sin krucoŝignas. La episkopa bastono de Monsinjoro skuiĝadas... Sed la Pastro Livulo nenion vidas, nenion aŭskultas; kaj du fortikaj monaĥoj devis kuntiri lin tra la pordeto de la ĥorejo, baraktantan kiel ekzorcita viro, kaj daŭrigantan ankoraŭ pli laŭte siajn patatin kaj siajn taraban.

La morgaŭon, ĉe la tagiĝo, la mizerulo estis surgenu en la preĝoĉambro de la prioro, kaj pekliberigis sin en rivereto da larmoj :

- Estas la eliksiro, Monsinjoro, estas la eliksiro kiu surprizis min, li diris frapante al si la bruston. Kaj pro vidi lin tiel malĝoja, tiel pentanta, la bona prioro estis mem tute kortuŝita.

- Nu, nu, Pastro Livulo, kvietiĝu, ĉio tio sekiĝos kiel roso en la suno... Finfine, la skandalo ne estis tiel grava kiel vi

40 "Ave verum corpus" estas latina kristana preĝo tradukebla per "Saluton vera korpo".

pensas. Fakte estis la kanto kiu estis iom... hm ! hm !
Almenaŭ, necesas esperi ke la novicoj ne aŭdis ĝin... Nun ja,
bone diru al mi kiel la afero okazis al vi... Estas gustumante
la eliksiron, ĉu ne ? Vi eble verŝis tro abunde. Jes, jes, mi
komprenas... Estas kiel la frato de **Ŝuartz**, la inventinto de
la pulvo : vi estis viktimo de via invento... Kaj diru al mi,
brava amiko mia, ĉu vere necesas ke vi provu ĝin sur vi mem,
ĉi tiun teruran eliksiron ?

- Bedaŭrinde, jes, Monsinjoro... la provtubo ja donas al
mi la forton kaj la gradon de alkoholo; sed pri la finfariteco,
la dolĉeco, mi preskaŭ fidas nur al mia lango...

- Ha ! bonege... Sed ankoraŭ aŭskultu iom ke mi diru al
vi... Kiam vi tiel gustumas la eliksiron pro neceseco, ĉu tio
ŝajnas bongusta al vi ? Ĉu vi ĝuas ĝin ?...

- Bedaŭrinde ! jes, Monsinjoro, eligis la kompatinda
Pastro tute ruĝiĝante... Ekde jen du vesperoj, mi trovas en
ĝi bukedon, aromon !... Certe estas la demono kiu ludis al mi
ĉi tiun fiaĵon. Tial, mi jam estas tute decida nur uzi la
provtubon. Estus domaĉe se la likvoro ne estus sufiĉe
delikata, se ĝi ne sufiĉe perligus...

- Bone detenu vin de tio, vigle interrompis la prioro.
Necesas ne riski sin malkontentigante la klientaron... Ĉio
kion vi devas fari nun kiam jen vi estas avertita, estas gardi
vin tre zorge... Ni vidu, kion vi bezonas por ekkompreni ?...
Dek kvin aŭ dudek gutojn, ĉu ne ?... Ni supozu dudek gutojn...
La diablo estus tre ruza se li trafus vin per dudek gutojn...
Krome, por antaŭeviti ajnan akcidenton, mi ekde nun
sendevigas vin veni al la preĝejo. Vi diros la vesperan
diservon en la distilejo... Kaj nun, iru pace, pastra Moŝto
mia, kaj ĉefe... bone kalkulu viajn gutojn.

Bedaŭrinde ! la kompatinda Moŝto estis vane kalkulanta
siajn gutojn... la demono tenis lin kaj ne plu liberlasis lin.

Estis la distilejo kiu aŭdis strangajn diservojn !

Dumtage, ankoraŭ, ĉio tute glatis. La Pastro estis sufiĉe serena : li preparis siajn varmigilojn, siajn distililojn, zorgeme laŭspecigis siajn herbojn, ĉiujn Provencajn herbojn, delikatajn, grizajn, dentumitajn, satiĝintajn de parfumoj kaj suno... Sed vespere, kiam la kuracherboj estis infuzitaj kaj kiam la eliksiro malvarmetiĝis en grandaj pelvoj el ruĝa kupro, la turmentiĝo de la kompatinda viro komencis.

- ...Dek sep... dek ok... dek naŭ... dudek !...

La gutoj falis de la ŝalmo en la glaseton el orarĝento. Tiu dudek, la pastro eltrinkis ilin per unu gluto, preskaŭ sen plezuro. Estis nur la dudek-unua kiu ekscitis al li la deziron. Ho ! Ĉi tiu dudek-unua gutto ! Tiam, por eskapi la tenton, li iris genuiĝi ĉe la fino de la laboratorio kaj dronis en sian preĝaron. Sed el la ankoraŭ varma likvoro, leviĝis fumeto tute riĉa je aromaĵoj kiuj venis ŝvebi ĉirkaŭ li, kaj vole nevole, revenigis lin al la pelvoj... La likvoro estis el bela ora verde... Kliniĝinta supre, la naztruo malfermitaj, la pastro malrapidege movis ĝin per sia ŝalmo, kaj en la malgrandaj brilaj fajreroj kiujn ruligis la smeraldan ondon, ŝajnis al li vidi la okulojn de onklino Begona kiu ridis kaj fulmetis rigardante lin...

- Nu ! Ankoraŭ unu guton !

Kaj gutto post gutto, la malfeliĉulo finfine havis sian glaseton ĝisrande plenan. Tiam, senfortiĝinta, li lasis sin fali en grandan brakseĝon, kaj kun la korpo malstreĉiĝinta, la palpebro duonfermita, li gustumis sian pekon per glutetoj, mallaŭte dirante al si kun dolĉa memriproĉo :

- Ha ! Mi damniĝas... mi damniĝas...

La plej terura, estas ke funde de tiu ĉi diabla eliksiro, li retrovis, per mi-ne-scias kian sorĉaĵon, ĉiujn maldecajn kanzonojn de onklino Begona : "Estas tri etaj klaĉulinoj kiuj parolas estigi bankedon..." aŭ "Paŝtistineto de majstro Andreo foriras sole al la arbaro..." kaj ankoraŭ la teruran de

la Blankaj Pastroj : "Patatin patatan".

Imagu kian konfuzon la morgaŭon, kiam liaj najbaroj de ĉelo faris al li kun petola mieno :

- He ! he ! Patro Livulo, vi havis cikadojn en la kapo, hieraŭ vespere, enlitigante.

Tiam estis larmoj, senkuraĝiĝoj, kaj fasto, kaj pentoĉemizo, kaj disciplino. Sed nenio sukcesis kontraŭ la demono de la eliksiro; kaj ĉiujn vesperojn, je la sama horo, la demonhavo rekomencis.

Dume, la mendoj pluis ĉe la abatejo, tiom ke ĝi estis beno. Ili venis de Nimo, de Aikso, de Avinjono, kaj de Marsejlo... Tagon post tago, la monaĥejo pli kaj pli aspektis kiel fabriko. Estis fratoj pakistoj, fratoj etikedistoj, aliaj por la skribadoj, aliaj por la kamionado; tie ĉi kaj tie la servo de Dio fakte perdis kelkajn sonorilbatojn; sed la enlandaj mizeruloj nenion perdis, mi certigas tion al vi...

Kaj do, iun belan dimanĉan matenon, en mezkapitulo, dum la trezoristo legis sian jarfinan inventaron, kaj dum la bonaj kanonikoj aŭskultis lin kun brilaj okuloj kaj rideto sur siaj lipoj, jen la pastro Livulo kiu enfalis meze de la konferenco kriante :

- Estas finita... Mi ne plu faras ĝin... Redonu al mi miajn bovinojn.

- Kio do estas, Pastro Livulo ? demandis la prioro kiu ja iom konjektis tion kio okazis.

- Tio kio estas, Monsinjoro ?... Estas ke mi estas preparanta al mi belan eternecon de flamoj kaj de batoj de forko... Estas ke mi trinkas, ke mi drinkas kiel mizerulo...

- Sed mi diris al vi kalkuli viajn gutojn.

- Ha ! jes ja, kalkuli miajn gutojn ! Estas nun per glasetoj ke necesus kalkuli... Jes, miaj Moŝtoj, mi alvenas ĝis tie. Po tri fioloj vespere... Vi ja komprenas ke tio ne povas daŭri... Tial, farigu la eliksiron per tiu kiun vi volos... La

fajro de Dio bruligu min se mi ankoraŭ partoprenas en tio !

Estas la kanonikaro kiu ne plu ridis.

- Sed, mizerulo, vi ruinigas nin ! kriis la trezoristo, svingante sian kontolibron.

- Ĉu vi preferas ke mi damniĝu ?

Tiam la prioro stariĝis.

- Miaj Moŝtoj, li diris, etendante sian belan blankan manon kie brilis la episkopa ringo, estas rimedo por aranĝi ĉion... Estas vespere, ĉu ne, kara filo mia, ke la demono tentas vin ?...

- Jes, sinjoro prioro, regule ĉiujn vesperojn... Tial, nun, kiam mi vidas alveni la nokto, mi estas senofende ekŝviteganta, kiel la azeno de Kapitu^[41] kiam ĝi vidis veni la ŝarĝoselon.

- Nu ! Trankviliĝu... De nun, ĉiujn vesperojn, dum la diservo, ni recitos favore al vi la preĝon de Sankta Aŭgusteno, al kiu la plena indulgenco estas ligita... Kun tio, kio ajn okazas, vi estas protektita... Ĝi estas absolvo dum la pekado.

- Ho bone ! Tiam, dankon, sinjoro prioro !

Kaj, sen peti pli, la pastro Livulo reiris al siaj distililoj, tiel malpeza kiel alaŭdo.

Efektive, de tiu momento, ĉiujn vesperojn, ĉe la fino de la kompletorio, la diservanto neniam mankis diri :

- Ni preĝu por nia kompatinda Pastro Livulo kiu oferas sian animon al la interesoj de la komunumo... Oremus Domine^[42] ...

Kaj dum sur ĉiuj tiuj blankaj kapuĉoj, adorklinitaj en la ombro de la navoj, la preĝo kuris murmurante kiel malgrava bizo sur neĝo, tien, ĉe la finfino de la monaĥejo, malantaŭ la

41 Provenca esprimo kiu aplikiĝas al la pigruloj.

42 Ellatine "Oremus" = "Ni preĝu" kaj "Domine" = "Nia Sinjoro". Ĝi estas du kristanaj preĝoj de la latina meso.

movoplena vitrosepto de la distilejo, oni aŭdis la pastron
Livuloⁿ kiu plengorĝe kantis :

*En Parizo, estas Blanka Pastro,
Patatin, patatan, taraban, tarabin;*

En Parizo, estas Blanka Pastro

Kiu dancigas monaĥinojn,

Trin, trin, trin, en ĝardeno;

Kiu dancigas...

...ĉi tie, la bona preposto haltis plena de teruro :

- Mizerikordo ! Se miaj geparokanoj aŭdus min !

En Kamargo.

* ** *** 1. La Foriro *** ** *

Granda rumoro en la kastelo. La kuriero ĵus alportis bileton de la gardisto, duone francan, duone provencan, anoncantan ke jam estis du aŭ tri belaj transpasadoj de ardeoj, de limozoj, kaj ke la birdoj de printempo ankaŭ ne mankis.

"Estu kun ni !" skribis al mi miaj afablaj najbaroj; kaj ĉimatene, ĉe la tagiĝo je la kvina, ilia granda ŝarĝveturilo, ŝarĝita per fusiloj, hundoj, proviantoj, venis preni min malsupre de la deklivo. Jen ni veturantaj sur la vojo al Arlezo, iom seka, iom senkreska, en tiu ĉi mateno de decembro, kiam la pala verdaĵo de la olivujoj estas apenaŭ videbla, kaj la kruda verdaĵo de la **kirmeskverkoj** iom tro vintra kaj falsa. La staloj vigliĝas. Estas vekiĝoj antaŭ tagiĝo kiu lumigas la fenestran vitron de la farmodomoj; kaj en la ŝtonbreĉoj de la **Abatejo de Montmaĵur**, maragloj ankoraŭ senkonsciaj pro dormo, batas la flugilon inter la ruinaĵoj. Tamen ni jam renkontpasas laŭlonge de la fosaĵoj, maljunajn kamparaninojn kiuj iras al la vendejo laŭ la trotado de siaj azenetoj. Ili venas el la urbo de **Baŭ**. Ses grandaj leŭgoj por sidiĝi dum horo sur la ŝtupoj de **Sankta Trofimo** kaj vendi malgrandajn pakaĵojn da kuracherboj plukitaj en la montaro !...

Nun jen la remparoj de Arlezo; remparoj malaltaj kaj krenelaj, kiel oni vidas sur malnovaj gravuraĵoj kie batalistoj armitaj per lancoj aperas supre de talusoj malpli altaj ol ili. Ni galope transpasas tiun mirindan malgrandan urbon, unu el la plej pitoreskaj en Francio, kun ĝiaj skulptitaj rondformaj

balkonoj, elstarantaj kiel loĝioj^[43] ĝis meze de mallarĝaj stratoj, kun ĝiaj malnovaj nigraj domoj kun maŭraj pordetoj, ogivaj kaj malaltaj, kiuj transigas vin al la tempo de **Vilhelmo Mallonga-Nazo** kaj de la Saracenoj. Je tiu ĉi horo, estas ankoraŭ neniu ekstere. Sole la Rodana kajo estas movoplena. La vaporŝipo kiu servas al Kamargo hejtiĝas malsupre de ŝtupojn preta por foriri. Kampokulturistoj en jako el rufa kadiso, knabinoj de **Laroketo** kiu iras sin lui por laboroj en bienoj, enŝipiĝas sur la ferdekon kun ni, babilante kaj ridante inter si. Sub la longaj brunaj pelerinoj malfalditaj pro la malvarmeta matena aero, la alta Arleza kapvesto estigas elegantan etan kapon kun beleta grano da aplombo, deziro ekstari por sendi la ridon aŭ la petolecon pli for... La sonorilo sonoras; ni foriras. Pro la triobla rapideco de la Rodano, de la helico, de la mistralo, la du bordoj disvolviĝas. Unuflanke estas Kro^[44], iu arida, ŝtonhava ebenaĵo. Aliflanke, Kamargo, pli verda, kiu etendas ĝis la maro sian malaltan herbaron kaj siajn marĉoj plenaj de kanoj.

De tempo al tempo, la boato haltas apud pontono, al maldekstro aŭ al dekstro, al Imperio aŭ al Reĝlando, kiel oni diris en la mezepoko, dum la tempo de la Reĝlando de Arlezo, kaj kiel la malnovaj Rodanaj maristoj diras ankoraŭ hodiaŭ. Ĉe ĉiu pontono, blanka farmbieno, bosketo da arboj. La laboristoj elŝipiĝas ŝarĝita de iloj, la virinoj kun sia korbo ĉe la brako, rektaj sur la pastabulo. Al la Imperio aŭ al la Reĝlando, iom post iom la ŝipo malpleniĝas, kaj kiam ĝi alvenas ĉe la pontono de la Kampodomo-de-Ĵiro kie ni elŝipiĝas, restas preskaŭ neniu surŝipe.

La Kampodomo-de-Ĵiro estas malnova farmobieno de la sinjoroj de **Barbentano** kie ni eniras por atendi la gardiston

43 En la franca teksto "moucharabié", vorto el la araba "moucharabieh" kiu estus balkono ebligante observi sen esti vidata dank'al densa ĵaluzio el ligno.

44 Kro (france : Crau) estas paleo-delta de la rivero Duranco.

kiu devas veni serĉi nin. En la alta kuirejo, ĉiuj viroj de la farmobieno, plugistoj, vinberistoj, paŝtistoj, paŝtistetoj, sidas ĉetabele, seriozaj, silentaj, malrapide manĝantaj, kaj servitaj de la virinoj kiuj nur poste manĝos. Senprokraste la gardisto aperas kun la kariolo. Vera knabego laŭ la maniero de Fenimore, kaptilisto sur tero kaj sur akvo, fiŝgardisto kaj ĉasgardisto, la homo de la regiono nomas lin Lu la noktovagulo, ĉar oni ĉiam vidas lin en la nebuloj de la mateniĝo aŭ de la vesperiĝo, kaŝinta por la embusko inter la kanoj, aŭ senmova en sia malgranda boato, okupinta pririgardi siajn nasojn sur la lagetoj kaj la irigaciaj kanaloj. Eble estas ĉi tiu metio de eterna gardisto kiu faras lin tiel silentan, tiel diligentan. Tamen, dum la malgranda kariolo ŝarĝita de fusiloj kaj de korboj vojiras antaŭ ni, li donas al ni novaĵojn pri la ĉaso, la nombron da pasadoj, la kvartaloj kie la migrantaj birdoj deflugis. Babilante, oni enprofundiĝas en la lando.

La agroj preterpasitaj, jen ni en tute sovaĝa Kamargo. Ĝis kie ni povis vidi, inter la paŝtejoj, marĉoj, irigaciaj kanaloj, brilas en la salikornioj. Bosketoj da tamarikoj kaj da kanoj estigas insuletojn kiel sur trankvila maro. Neniaj altaj arboj. La glata, grandega aspekto de la ebenaĵo ne estas ĝenita. De tempo al tempo, gregejoj de brutoj etendas siajn malaltajn tegmentojn preskaŭ ternivele. Dissemitaj brutaroj kuŝantaj en salaj herboj, aŭ dense paŝadantaj ĉirkaŭ la rufa pelerino de la paŝtisto, ne interrompas la granda senŝanĝa linio, malgravigitaj ke ili estas de tiu senfina spaco de bluaj horizontoj kaj de malfermita ĉielo. Kiel el la maro glata malgraŭ ĝiaj ondoj, liberiĝas el tiu ebenaĵo ian impreson de soleco, de vasteco, ankoraŭ pliigita de la mistralo kiu blovas sen paŭzo, sen obstaklo, kaj kiu, per sia potenca elspiraĵo, ŝajnas glatigi, plivastigi la pejzaĵon. Ĉio kliniĝas antaŭ ĝi. La plej

malgrandaj arbustoj konservas la spuron de ĝia trapaso, restas torditaj, kuŝitaj suden kun la teniĝo de eterna fuĝo...

* ** *** 2. La kabano *** ** *

Tegmento el kanoj, muroj el sekigitaj kaj flavaj kanoj, tio estas la kabano. Tiel nomiĝas nia ĉasredevo. Tipo de Kamarga domo, la kabano konsistas el ununura ĉambro, alta, vasta, sen fenestro, kaj ricevanta la taglumon tra vitra pordo kiun oni fermas vespere per plenaj ŝutroj. Laŭlonge de la grandaj muroj, stukitaj kalkitaj, rakoĵoj atendas la fusilojn, la ĉasakojn, la marĉobotojn. Ĉe la fundo, kvin aŭ ses litoj estas aranĝitaj ĉirkaŭ vera masto plantita engrunde kaj staranta ĝis la tegmento al kiu ĝi utilas kiel subteno. Pro la malproksima maro kaj la vento kiu alproksimigas ĝin, kiam la mistralo blovas kaj la domo krakadas de ĉie, la nokto kunportas ĝian bruon, daŭrigas ĝin ŝvelante ĝin, oni kredus sin kuŝantan en la ĉambro de ŝipo.

Sed ĉefe estas posttagmeze ke la kabano estas ĉarma. Dum niaj belaj tagoj de suda vintro, mi ŝatas resti tute sola apud la alta kameno kie fumas kelkaj stumpoj de tamariko. Sub la batoj de la mistralo aŭ de la tramontano, la pordo saltas, la kanoj krias, kaj ĉiuj tiuj skuoj estas tre malgranda eĥo de la granda ŝanceliĝado de la naturo ĉirkaŭ mi. La vintra suno skurĝita de la grandega fluo disiĝas, kunigas siajn radiojn, disigas ilin. Grandaj ombroj kuras sub admirinda blua ĉielo. La lumo spasme alvenas, ankaŭ la bruoj; kaj la tintadoj de la brutaro subite aŭditaj, poste forgesitaj, perditaj en la vento, revenas kanti sub la ek-skuita pordo kun la ĉarmo de refreno... La agrabla horo estas la krepusko, iom antaŭ ol la ĉasistoj alvenas. Tiam la vento kalmiĝis. Mi eliras por momento. Pace la granda ruĝa suno malsupreniras, arda, sen varmeco. La nokto falas, pasante tuŝetas vin per sia

nigra tute malseka flugilo. Tie for, nivele de la grundo, la lumo de pafas kun la brilo de ruĝa stelo pliardigita de la ĉirkaŭa ombro. En tio kio restas de la tago, la vivo hastas. Longa triangulo da anasoj flugas tre malalte, kvazaŭ ili volis surteriĝi; sed subite la kabano, kie la oleolampo estas flamigita, malproksimigas ilin : tiu kiu antaŭiras ĉe la kapo de la kolumno levas la kolon, resupreniras, kaj ĉiuj aliaj malantaŭ li sekvas pli alten kun sovaĝaj krioj.

Baldaŭ impona paŝbruo alproksimiĝas, simila al pluvobruo. Miloj da ŝafoj, alvokataj de la paŝtistoj, turmentataj de la hundoj de kiuj oni aŭdas la konfuzan galopon kaj la anhelan spiron, rapidas al la gregejoj, timemaj kaj sendisciplinaj. Mi estas invadata, tuŝetata, konsternata en tiu kirlado de buklaĵoj, de ŝafblekoj; ia aŭtentika hulo kie la paŝtistoj ŝajnas portitaj kun sia ombro de resaltantaj fluaĵoj... Malantaŭ la brutaroj, jen konataj paŝadoj, ĝojaj voĉoj. La kabano estas plena, movoplena, bruema. La sarmantoj flamas. Oni ridas des pli ke oni estas lacaj. Estis sveno pro feliĉa laciĝo, la fusiloj en angulo, la grandaj botoj ĵetitaj dise mise, la malplenaj ĉassakoj, kaj apude la plumaroj rufaj, oraj, verdaj, arĝentaj, tute makulitaj de sango. La tablo estas primetita; kaj en la fumo de bona supo de angiloj, silento fariĝas, la granda silento de fortegaj apetitoj, nur interrompita de la kruelaj grumbladoj de la hundoj kiuj blinde lektrinkas sian pelveton antaŭ la pordo...

La vespertempo estos mallonga. Jam apud la fajro, ankaŭ ĝi trembrilanta, restas nur la gardisto kaj mi. Ni babilas, tio estas ke ni ĵetas, kiel la kamparanoj, de tempo al tempo, unu al la alia duonajn vortojn, el tiuj preskaŭ indianaj interjekcioj, mallongaj kaj rapide estingitaj kiel la lastaj fajreroj de la konsumitaj sarmantoj. Finfine la gardisto stariĝas, lumigas sian lanternon kaj mi aŭskultas sian pezan paŝon kiu perdiĝas en la nokto...

* ** *** 3. En embusko^[45] ! *** ** *

La espero^[45] ! Kia beleta nomo por menciis la embuskon, la atendon de la embuskita ĉasisto, kaj tiuj necertaj horoj kiam ĉio atendas, esperas, hezitas inter la tago kaj la nokto. La matena embusko, iom antaŭ la sunleviĝo, la vespera embusko ĉe la krepusko. Estas ĉi tiu lasta kiun mi preferas, ĉefe en tiuj ĉi marĉaj landoj kie la akvo de la lagetoj retenas tiel longe la lumon...

Kelkfoje oni embuskadas en la boaton^[46], ian tute malgrandan mallarĝan boaton sen kilo, ruliĝantan ĉe la plej malgranda movado. Ŝirmita de la kanoj, la ĉasisto gvas la anasojn de la fundo de sia boato kiun elstaras nur la viziero de kaskedo, la pafiltubo de la fusilo kaj la kapo de la hundo flaranta la venton, ekkaptanta la moskitojn aŭ per ĝiaj dikaj etenditaj kruroj, klinante la tutan boaton al unu flanko kaj plenigante ĝin per akvo. Tiu embusko estas tro komplika pro mia sensperteco. Tial plejofte, mi piede iras al embuskejo, vadante meze de marĉo kun grandegaj botoj tajlitaj laŭ la tuta longo de la ledo. Mi paŝas malrapide, singarde, pro timo enŝlimiĝi. Mi flankenigas la kanojn plenajn de saletaj odoroj kaj de saltoj de ranoj...

Fine, jen insuleto de tamarikoj, angulo de seka tero kie mi lokiĝas. La gardisto, por honori min, lasis sian hundon kun mi; grandegan hundon de Pireneoj kun granda blanka felo, unuaranga ĉasanto kaj fiŝanto, kaj kiun la ĉeesto ne nur iom timigas min. Kiam atingebla akvokokino pasas, ĝi havas ian ironian mienon rigardi min ĵetante malantaŭen, per ia kapskuo al la artisto, du longajn molajn orelojn kiuj pendas en ĝiaj okuloj; poste senmovajn pozojn, svingiĝetojn de vosto, tutan mimikon de senpacienco por diri al mi :

45 En la franca teksto, estas uzata iun kutimdiron rekte tradukebla per "En espero".

46 Malstabila boato kies ĝia provenca nomo "negochin" origine signifus "mergu la hundon".

- Pafu... pafu do !

Mi pafas, mi maltrafas. Tiam, sterniĝanta, ĝi oscedas kaj streĉiĝas kun laca, elrevigita kaj insolenta mieno...

Nu ! Jes, mi agnoskas, mi estas malbona ĉasisto. Por mi, la embusko estas la horo kiu fluas, la lumo malheliĝanta, rifuĝanta en la akvo, la lagetoj kiuj brilas, polurante ĝis la tono de la fajna arĝento la grizan koloron de la malheligita ĉielo. Mi ŝatas tiun odoron de akvo, tiun misteran flugtuŝon de insektoj en la kanoj, tiun etan murmuron de la longaj folioj kiuj tremetas. De tempo al tempo, malĝoja noto preterpasas, kaj ruliĝas en la ĉielo kiel la zumado de mara konko. Estas la botaŭro kiu enakvigas ĝis la fundo de la akvo, sian grandegan bekon de la fiŝisto-birdo kaj elspiregas... rrrhuuu ! Birdgrupoj de grupoj flugas super mia kapo. Mi aŭdas la susuron de la plumoj, la taŭzado de la lanugo en la freŝa aero, kaj ĝis la krako de la malgranda trostreĉita ostaro. Poste, nenio plu. Estas nokto, profunda nokto, kun iom da taglumo restinta sur la akvo...

Subite mi sentas tremeton, specon de nervoza ĝeno, kvazaŭ mi havis iun malantaŭ mi. Mi turnas min, kaj ekvidas la kompanon de la belaj noktoj, la lunon, larĝan lunon tute rondan, kiu malrapide leviĝas laŭ suprenira movado unue tre sensebla, kaj malrapidiĝanta proporcie kiel ĝi malproksimiĝas de la horizonto.

Jam unua radio estas distingebla apud mi, kaj alia iom pli for... Nun la tuta marĉo estas lumigita. La plej malgranda herbotufo havas sian ombbron. La embusko estas finita, la birdoj vidas nin : necesas rehejmeniri. Ni paŝas meze de inundo de blua lumo, dolĉa, polva; kaj ĉiu el niaj paŝoj en la lagetoj, en la irigaciaj kanaloj, malordigas amasojn da falintaj steloj kaj radiojn de luno kiuj trairas la akvon ĝis la fundo.

* ** *** 4. La ruĝo kaj la blanko *** ** *

Tute proksime de nia hejmo, trafebila de la kabano per fusilo, estas iu alia kiu similas ĝin, sed pli rustika. Estas tie kie nia gardisto loĝas kun sia edzino kaj siaj du unuenaskitoj : la knabino kiu zorgas pri la manĝo de la viroj, flikas la fiŝkaptajn retojn; la knabo kiu helpas sian patron por liberigi la nasojn, por kontroli la kluzopordetojn de la lagetoj. La du plej junaj estas en Arlezo, ĉe la avino; kaj ili restos tie ĝis kiam ili estu ellernintaj legi kaj kiam ili faru siajn unuajn komuniigojn, ĉar ĉi tie oni estas tro malproksime de la preĝejo kaj de la lernejo, kaj plie la Kamarga aero senvaloras por ĉi tiuj etuloj. Fakte, komence de somero, kiam la marĉoj estas sekaj kaj kiam la blanka ŝlimo de la irigaciaj kanaloj fendetiĝas pro la varmego, la insulo vere ne plu estas loĝebla.

Mi iufoje vidis tiun dum la monato de aŭgusto, venante pafi la sovaĝajn anasidojn, kaj mi neniam forgesos la malĝojan kaj kruelan aspekton de tiu fajriganta pejzaĝo. De loko al loko, la lagetoj fumis en la suno kiel vastegaj kuvoj, gardante tute funde reston de vivo kiu moviĝadis, svarmon da salamandroj, da araneoj, da muŝoj de akvo serĉantaj malsekajn angulojn. Tie estis etoso de pesto, peze ŝvebanta nebuleto de miasmo kiun ankoraŭ densigis sennombraj kirloj da moskitoj. Ĉe la gardisto, ĉiuj frostotremis, ĉiuj havis febron, kaj estis kompatato vidi la vizaĝojn flavajn, lacaspektajn, la okulojn ringitajn, tro grandajn, de tiuj malfeliĉuloj kondamnitaj treni sin, dum tri monatoj, sub ĉi tiu senindulga plena suno kiu bruligas la februlojn sen revarmigi ilin... Malĝoja kaj peniga vivo, tiu de ĉasgardisto en Kamargo ! Tamen ĉi tiu havas sian edzinon kaj siajn infanojn apud li; sed du leŭgon pli for, en la marĉo, loĝas ĉevalgardisto kiu, li, vivas tutsole de komenco ĝis fino de la jaro, kaj

kondukas veran ekzistadon de Robinsono. En sia kabano el kanoj kiun li mem konstruis, ne ia uzataĵo kiu ne estas lia faritaĵo, de la hamako el plektita vimeno, la tri nigraj ŝtonoj kunmetitaj laŭ fajrujo, la piedoj de tamarikoj hakitaj kiel benketoj, ĝis la seruro kaj la ŝlosilo el blanka ligno fermanta ĉi tiun apartan loĝejon.

La viro estas almenaŭ tiel stranga kiel sia loĝejo. Li estas speco de silenta filozofo kiel la ermitoj, ŝirmante sian kamparanan malfidon sub densaj hirtaj brovoj. Kiam li ne estas en la paŝtejo, oni trovas lin sidantan antaŭ sia pordo, malrapide deĉifrantan, kun infana kaj tuŝa diligenteco, unu el tiuj rozaj, bluaj aŭ flavaj broŝuretoj kiuj ĉirkaŭas la farmaciajn fiolojn kiujn li uzas por siaj ĉevaloj. La kompatinda diablo havas nek alian distraĵon ol la legadon, nek aliajn librojn ol ĉi tiujn. Kvankam kabanaj najbaroj, nia gardisto kaj li ne intervizitas sin. Ili eĉ evitas sin interrenkonti. Iun tagon kiam mi demandis al la noktovagulo la kialon de tiu ĉi antipatio, li serioze respondis al mi :

- Estas pro la opinioj... Li estas ruĝa, kaj mi ja estas blanka.

Tiel eĉ en ĉi tiu dezerto kies soleco devintus malfremdigi ilin, tiuj ĉi du sovaĝuloj, tiel malkleraj, tiel naivaj unu kiel la alia, ĉi tiuj du **bovistoj de Teokrito**, kiuj dumjare iras al la urbo apenaŭ unufoje, kaj al kiuj la etaj trinkejoj de Arlezo, kun siaj oritaĵoj kaj speguloj, donas la miron de la palaco de la Ptolomeoj, eltrovis rimedon malami sin je la nomo de siaj politikaj opinioj !

*** ** *** 5. La Vakareso *** ** ***

Tio kio estas plej bela en Kamargo, estas la Vakareso. Ofte, forlasante la ĉasadon, mi venas sidiĝi ĉe la rando de ĉi tiu sala lago, ia malgranda maro kiu ŝajnas peco de la granda,

enfermita en la agroj kaj fariĝinta kutima pro sia kaptiteco mem. Anstataŭ tiu sekeco, tiu arideco kiu kutime malgajigas la marbordojn, la Vakareso, sur sia iom alta bordo, tute verda pro maldika, velureca herbo, sternaĝas originala kaj ĉarma flaŭro : centaŭreoj, meniantoj, gencianoj kaj tiuj beletaj limonioj, bluaj dum la vintro, ruĝaj dum la somero, kiuj aliigas sian koloron laŭ la ŝanĝiĝo de la atmosferon, kaj dank'al seninterrompa florado markas la sezonojn per siaj diversaj tonoj.

Ĉirkaŭ la kvina vespere, je la horo kiam la suno kliniĝas, ĉi tiuj tri leŭgoj da akvo sen iu barko, sen iu velo por limi, transformi sian vastecon, havas admirinda aspekto. Ne plu estas la intima ĉarmo de la lagetoj, de la irigaciaj kanaloj, aperantaj de loko al loko inter la faltoj de marneca tereno sub kiu oni sentas la akvon filtri ĉien, pretan sin montri ĉe la plej eta kaviĝo de la grundo. Ĉi tie, la impresoj estas granda, larĝa. De malproksime, tiu ĉi radiado de ondoj allogas arojn da maranasoj, ardeojn, botaŭrojn, fenikopterojn kun blanka ventro, kun rozaj flugiloj, viciĝantajn por fiŝkapti laŭlonge de la bordo, tiel ke iliaj diversaj nuancojn dispoziciigis laŭ longa egala bendo: kaj poste ibisojn, verajn ibisojn el Egiptio, kiel ĉe ili en tiu belega suno kaj tiu muta pejzaĝo. El mia loko, fakte, mi aŭdas nur la akvon kiu plaŭdas, kaj la voĉo de la gardisto kiu revokas siajn ĉevalojn disajn ĉe la bordo. Ili ĉiuj havas famajn nomojn : "Lucifero... La Estelo... La Esturnelo..." Ĉiu besto, aŭdante sin nomi, alkuras, krinaro en la vento, kaj venas manĝi la avenon en mano de la gardisto...

Pli for, ĉiam sur la sama bordo, troviĝas granda brutaro da bovoj paŝtiĝantaj libere kiel la ĉevaloj. De tempo al tempo, mi ekvidas supre de bosketo da tamarikoj la spinon de ilia kurba dorso, kaj iliajn malgrandajn lunarkajn kornojn kiuj stariĝas. La plejmulto el ĉi tiuj bovoj de Kamargo estas breditaj por kuri dum la brulstampadaj festoj de la vilaĝo;

kaj kelkaj havas nomojn jam famkonatajn de ĉiuj cirkoj de Provenco kaj de Langvedoko. Tiel estas ke la najbara brutaro nombras interalie teruran batalinton nomata la Romiano, kiu disŝiris mi-ne-scias kiom da viroj kaj ĉevaloj dum la konkursoj de Arlezo, de Nimo, de Taraskono. Tial, ĝiaj kunuloj rigardas ĝin kiel ĉefo; ĉar en tiuj strangaj gregoj, la bestoj mem sin regas, kunigitaj ĉirkaŭ maljuna virbovo kiun ili elektas kiel kondukanto. Kiam uragano falas sur Kamargo, terura en tiu granda ebenaĵo kie nenio devojigas ĝin, haltigas ĝin, necesas vidi la brutaron kunpremiĝi malantaŭ sia ĉefo, ĉiuj kapoj klinintaj turnantaj al vento tiujn larĝajn fruntojn kie la forto de la bovo koncentriĝas. Niaj provencaj paŝtistoj nomas tiun manovron : turni la kornon al vento. Kaj ve al la brutaro kiu ne konformiĝas al tio ! Blindigita de la pluvo, kuntirita de la uragano, la brutaro konfuzita rotaciadas, freneziĝas, disiĝas, kaj la malesperaj bovoj kurantaj antaŭ si por eskapi la ŝtormon, sin ĵetas en la Rodanoⁿ, en la Vakaresoⁿ aŭ en la maron.

Nostalgio de la Kazernoj.

Tiun ĉi matenon, ĉe la unuaj lumecoj de la mateniĝo, grandega tamburado abrupte ekvekas min... Ran plan plan !
Ran plan plan !...

Iu tamburisto en miaj pinoj je tia horo !... Jen tio kio estas stranga, ekzemple.

Rapide, rapide, mi ĵetas min malsupren de mia lito kaj kuras malfermi la pordon.

Neniu ! La bruo silentiĝis... El la mezo de la malsekaj lambruskoj, du aŭ tri kurloj ekflugas skuante siajn flugilojn... Iom da brizo kantas en la arboj... Orienten, sur la maldika kresto de la **Alpilo**^[47] amasiĝas ora polvo el kie la suno malrapide eliras... Iu unua radio jam tuŝetas la tegmenton de la muelejo. Sammomente, la nevidebla tamburisto komencas ekbati en la kampoj, nevidebla... Ran... plan... plan, plan, plan.

La diablo estu la Azenfelo ! Mi forgesis lin. Sed fine, kiu do estas la sovaĝulo kiu venas saluti la aŭroron ĉe la fundo de la arbaro kun tamburo ?... Mi vane rigardas, mi vidas nenion... nenion krom la tufojn de lavendo, kaj la pinojn kiuj disvolviĝas ĝis malsupren sur la vojo... Eble estas tie en la densejo ia kaŝita koboldo mokanta min... Sendube estas Arielo, aŭ majstro Puko. La strangulo estas dirinta al si, preterpasante antaŭ mia muelejo :

- Tiu parizano ĉi-ene estas tro trankvila, ni iru doni al li la aŭbadon.

Tiel, li ekkaptis dikan tamburon, kaj ran plan plan !... ran plan plan !... Ĉu vi malbruos kanajlo de Puko ! Vi estas vekonta miajn cikadojn.

Ne estis Puko.

47 Mi ne trovis bonan tradukon. Alpiloj estas propra nomo de malaltaj montaroj en la sudoriento de Francio sur la Mediteraneo.

Estis Gugeto Francisko, nomata Pistolon, tamburisto ĉe la 31^a de la liniotrupoj, kaj nuntempe ĝuanta semestran ferion. Pistolo enuias en la lando, li havas nostalgiojn, tiu ĉi tamburisto, kaj - kiam oni bonvolas pruntedoni al li la instrumenton de la komunumo - li foriras, melankolie, bati la tamburon en la arbaro, revante pri la kazerno de la Princo Eŭgeno.

Estas sur malgranda verda monteto ke li hodiaŭ venis revadi... Li tie estas, staranta kontraŭ pino, sian tamburon inter siaj kruroj kaj plene plezurigante sin... Flugadoj de timigitaj perdrikidoj foriras de tute proksime sen ke li ekvidas tion. La timiano bonodoras ĉirkaŭ li, li ne sentas tion.

Li ankaŭ vidas nek la delikatajn araneaĵojn kiuj tremas en la suno inter la branĉoj, nek la pinpinglojn kiuj saltetas sur sia tamburo. Tute kaptita de sia revado kaj de sia muziko, li ameme rigardas flugi siajn frapilojn, kaj lia dika naivega vizaĝo radias de plezuro ĉe ĉiu tamburado.

Ran plan plan ! Ran plan plan !...

"Kiel ĝi estas bela, la granda kazerno, kun ĝia korto el larĝaj slaboj, ĝiaj vicoj da fenestroj bone laŭliniigitaj, ĝia popolo kun polica ĉapo, kaj ĝiaj malaltaj arkadoj plenaj de la bruado de la gameloj !..."

Ran plan plan ! Ran plan plan !...

"Ho ! La resonanta ŝtuparo, la kalkitaj koridoroj, la odora dormejego, la zonego kiun oni frotpurigas, la benko de la juĝatoj, la potoj de ciro, la litetoj el fero kun griza litkovrilo, la fusiloj kiuj brilas en la armilrako !"

Ran plan plan ! Ran plan plan !...

"Ho ! La bonaj tagoj de la gardantaro, la mapoj kiuj glue makulis la fingrojn, la malbelega pika damo kun ornamaĵoj el plumaĵo, la maljuna malsortimentita **Pigault-Lebrun** kiu postrestas sur la tendolito !"

Ran plan plan ! Ran plan plan !...

"Ho ! La longaj noktoj de gardodeĵoro ĉe la pordo de la ministerioj, la malnova gardobudo kie la pluvo eniras, la piedoj kiuj estas malvarmaj !... La paradaj veturiloj kiuj surŝprucigas vin preterpasante !... Ho ! La kroma taskaĵo, la punĉambro, la stinkanta kuvo, la kapkuseno el tabulo, la malvarma veksignalo ĉe la pluvaj matenoj, la retiriĝo en la nebuloj ĉe la horo kiam la gaso eklumas, la vespera alvoko kie oni alvenas spirmanka !"

Ran plan plan ! Ran plan plan !...

"Ho ! La arbaro de Vinceno, la dikaj gantoj el blanka kotono, la promenadoj sur la fortikaĵoj... Ho ! La bariero de la lernejo, la ĉiesulinoj, la protektanto de la Salono de Marso, la absintaĵo en la drinkejoj, la konfidencojn inter du hikoj, la sabretojn kiujn oni elingigas, la sentimentala romano kantita kun mano sur la koro !..."

Revu, revu, kompatindulo ! Ne estas mi kiu malpermesos tion al vi; maltime fortege batu vian tamburon. Mi ne rajtas trovi vin ridindan.

Se vi havas nostalgion pri via kazerno, ĉu mi ja ne havas nostalgion pri la mia ?

Mia Parizo obsedas min ĝis ĉi tie kiel la via. Vi ja ludas tamburon sub la pinoj ! Mi ja tie verkas tekstojn... Ha ! La bonaj Provencanoj kiujn ni estas ! Tie for, en la kazernoj de Parizo, ni bedaŭris niajn blujn **Alpilojn** kaj la sovaĝan odoron de la lavendoj; nun, ĉi tie, meze de Provenco, la kazerno mankas al ni, kaj ĉio kio rememorigas ĝin al ni, estas kara al ni !...

La oka batas en la vilaĝon. Pistolo, sen malteni siajn frapilojn, ekvojiris por reeniri... Oni aŭdas lin malsupreniri sub la arbaro, ĉiam ludante... Kaj mi, kuŝanta en la herbejo, malsana je nostalgio, mi kredas vidi, pro la bruo de la tamburo kiu malproksimiĝas, mian tutan Parizon defili inter

la pinoj...

Ha ! Parizo !... Parizo !... ĉiam Parizo !

FINO.